


EL POPOLO
CINIO 6
1965





Lasta kontrolo.

Dumonata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 6 (95) 1965

Ĉefa Enhavo

Sur la kovrilo — Ni Ĝifu Laboras
per Sia Nova Borilo

Foto de Di Hianghua

Memore al la 20-a Datreveno de la
Venko de la Ĉina Popolo en Sia
Kontraŭjapana Rezistmilito
Antaŭen Rapidas la Nova Tibeto
La Milita Situacio en Suda Vjetnamio
Novaj Homoj kaj Novaj Aferoj en
la Nova Lando

Lej Feng — Bona Servanto de la
Popolo

El la Taglibro de Lej Feng

Kurantaj Aferoj

Ŝtata Agrokulturejo ĉe Gobia Dezerto
La Dua Ilmaŝina Fabriko de Pekino
La Produkto de Ĉiutagaj Vivbezonaĵoj de Tiangin

Gejunuloj en la Montregiono de
Liping

La Provizado de Legomoj en Pekino
(*Bildpaĝoj*)

Elektado de Grupestro

Filmoprezento por Kampanoj

Vivu la Venko de la Popola Milito!
(*Fotokolekto*)

Nokta Surprizatako al Jangmingbaŭ
Sportas Milionoj da Popolanoj
Kantono, Urbo Plena de Internacia
Amikeco

Kanto pri la Novo (*Poemo*)

Haŝi-rano (*Kuriozaj Bestoj*)

Post la Kurso

Sur Nia Librobreto

Parolas Legantoj (*Inter Ni*)

Esperanto Marŝas

Distra Angulo

Korespondi Deziras

Indekso de EPC 1965

Sur la dorskovrilo — Nova Fiziono-
mio de Virga Valo

Foto de Ĉen Ĝinong



MEMORE AL LA 20-A DATREVENO DE LA VENKO DE LA ĈINA POPOLO EN SIA KONTRAŬJAPANA REZISTMILITO

Forpasis jam 20 jaroj de post septembro de 1945, kiam la ĉina popolo gajnis la finan venkon de la Kontraŭjapana Rezistmilito. La venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito estas parto de la venko de la monda milito kontraŭ la faŝismaj Germanio, Italio kaj Japanio.

En la tridekaj jaroj la japana imperiismo kreis, post okupo de nia Nordoriento, alian Incidenton de Julio-sepa, kaj komencis plenskalan atakon kontraŭ Ĉinio. Dume la reganta kliko de Kuomintang alprenis la politikon de "ne-rezisto" kaj metis duonan Ĉinion sub la ferajn kalkanumojn de la japanaj banditoj.

Ĉe la kriza momento, la Komunista Partio de Ĉinio alte levis la standardon de naciliberigo, proponis kaj starigis la nacian unuecan fronton kontraŭ Japanio, kaj mobilizis la vastajn popolamasojn el milionoj kaj dekmilionoj por heroe rezisti la agresantojn. Sub la gvido de la Komunista Partio, la Okavoja Armeo kaj la Nova Kvara Armeo decideme penetris en la postfronton de la malamiko, kaj vekis kaj armis la tieajn amasojn. Ili disvolvis ĉie gerilan militon kaj establis vastajn kontraŭjapanajn bazregionojn. Post okjara rezistbatalo, la ĉina popolo finfine gajnis la venkon. Tuj sekve, la ĉina popolo en trijara liberiga milito venkis ankaŭ la kuomintang-an reakciularon, kiu iniciatis la internan militon subtenate de la usona imperiismo, kaj fondis la Ĉinan Popolan Respublikon.

Kiam la japana imperiismo lanĉis la agresan militon kontraŭ Ĉinio, ĝiaj fortoj de milito, ekonomio kaj politika organizo multe superis Ĉinion. Sed la malforta lando venkis la fortan. Kial do?

La plej esenca kaŭzo estis tio, ke la Kontraŭjapana Rezistmilito estis vera popola milito gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio kaj kamarado Maŭ Zedong kaj aplikigis al ĝi korektaj marksism-leninismaj linioj politika kaj milita. Ĝi alprenis sisteme strategion kaj taktikon de popola milito, precipe enpenetri en la vastan kampanon por establi kontraŭjapanajn bazregionojn, ĉirkaŭi la urbojn per la kampano kaj fine konkeri ilin kaj gajni la plenan venkon tra la lando.

En lastaj dudek jaroj la usona imperiismo prenis la lokon de la faŝismaj Germanio, Italio kaj Japanio. Ĝi freneze klopodis efektiviĝi sian kontraŭrevolucion tutgloban strategion celante superregi la tutan mondon kaj fariĝis la plej kruela malamiko de la tutmonda popolo. Sed dume, granda ŝanĝo okazis en la mondo kaj en Ĉinio pli favore al la revolucia popolo de la mondo kaj pli malfavore al la imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Jam en la komenca periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito kamarado Maŭ Zedong diris, ke la ĉina popolo povos venki en sia kontraŭagresa milito kaj la japana imperiismo estas venkebla. Kaj hodiaŭ ni povas ankaŭ diri kun plena fido, ke la revolucia batalo de la tutmonda popolo povos venki kaj la usona imperiismo estas venkebla.

La Red.

Antaŭen


LA DEMOKRATIA REFORMO — POPOLA REVOLUCIO ENVOLVANTA LA TUTAN TIBETON

Post kiam oni subpremis la ribelon levitan de la re-akciularo de la tibeta supera socitavolo en la unua jarduono de 1959, la tutan Tibeton envolvigis la popola revolucio — demokratia reformo. Sub la gvido de la Komunista Partio, la miliono da servutuloj plene detruis la feŭdan servutan sistemon, la plej reakcian, plej

malluman kaj plej barbaran sistemon en la homa socio, kaj realigis la popolan demokratian diktaturon. En la mallonga daŭro de 6 jaroj post tio, la tibeta socio impete disvolviĝis kaj transsaltis plurajn jarcentojn.

Hodiaŭ, la miliono da servutuloj de Tibeto kore ĝojas pro la unuafoja liberiĝo el la katenoj

La tibeta laboristaro ĉiam pli kreskas kaj grandiĝas. Jen tibeta lernanta teknikistino Sonamco (la unua maldekstre) de la Lhasa-a Aŭto-riparejo laboras ĉe sia maŝino.



Tibetaj liberigitaj servutuloj kaj sklavo balotas kun entuziasmo.

EN septembro ĉijare, en Tibeto de Ĉinio okazis la Unua Sesio de la Unua Kongreso de Popolaj Rezentantoj, kie oni proklamis solene la fondiĝon de la Tibeta Aŭtonoma Regiono.

Tio montras, ke la miliono da servutuloj en Tibeto jam liberiĝis komplete el sklaveco kaj fariĝis mastroj de la ŝtato, kaj ke la socio kaj popolo de Tibeto nun marŝas antaŭen al socialisma socio. Dum la 15 jaroj, la tibeta popolo, gvidate de la Komunista Partio de Ĉinio, travivis la plej grandan transformon en sia historio kaj atingis grandan sukceson. La iamaj servutuloj kaj sklavo fariĝis mastroj de sia destino. Kaj la malnova Tibeto, longe stagna kaj tre postiĝinta politike, ekonomie kaj kulture, turniĝis jam en novan Tibeton antaŭen marŝantan flugrapide kun verovo kaj energio.

Rapidas la Nova Tibeto

de la feŭda servuteco kaj ekĝuo de la homaj rajtoj. Ili prenis en siajn manojn la regpovon kaj fariĝis siaj propraj mastroj. Lastatempe, du-tridek mil el ili estis demokratie elektitaj kiel reprezentantoj al la vilaĝaj aŭ guberniaj kongresoj de popolaj reprezentantoj, kaj komitatoj de la popola registara komitato kaj praktikas la rajton direktadi siajn aferojn. Ĉirkaŭ du cent liberigitaj servutuloj kaj sklavo estis elektitaj en la guberniaj kongresoj kiel reprezentantoj al la Unua Kongreso de Popolaj Reprezentantoj de la Aŭtonoma Regiono. La nombro de la tibetaj kadroj, kiuj estis antaŭe servutuloj kaj sklavo, kreskis dum la lastaj jaroj ĝis pli ol dek ses mil personoj. Ili ne nur plenumadas la gvidadon en la regpotenco de diversaj rangoj, sed ankaŭ iom post iom el-lernis la mastrumon de diversaj aferoj en ekonomio kaj kulturo. Multe da estintaj servutuloj kaj sklavo jam aliĝis al la Komunista Partio kaj la Komunisma Junulara Ligo. Dank' al la revolucio, elkreskis nova generacio de Tibeto, kiu ne plu estas sklavo kaj brutoj, sed popolo kun ĉiam pli alta politika konscio.


KONTINUA PLIPRODUKTO DE AGROKULTURO KAJ BESTOBREDADO

Sub la regado de la feŭda servuta sistemo, la produktivo de la tibeta socio grave detruigis kaj ĉiam pli kadukiĝis la produkto en agrokulturo kaj bestobredado. Post la efektiviĝo de la demokratia reformo, aperis pliprodukto dum ses sinsekvaj jaroj. Agroj kuŝintaj en dezerteco estis rekultivitaj, stepoj ekprosperis kaj la totala produktokvanto de greno kaj la suma nombro de bestoj en 1964 plimultiĝis respektive je 45% kaj 36%, kompare kun tiuj antaŭ la demokratia reformo.

La farmbieno Kejsum (nun Kejsum-vilaĝo), antaŭe apartenanta al la granda servutula mastro en la Montsuda Subregiono kaj ĉefo de la ribelintaj reakciuloj Surkang · Vangkiengeleg estis la unua farmbieno kie kondukiĝis la demokratia reformo en Tibeto. Ĝia produkto preskaŭ neniom pliiĝis dum la pasintaj pli ol 300 jaroj sub la regado de Kejsum-familio. Post la demokratia reformo, la servutuloj starigis sian regpovon, organizis unu post alia dek interhelpajn grupojn kaj disvolvis la produkton per kolektiva forto. Samaj estis la kampoj kaj

Ĝojo pro abunda rikolto.





La tibetlingva eldono de la "Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong" estas vendata en Hinhua-librejo, Lhasa, kaj varme akceptita de la tibeta popolo.

la homoj laborantaj sur ili, sed tute malsamaj estis la kvantoj de iliaj laborfruktoj. En la lastaj jaroj, la po-mua produktokvanto de la pli ol dek ses mil muoj da tero de tiu vilaĝo pliiĝis de 168 ĝinoj antaŭ la demokratia reformo ĝis 319 ĝinoj en la pasinta jaro; la nombro de bovoj pliiĝis de 20 ĝis 80; duobligis ĝiaj agrokulturiloj kaj nun ĝi jam havas 59 novtipajn plugilojn. En la komenco de la demokratia reformo, en tiu vilaĝo pli ol 90 el la 119 familioj suferis de nesufiĉo de nutraĵoj. En la lasta jaro, ne nur sufiĉe da semoj kaj nutraĵoj por la homoj kaj brutoj ĉiuj familioj jam havis, sed 95% el ili havis eĉ grenon superfluan, kaj meznombro ĉiu homo en la vilaĝo havis por la jaro preskaŭ 600 ĝinojn da greno. Cetere, ĉiu el la kamparanoj havis meznombro 1 laktobovino, 1 porkon kaj 1 ŝafon. Oni komencis adiaŭi al la malriĉeco. Nun la liberigitaj servutuloj urĝe postulas organiziĝon en pli alta nivelo por marŝi sur la socialisma vojo de komuna riĉiĝo.

EMERĜO DE MODERNAJ INDUSTRIO KAJ KOMUNIKADO

En la pasinteco, Tibeto tute ne havis modernan industrion kaj eĉ ŝraŭbon ĝi ne povis fabriki. Nun pli ol 60 fabrikoj mezgrandaj kaj malgrandaj jam konstruiĝis en la tuta regiono. Servutuloj kaj sklavo, kapablantaj nur kultivi teron aŭ paŝti brutojn,

jam povas nun manipuli maŝinojn. Pli ol dudek mil homoj nun laboras en la fabrikoj kaj entreprenoj. La unua generacio de la tibeta laboristaro jam formiĝis.

Hodiaŭ, multe mallongiĝis la distanco inter Tibeto sur la "Monda Tegmento" kaj la montbarata interno de la patrio. Ankaŭ tio estis neimagebla por la maljuna generacio de Tibeto. La plibonigo de la trafiko alportis al Tibeto progreson kaj kulturon. Nun

miloj da aŭtoj veturas sur la altebeno kaj formis reton de ŝoseoj kun la urboj Lhasa, Ŝjegaze, Ĉangdu, Hejhe, Zedang k. a. kiel centroj. 95 procentoj de la gubernioj havas jam trafikon de aŭtoj kaj la tuta longeco de la ŝoseoj en la regiono atingis pli ol 15,000 kilometrojn. Tri arterioj inter Siĉuan kaj Tibeto, Kinghaj kaj Tibeto kaj Hingiang kaj Tibeto bone ligas Tibeton kun la interna parto de la patrio kaj tiel kreis ege favorajn kondiĉojn por la disvolvo de la ekonomia kaj kultura konstruado de tiu regiono.

LA UNUA KLERA GENERACIO DE LA LIBERIGITAJ SERVUTULOJ

Tibeto estis "Tabua Regiono" kontraŭ la modernaj kulturo kaj scienco en la pasinteco.

La vendisto de la proviz-venda Kooperativo sendas varojn al la kamparo por kontentigi la kreskantan bezonon de la liberigitaj servutuloj.




Tiam en la tuta regiono troviĝis neniu regula lernejo kaj neniu scienca esploro. La servutuloj kaj sklavo subpremataj sub la feŭda servuta sistemo kaj katenataj de la feŭdaj kaj superstiĉaj pensoj, dronis en malklereco generacion post generacio. Hodiaŭ, ili jam havas sian unuan generacion de kleruloj kaj laborantojn de scienco kaj tekniko. En la tuta regiono fondiĝis jam 7 mezlernejoj kaj pli ol 1600 elementaj lernejoj, kaj krome fondiĝis ankaŭ la Tibeta Nacia Instituto kaj Instruista Lernejo speciale por elkulturi kadrojn kaj instruistojn el la tibeta nacio. La nombro de lernantoj atingis sume pli ol 60,000 personojn, el kiuj la plejparto estas gefiloj de malriĉaj kamparanoj kaj paŝtistoj. Krom tio, la liberiĝintaj servutuloj fondis en siaj vilaĝoj kaj paŝtejoj ankaŭ centojn da vesperaj lernejoj, en kiuj estas klerigataj pli ol dekmil personoj. Ĉio ĉi estas novaj aferoj neniam okazintaj en la malnova Tibeto.

La feŭda servuta reĝimo en Tibeto fondis nenian kuracejon kun moderna ekipaĵo. Nun, en la nova Tibeto troviĝas 15 modernaj hospitaloj, 149 sanigejoj kun 1345 litoj por malsanuloj, kiuj faras senpagan kuracon por la popolo de la tuta regiono. Ĉiam pli boniĝas la sanstato de la tibeta popolo.

Jam de multaj jarcentoj, malsato, malsano, malriĉeco kaj morto akompanis la tibetan popolon kiel ombro. Antaŭ la demokratia reformo, la loĝantaro de Tibeto multe malpliigis ol antaŭ du cent jaroj. Nun ĝi kreskas jaron post jaro dank' al la plibonigado de la vivo de la laboranta popolo kaj de la medicina servo.

Iuj liberiĝintaj servutuloj jene priskribis sian vivstaton antaŭ la demokratia reformo: "Nia portebla posedaĵo estis nur la ombro, dum la postlaseblaj nur la piedsignoj." Ĝuste la kruela ekspluatado kaj subpremo fare de la areto da servutulaj mastroj al la vasta amaso de servutuloj estis la ĉefa kaŭzo, pro kio longe stagnis la tibeta socio. Por renversi tiun plej postigitan, reakcian, kruelan kaj barbaran reĝimon de servuteco, la tibeta popolo iam faris heroan batalon. Post la liberiĝo de Tibeto, senĉese altiĝis la klaskonscio de ĝia popolo sub la gvidado de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj la tibeta popolo arde deziris rapide ŝanĝi tiun socisistemon. Nun la feŭda sistemo de servuteco, kiu daŭris jam jarcentojn, estas abolita, kaj la tibeta popolo eniris novan historian periodon.



Laborantinoj en la Hospitalo de la Tibeta Regiono transfuzas sangon al la tibeta liberigita sklavo, Sonamkunjong

SEN LIBERIGO DE LA LABORANTA POPOLO, NE POVAS ESTI PLENA NACILIBERIGO

La revolucio kondukita de la miliono da tibetaj servutuloj vivece pruvis al ni la veron montritan de Prezidanto Maŭ: "La naciaj bataloj, analizite ĝis la fino, estas klasbatalo." Tiu ĉi revolucio montras, ke la solvo de nacia problemo estas afero de revolucio, kaj se iu nacio volas sin liberigi, ĝi devas, antaŭ ĉio, liberigi la plejmulton de sia laboranta popolo. Sen liberigo de la laboranta popolo, ne povas esti plena naciliberigo. La liberiĝo de Tibeto kaj la 15-jara historio post ĝia liberiĝo estas ĝuste historio de klasbatalo. La granda venko de la popola revolucio en Tibeto rezultis el la komplika kaj akra klasbatalo kaj revolucia batalo kondukita de la miliono da servutuloj tieaj, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, kontraŭ la klaso de servutulaj mastroj subtenataj de imperiismo kaj eksterlandaj reakciuloj.

Nun proklamiĝis la fondo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono en la brilo de la nacia politiko de la Komunista Partio. Tio ĉi estas nova mejlŝtono en la historio de Tibeto. Estas espereble, ke baldaŭ aperos la nova socialisma Tibeto kun ĝia popolo unuiginta en la granda unueca familio de la socialisma patrolando sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, la nova Tibeto longe dezirata de la popolo kaj neniam ekzistinta en la historio de Tibeto.

La Milita Situacio en Suda Vjetnamio

Nia korespondanto

LA FALSA PACO KAJ VERA AGRESO DE JOHNSON

La 28-an de julio, la usona prezidanto Lyndon B. Johnson anoncis, ke Usono multe pligos siajn trupojn en suda Vjetnamio de 75,000 ĝis 125,000 personoj por realigi la t. n. "longtempan strategian planon por gajni venkon". Kaj la usona ministro de defendo McNamara kriaĉis, ke Usono apartigos la Sudon kaj Nordon de Vjetnamio je la latituda linio 17°, kaj "blokados" la tutan sudan Vjetnamion mare kaj tere, por fari grandskalan lokan militon.

Por kamufli la rapidajn paŝojn de intensa plivastigo de la agresa milito kontraŭ Vjetnamio, Johnson denove energie svingadis olivobran-

ĉojn kaj ofertis trompan pacon dum sia deklaro pri pliigo de trupoj por milito. Unuflanke li elpendigis la ŝildon de la Unuiĝintaj Nacioj, brue babilis pri "uzo de ĉiuj rimedoj, povo kaj prestiĝo de UNO" por "venigi pacon" en Vjetnamio, kaj ordonis la novan usonan ambasadoron al UNO Arthur J. Goldberg meti la problemon de Vjetnamio en la agendon de la Sekura Konsilo de UNO; aliflanke li sendis specialan delegiton Averell Harriman al Moskvo por kontakto. Kaj tiu ĉi iris ankaŭ al Beogrado kaj tie direktis histrionaĵon.

Sub la direktado de Harriman, Tito de Jugoslavio kaj Shastri de Hindio serveme klopodis por la pac-intrigo de Johnson kaj publikigis la Komunan Komunikon kun la t. n. tri

Nokte, batalanto de suda Vjetnamio ludas revolucion muzikon por siaj kamaradoj ĉe la fajro, per la unukorda instrumento farita de li mem.



punktoj de paca solvo. En sia komunikado, ili nek kondamnas la usonajn agresojn kontraŭ Vjetnamio kaj malhelpon al ĝia unuiĝo, nek postulas retiriĝon de la usona agresiva armeo el suda Vjetnamio, sed postulas, ke la vjetnama popolo formetu siajn armilojn kaj tuj konduku intertraktadon kun Usono. El ĉio ĉi tio la popolo de la mondo tuj povas vidi, kian varon ili proponas.

Ĉiufoje, kiam Johnson aldonas hejtaĵon al la agresivita fajro, li ankaŭ samtempe ripetas sian pacan litanion, kaj ĉiufoje kiam li murmuris pacan litanion, li ankaŭ pliidigas la agresivitan fajron. Johnson mem diris, ke li jam faris 15 fojojn da pactrompaj ludoj, sed ili ĉiuj estis malkaŝitaj de liaj agresivaj aktivadoj. La popoloj de la mondo jam estas sufiĉe spertaj pri lia duvizaĝa taktiko de falsa paco kaj vera agreso.

SINSEKVAJ VENKOJ DE LA ARMITAJ FORTOJ DE SUDA VJETNAMIO


Kvankam la Johnson-registaro multe pliigis siajn trupojn en suda Vjetnamio, rekte partoprenas la militon kaj baraktas per novaj militaj rimedoj, tamen ĝi neniam ŝanĝis la sorton de la usonaj agresantoj sangverŝi kaj kaprompiĝi sur la batalkampoj de suda Vjetnamio. La sudvjetnamera popolo akiris unu post alia grandajn venkojn en sia justa patriota batalo kontraŭ la usona agreso. Ĉisube ni donu statistikon pri la batalado en la unuaj sep monatoj de la kuranta jaro:

1. La armitaj fortoj de suda Vjetnamio mortigis, vundis, kaptis kaj malorganizis sume pli ol 110,000 homojn de la puparmeo en tiu periodo.

2. Ili ekstermis pli ol 3,000 usonajn agresantojn, 10-foje atakis usonajn aerbazojn kaj faligis aŭ detruis pli ol 500 usonajn aviadilojn t. e. pli ol duono de la totalo de ĝiaj pli ol 800 aviadiloj en suda Vjetnamio.

3. Ili faris pli ol 12,000 batalojn dum la unua duono de la kuranta jaro, 36 el kiuj estis grandaj bataloj, t. e. 6 tiajn en ĉiu monato.

4. Ili detruis ĉ. 2000 "strategiajn vilaĝetojn", kaj liberigis 11 guberniojn kaj 11 militajn subregionojn dum la unua jarduono. La liberigita regiono nun okupas kvar kvinonojn de la tuta suda Vjetnamio kun pli ol dek milionoj da loĝantoj.



Popolanoj en la liberigita regiono de suda Vjetnamio aktive helpas la trupon en batalo kontraŭ la usona agresiva armeo per ŝparita greno.

5. Ili detruis pli ol 100 pontojn, pli ol 400 km. da ŝoseo kaj distranĉis la fervojojn en malgrandajn partojn dum la unua jarduono. La tera trafiko de la malamiko jam paralizigis kaj grandaj urboj kaj militaj bazlokoj de la uson-pupa klicko fariĝis vere izolaj insuloj.

La supraj ciferoj bildigis al ni la grandan kreskon de la armitaj fortoj de la sudvjetnamera popolo.

KARAKTERIZAĴOJ DE LA BATALKAMPOJ EN SUDA VJETNAMIO

En la unua duono de la kuranta jaro, la heroaj armeo kaj popolo de suda Vjetnamio furioze atakis la malamikojn kvazaŭ uragano, kaj venĝaj flamoj arde brulis de la rivero Ben Hai ĝis la kabo Ca Mau, de la montregiono



La gerilanoj de iu vilaĝo en suda Vjetnamio iras por fari solidan baton al usonaj agresantoj.

Tay Nguyen ĝis la ebenaĵo Nam Bo, forte vundante la militeman diablon la usona imperiismo kaj alportante grandan ĝojon al la popolo.

Per kio sin karakterizas la nuna situacio de la disvolviĝanta bataalkampo en suda Vjetnamio?

Unue, la armitaj fortoj de la popolo de suda Vjetnamio ekstermis multegon da aktivaj fortoj

de la malamiko, kio ebligis, ke la situacio de la bataalkampo disvolviĝas favore al la popolo. En la daŭro de nur iom pli ol duonjaro la popolaj armitaj fortoj de suda Vjetnamio jam ekstermis pli ol cent dek mil malamikojn, kio ja estas ne malgranda nombro. La pupa armeo de suda Vjetnamio konsistas el sume pli ol 500,000 homoj. Kiom da similaj batoj ĝi

Ekstermu la usonajn agresantojn per iliaj armiloj akiritaj en batalo! Jen armitaj popolanoj de suda Vjetnamio embuskas la malamikojn, apud Da Nang.



povos plu elteni? Estas ne mirinde, ke la Johnson-registaro jam ne povis ne demeti la kamuflaĵojn kaj sin ĵeti en batalon. Ĝi jam ne plu povas sin apogi, kiel antaŭe, ĉefe sur la fortoj de la puparmeo por fari la koloniisman militon.

Due, pli kaj pli multe da usonaj sinjorido-soldatoj vundiĝis kaj pereis post kiam la popolaj armitaj fortoj de suda Vjetnamio elmetis la sloganon: “Elserĉu usonajn agresantojn por kontraŭbatali kaj ekstermu ĉiun viditan usonan diablon”. Sekve de la granda venko ĉe Nui Thanh, kie popola trupo ekstermis unufoje la tutan usonan trupon de 139 personoj, alia granda venko estis gajnita ĉe Van Tuong, kie 600 usonaj armeanoj pereis en la 18-a kaj 19-a de aŭg. Estas ne mirinde, ke vizaĝe al la sinsekvaj grandnombraj vundoj kaj mortoj, la komandanto de la Pacifika Floto de Usono, Sharp diris malĝoje: “Koncerne al la ciferoj de vundoj kaj mortoj estas nur unu tendenco — kresko.” Estas ja severa fakto, ke Usono sendis sepultan trupon al suda Vjetnamio por kolekti kadavrojn de la agresantoj.

Trie, la popolaj armitaj fortoj utiligas ĉiujn favorajn kondiĉojn de popola militado, ili ne nur operacias sagace kaj flekseble kun admirindaj taktikoj, sed ankaŭ plene utiligas ĉiujn favorajn faktorojn de vetero kaj topografio. Ĝuste pro tio, la prezidanto de la Senata Armserva Komitato de Usono, Richard Russell ne povis ne konfesi, ke la popolaj armitaj fortoj de suda

Vjetnamio estas “kredeble la plej eminentaj gerilanoj en la homa historio”. Ankaŭ Johnson ne povis ne krei konsternite: La situacio fariĝos ankoraŭ pli malbona.

Kvare, la popolaj armitaj fortoj rompis la trafikon de la uson-pupa armeo kaj pli-paralizis la teran trafikon de la malamiko. Se antaŭe la uson-pupa armeo ankoraŭ povis teni sian pozicion de “punktoj kaj linioj”, nun multaj el ĝiaj baz-punktoj povas akiri provizon jam ĉefe tra aero. La dek ŝoseoj, konataj kiel “arterioj de Sajgono kondukantaj al la ekstera mondo” estas plejparte distranĉitaj. La Asociiĝinta Gazet-servo konfesis: “La manko de provizoj en multaj lokoj akriĝis ĝis danĝereco.”

En tia situacio, la usona prezidanto Johnson, tre simila al kartoludanto, kiu neniam ĉesas post malgajno, kriaĉis, ke Usono neniam forkuros kun la vosto inter la kruroj el suda Vjetnamio. La 28-an de julio, Johnson senhonte anoncis plian alsendon de 50,000 armeanoj por disvastigi la agresan militon. Sed la historio fojrefoje pruvis, ke la agresantoj certe malvenkos. Kiel ajn Johnson klopodos, ĉu per multigo de trupoj kaj disvastigo de la milito, ĉu per ludo de pactrompo, li neniel evitos la hontindan sorton de plena malvenko. Certe triumfos la popolo de suda Vjetnamio en sia justa patriota milito kontraŭ la usona agresio. La plene mobilizitaj 14,000,000 popolanoj de suda Vjetnamio estas ondeganta oceano, kiu finfine forglutos la usonajn agresantojn.

La forte gardata usona aerbazo en Da Nang, suda Vjetnamio, estas ofte atakata de la popolaj trupoj. Multaj aviadiloj estas detruitaj kaj konsterniĝis la usonaj armeanoj.

Usonaj agresantoj ricevis fortan baton en la batalo de la 15-a de julio apud Sajgono.



Novaj Homoj kaj Novaj Aferoj en la Nova Lando

EN la liberigita Ĉinio, la laboranta popolo jam fariĝis la mastro de sia lando. En la brilo de la penso de Maŭ Zedong, la nova Ĉinio leviĝas kiel la matena suno, trapasis grandajn ŝanĝojn en diversaj sferoj. La politika konscio de la popoloj senĉese altiĝas kaj aperadas grandnombre novaj homoj, kiuj arde amas la patrion, estas zorgemaj pri la kolektivo, agas juste kaj malegoisme, estas helpemaj al la aliaj kaj servas la popolon tutkore, sur siaj ordinaraj sed gloraj postenoj.

Jen ni prezentu al vi kelkajn epizodojn en iliaj produktaj laboroj kaj ĉiutaga vivo.

LERNIGO DE SPERTOJ

Vang Ĉonglun estas fama antaŭiranta laboristo en produktado de nia lando, kaj nun laborejestro de la Ĉefa Maŝinriparejo de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio, la unua ferŝtala bazo de Ĉinio. En marto kaj aprilo ĉijare, li vizitis Ŝanhajon por lerni kiel membro de la delegacio de Liaŭning-provinco. Trifoje en unu monato li iris al la Ŝanhaja Pezmaŝina Fabriko por komuniki sian sperton. Tiu modela ago altiris la atenton de la tuta urbo kaj la laboristoj laŭdis lin pro lia konduto dirante, ke Vang Ĉonglun estas "eminenta en tekniko sed pli eminenta en revolucia spirito".

Iun tagon, Vang vizitis la Ŝanhajan Pezmaŝinan Fabrikon por rigardi la 12000-tunan hidraŭlikan premilon kune kun aliaj delegitoj. La fabrika

Vang Ĉonglun (la tria de maldekstre) komunikas siajn spertojn en la Ŝanhaja Pezmaŝina Fabriko.



estraro petis tiun ĉi landfaman eminentulon en teknika navigado lernigi sian progresintan sperton. Post tri tagoj, kiel dezirate, alvenis Vang kaj liaj kolegoj. Ili venis al unu el la ilmaŝinoj en unu laborejo, ĉe kiu maljuna laboristo estis tornanta akson. Vidinte Vang ĉe sia flanko, tiu ĉi petis, ke li instruu al li sian sperton. Vang diris: "La tranĉilo uzata en tornado de aksoj en nia fabriko estas faritaj de ni mem. La faro de tia ilo estas simpla, ni povas tuj provi." Vang tuj komencis la provfaradon kune kun laboristoj de la ŝanhaja fabriko. Tra provuzado, la laboristoj de tiu fabriko konstatis, ke la nove farita ilo estas facile uzebla kaj ĝia entranĉo povas esti pli granda, kio ebligas ne nur altigi la laborefikon sed ankaŭ ŝpari tranĉilojn. Kaj krome multaj eluzitaj iloj kiujn oni rigardis senutilaj antaŭe, fariĝis reuzeblaj post prilaboro. Jen estas faro vere konforma al la principo konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie.

Iun tagon en la unua tagodeko de aprilo, Vang Ĉonglun sendigis al la Ŝanhaja Pezmaŝina Fabriko du kestojn kun sume 17 iloj de 8 specoj. Li ripete diris: "Ili ne estas kreaĵoj de ni mem, sed parto de la progresintaj tranĉiloj, kies faradon niaj laboristoj lernis de frataj fabrikoj en Ĉangĉun, Harbino, Ŝenjang k. a. Bonvolu uzi prove." Post kelkaj tagoj, alvenis ankaŭ du laboristoj kaj unu teknikisto senditaj de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio. Ĉar tuj post la unua vizito al la fabriko Vang Ĉonglun jam telefonis al sia fabriko, ke ĝi sendu personojn kun instrumentoj al Ŝanhajo. Tuj post sia alveno, la tri kamaradoj ŝanĝe surmetis siajn bluzojn kaj komencis reformi la fornegon

kaj ilojn kune kun laboristoj de la ŝanhaja fabriko. Ili laboris persisteme ĝis profunda nokto.

Antaŭ sia forveturo de Ŝanhajo, Vang Ĉonglun triafoje vizitis la Ŝanhajan Pezmaŝinan Fabrikon por lernigi sian sperton. Informiĝinte pri tio, la tuta fabriko ekbolis. Multaj laboristoj alvenis pli frue ol kutime por rigardi la demonstradon. Iuj laboristoj elmontris siajn sukcesojn en teknika renovigo por peti konsilojn de Vang Ĉonglun. Alvenis por konsultado ankaŭ multaj antaŭirantoj en produktado kaj laboristoj de aliaj fabrikoj. Dum la demonstrado, Vang ripetis la manipuladon fojrefoje por montri al la ĉirkaŭstarantaj rigardantoj ĝis kiam ili ellernis la novan teknikon. Dank' al fervora helpado de Vang kaj la laboristoj el Anŝan, laboristoj de la Ŝanhaja Pezmaŝina Fabriko jam fundamente ellernis la metodon por alfikso de altrapida tranĉklingo. La progresinta sperto kaj nobla spirito de Vang Ĉonglun kaj la laboristoj de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio floris kaj fruktis en la Ŝanhaja Pezmaŝina Fabriko kaj aliaj fabrikoj kaj forte antaŭen puŝis la novan produktan tajdon de tiu urbego.

SAVADO DE BOVOJ



La 31-a de januaro ĉijare estis la antaŭtago de la tradicia Printempa Festo de Ĉinio. La membroj de la Hiegi-a Popolkomunumo en Jiĝeng-gubernio de Giangsu-provinco ĝoje faris preparojn por celebri la festotagon. Por doni al alia bredisto

eblecon hejmeniri kaj ĝui la feston kune kun siaj familianoj, Doŭ Jonghuaj volonte restis kun sia 13-jara filo por zorgado pri la bovoj.

En la nokto, Doŭ ellitiĝis por nutri la bovojn kaj ektuŝis, pro malatentemo, per la flamo de la lampo, la pajlojn pendantajn de la subtegmento. Tuj ekbrulis terura fajro. Haste klopodante ĝin estingi, li kriegis: "Fajro! Fajro! Helpu!" Lia filo Doŭ Joŭĝi surprizite vekigis el profunda dormo kaj tuj leviĝis por helpi la patron estingi la fajron. Sed la fajro fariĝis ĉiam pli furioza.

La bovstalo estis malproksima de la vilaĝo. Estis neeble kuri en la vilaĝon por venigi helpantojn, ĉar tio bezonus tro multe da tempo. Doŭ Jonghuaj kriegis en urĝeco: "Rapidu! Unue elsavu la bovojn!" Doŭ Joŭĝi kaj la patro tuj eltiris la du bovidojn. La aliaj tri bovoj saltadis freneze en la stalo pro la fajro. La knabo glitis

sub la fajrolekatan subtegmento por malligi la brutojn. En tiu momento, fajramaso falis sur lian kapon, dorson... sed spite de akra doloro li klopodis malligi la ŝnurojn tutforte. Li elsavis ankaŭ la trian bovon. Tiam li kaj la patro reŝovis sin en la fajron por elsavi la kvaran. Kiam ili tiris ĝin ekster la pordon, la patro svenis kaj falis teren.

Restis nun sola la knabo. Ankoraŭ unu bovo muĝadis kaj baraktadis en la stalo. En tiu kriza momento, li sin ĵetis ree internen por savi la bovon ne zorgante pri sia vivsekuro. Densa fumo kaj arda fajro devigis lin fermi la okulojn. Li palpe serĉadis kaj finfine, post malfacilaj klopodoj trovis la ŝnuron, kiu ligis la bovon sur paliso. Li pene provis malligi la ŝnuron, sed kiam la nodo estis iom malligita, la bovo baraktanta ĝin streĉis denove! Tiu danĝera ludo ripetiĝis plurfoje ĝis kiam la brava Doŭ Joŭĝi finfine elsavis la kvinan bovon. Nur kiam li vidis, ke komunumanoj alrapidis por estingi la fajron, li kuris hejmen kun akra doloro.

Funkciuloj kaj la partia sekretario de la popola komunumo venis en lian hejmon por lin vidi kaj venigis kuraciston por urĝa medicina helpo al la patro kaj filo. Venis ilin vidi ankaŭ komunumanoj unuj post aliaj. Informiĝinte pri la okazaĵo, la gubernia partia komitato de Jiĝeng tuj alsendis medicinajn laborantojn, kaj en la sekvanta mateno, ankaŭ la Nordgiangsu-a Popola Hospitalo en Jangĝoŭ alsendis ambulancan aŭton por porti ilin en la hospitalon. Dank' al zorga kuracado kaj flegado, nun Doŭ Jonghuaj kaj lia filo Doŭ Joŭĝi jam tute resaniĝis.

ĜOJO EN HELPO AL ALIAJ

La 2-an de majo, ĉijare, en Sanjuan-gastejo de Pekino, juna gasto el Tajjuan, la ĉefurbo de Ŝanhiprovinco, renkontis la kelneron Ĝaŭ Guangde, varme lin venigis en sian ĉambron kiel longe nevidita malnova amiko kaj diris al li ekscitite:


"Ĝaŭĉjo, nun mi denove eklaboras sur posteno por la socialisma konstruado! Mi ŝuldas al vi multajn dankojn pro viaj zorgo kaj helpado al mi!" Kial li estis tiel danka al la kelnero? Estas necese rakonti la okazintaĵon antaŭ du jaroj por komprenigi vin.

En la somero de 1963, iu gasto kun unu kruro en gipsobandaĝo venis al la gastejo per triciklo, kaj Ĝaŭ Guangde tuj varme lin akceptis kaj helpis. Zorgeme li prenis la gaston de sur la veturilo kaj lin portis surdorse en litoĉambron paŝetante. Li komforte kuŝigis la gaston, ordigis por li la litajn kvazaŭ servanta al sia proksimulo, por ke la gasto sentu varmon en la gastejo kvazaŭ en sia propra hejmo.

La juna gasto nomiĝis Hie Ju. Li estis hejtisto en la maŝinsekcio de la Tajjuan-a Fervoja Oficejo. Pasintjare, li rompis al si femuroston dum laboro kaj estis sendita al Pekino por ricevi kuracadon je la kosto de la ŝtato. Post rekunigo de la ostoj, li devis ripozi por kelka tempo kaj tial li transloĝiĝis en la gastejon apud la hospitalo. Dum lia restado en la gastejo, estis tre malfacile por li piediri, kaj Ĝaŭ Guangde portadis lin surdorse kiam li volis iri al necesejo, portadis trifoje ĉiutage la manĝaĵojn antaŭ lian liton kaj helpis lin dum la manĝado.

Kvankam Ĝaŭ ĉiamaniere lin helpis kaj prizorgis, tamen li estis malgaja kaj parolis tre malmulte. Tio vekis atenton de la kamarado kelnero, sed la lasta ne sciis kia ĉagreno lin mordis. Foje en interparolo Hie Ju malkaŝis al li sian sekreton, dirante: “Ĝaŭĉjo, vidu, mi estas tiel juna, sed kun rompita kruro. Se mi fariĝos kriplulo, kiel mi povos ankoraŭ labori?” La parolo komprenigis al Ĝaŭ, ke la junulo ĉagreniĝis pro sia malespero pri la estonteco! Li pensis: “La gastoj forlasis sian hejmon kaj havas neniun parencon apude, do ni kelnero devas ilin zorgi kiel parencoj kaj ilin helpi en solvo de ĉiaj malfaciloj.” Por helpi sian gaston Hie Ju liberiĝi de la malĝojo, Ĝaŭ speciale rakontis al li historiojn de herooj kaj modeluloj krom akompanado al li en ŝakludo kaj babilado. Foje kaj refoje li menciis la heroaĵojn de Hju Hjuehuj. Tiu ĉi junulino de la nova Ĉinio luktis kontraŭ reakciaj banditoj por protekti ŝtatan proprajn, kaj ŝiaj ambaŭ manoj estis forhakitaj de ili. Kvankam ŝi perdis la manojn, tamen ŝi neniom deprimiĝis. Kiam ŝi ricevis poste artefaritajn manojn, ŝi ellernis skribi kaj labori per ili, venkinte multajn malfacilojn per sia malcedemo, kaj finfine denove sin envicigis inter la konstruantojn

Ĝaŭ Guangde fervore servas la gaston.



de socialismo. La heroaĵoj rakontitaj de Ĝaŭ tiel profunde kortuŝis kaj kuraĝigis Hie Ju, ke li firme decidis lerni de Hju Hjuehuj, ne submetiĝi al la malsano kaj klopodi esti utila al la socialisma konstruado. Kaj de tiam li ne plu ĉagreniĝis.

Post nelonge, la kruro de Hie komencis resaniĝi iom post iom. Kiam li forlasis Sanjuan-gastejon por reiri al sia posteno, li forte premis la manojn de Ĝaŭ Guangde kaj diris serioze: “Ĝaŭĉjo, mi nepre memoros viajn vortojn kaj klopodos resanigi min pli rapide por bone fari miajn laborojn.”

Ĉijare, Hie Ju venis al Pekino pro laboro. Lia vundita kruro jam ne malhelpis lin. Nun li faras sindikatajn laborojn en sia organizaĵo. Kiel li povis forgesi la tagojn, dum kiuj li kuŝis en la gastejo kaj ricevis tiom da helpoj kaj zorgoj de Ĝaŭ Guangde? Je sia renkontiĝo, la koroj de la du intimaj amikoj ja pleniĝis de varmaj sentoj neesprimeblaj per lingvo.

PRIZORGI MALJUNULON


En la Ĉangĝoŭ-a Popolkomunumo de Fengŝan-gubernio en la Guanghia Ĝuangnacia Aŭtonoma Regiono estas 22-jara knabino nomata Huang Mejhiu. Ŝi estas ĝuang-naciano, tre elstara en produktaj laboroj. La 21-an de junio, 1963, ŝi transloĝiĝis en la domon de Huang Henghjun por prizorgadi la vivon de tiu 81-jara revolucia maljunulo komisiite de la kolektivo.

En la pasinteco, Huang Henghjun estis ano de la ruĝa gvardio dum la agrara revolucio en Joŭgjang, kaj ŝvitis kaj sangis tiam pro la revolucio. Liaj familianoj estis ĉiuj mortigitaj de la kuomintang-reakciularo. Post la Liberiĝo, la Komunista Partio kaj la Popola Registaro donis bonan zorgon pri la vivo de la maljunulo, la komunumaj kadroj kaj vilaĝaj milicanoj ofte venis al li por helpi lin per kolektado de brulligno, senŝeligo de rizo, portado de akvo, lavado de vestoj k. t. p. La avo sentis koran dankon pro ĉio ĉi. Post kiam la gejunuloj en la vilaĝo lernis la artikolon *Servu la Popolon* de Prezidanto Maŭ, ili pensis, ke tia aĝulo kia avo Huang, eble povos vivi pli bone, se li havos specialan prizorgadon. Kaj ili diskutis pri tio.

Huang Mejhiu estas knabino neparolema, sed pensema kaj serioza en laboro. Ankaŭ ŝi pripensis tion kaj decidis mem iri al la maljunulo por lin prizorgadi.

Post nelonge, Mejhiu vere transloĝiĝis en la domon de la maljunulo. Ŝi ne nur preparadas por li manĝaĵojn kaj zorgas pri lia ripozo, sed ankaŭ lavas por li la vestojn kaj faras por li ŝuojn, lin traktante kiel sian propran patron aŭ avon.

Iun tagon en aŭgusto, la maljunulo subite estis kaptita de sia malnova malsano kaj forte tusadis.



Huang Mejhiu interparolas kun la revolucia veterano Huang Henghjun.

Mejhiu tre maltrankviliĝis pro li kaj ne povis dormi nokte en la lito kaj ŝi tuj leviĝis ĉe tusado de la maljunulo. La avo diris al ŝi, ke ia drogoherbo povas lin resanigi. La sekvantan tagon, ŝi piediris dekkelkajn liojn por akiri tian drogoherbon kaj dekoktis por li. Preninte la medikamenton, la maljunulo efektive resaniĝis.

Pasis jam du jaroj post kiam Huang Mejhiu transloĝiĝis en la domon de la maljunulo. Ŝi lin prizorgas tage kaj nokte kaj bone pensas por lin helpi laŭbezone. Ŝia fervora servado al la revolucia maljunulo disfamiĝis tra Fengŝan-gubernio kiel laŭdinda afero.

REKUNIĜO DE PATRINO KAJ FILO

Iutage en junio de la pasinta jaro, la policejo de Vensu-gubernio de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono ricevis leteron de iu ujgura soldato nomata Tunijaz el la popola trupo de publika sekuro en Kinghaj-provinco. En la letero li skribis: “En julio de 1948, kiam mi estis sesjara, kuomintang-a banditaro tretis mian hejmlokon ĉ.

30 km. nordokcidente de la urbeto Vensu kaj disigis miajn familianojn. Ĝis nun mi ne scias, kie estas mia kara patrino. Mi scias nur tion, ke ŝia nomo estas Patamuhan. Helpu min trovi mian patrinojn, mi petas.....”

Kiel disiĝis la patrino kaj la filo? Tio okazis jene: La patro de Tunijaz estis forkaptita de kuomintang-a trupo kaj devigita paŝtadi ŝafojn por ĝi. La etulo dujara iris kun la patro kaj multe suferis de ĝiaj turmentoj. Tiam la kuomintang-a trupo migradis de loko al loko, kaj ili devis ĝin sekvi. Kaj post multfoja translokiĝo Tunijaz ne plu povis retrovi sian patrinojn.

En la aŭtuno de 1949, revolucie ribelis la trupo, en kiu servis la patro de Tunijaz. Tuj poste, ĝi estis reorganizita de la popola registaro. Sed tiam la patro de Tunijaz mortis pro malsano. La revolucia trupo akceptis Tunijaz kaj sendis lin en lernejon. En 1962 li aliĝis al la trupo de publika sekuro.

Post kiam la policejo ricevis tiun leteron, ĝia estro Di Ĝiŝen komisiis la taskon de patrino-serĉado al la civilaj policistoj Jansenbahti kaj Mamatini Jaz Abra.

Tuj en la sekvanta tago, la du policianoj iris al la nordokcidenta distrikto de Vensu-gubernio kaj vizitis ĉiujn produktajn brigadojn kune kun lokaj kadroj. Ili petis informojn de unu familio post alia kaj preterlasis neniun gvidan signon. Dum pli ol unu monato, ili vizitis sume 9 produktajn brigadojn kaj 1200 familiojn, pridemandis sen-nombrajn preterpasantojn kaj iris al la domoj de pli ol 40 personoj kun la sama nomo de Patamuhan por identigo, sed montriĝis, ke neniuj el ili estas la patrino de Tunijaz. La du senditoj iom senesperigis.

Meze de julio, ili revenis al la policejo en Vensu, kaj ricevis alian leteron de Tunijaz. Li skribis interalie: “La malnova socio devigis nin disiĝi de la patrino, sed mi kredas ke en la nova socio sub la gvido de la Komunista Partio ni rekuniĝos finfine dank’ al via helpo!” Legante la leteron kaj pensante la doloron de la patrino-perdinto, la du policistoj tre ekscitiĝis. En iliaj kapoj aperis la vortoj de Lej Feng*: “Mi opinias ke oni devas vivi por ke la aliaj povu vivi pli feliĉe.” Instigate de la spirito de Lej Feng, ili decidis nepre trovi la patrinojn de Tunijaz, nepre konfirmi, ĉu ŝi ankoraŭ vivas aŭ ne.

La 16-an de julio, ili denove iris en la vilaĝojn. Ĉifoje ili petis helpon de pli ol 200 sekurigaj laborantoj de la bazaj organizoj kaj plivastigis la sferon de serĉado. Dank’ al ilia streĉa klopodado, finfine je la 18-a de aŭgusto la patrino de Tunijaz estis retrovita en Langan-brigado de Tumuŝiuk-komunumo.

* Legu la artikolon pri Lej Feng sur p. 296.

Lej Feng — Bona Servanto de la Popolo

LERNI de Lej Feng en ĉiuj aferoj jam fariĝis ĉies moro en Ĉinio. La brilaj faroj de Lej Feng servas kiel vivaj ekzemploj por eduki la junan generacion kaj la heroa figuro de Lej Feng jam fariĝis ĉies modelo respektinda kaj lerninda.

Kia homo do li estas? Pro kio li ricevas tian respekton de la popolo en la tuta lando kaj fariĝis ĉies imitinda ekzemplo?

Li estis ŝoforo kaj kaporalo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Kiel revolucia batalanto, li havis firman klasan starpunkton, fortan amon al la klasfrazoj kaj fortan malamon al la klasaj malamikoj, kaj neniam forgesis, ke du trionoj de la tutmonda popolo ankoraŭ vivas mizere kaj dolore. Kiel revolucia batalanto, li ankaŭ enkorpigis la revolucion spiriton de la epoko per sia praktika agado. Dum sia mallonga vivo, li faris multe da bonoj. Fervore li strebis por la komunaj intereso kaj ĝojis helpi al aliaj; li estis neniom egoisma kaj arde amis la kolektivon; li prenis por si la malfacilojn por ke la koncernatoj ĝuu facilajn; kaj li tutkore helpis aliajn en iliaj malfaciloj kaj tute ne deziris dankon de ili — multe da bonoj li faris dum sia vivo, sed li neniam diris sian nomon al la helpatoj. En la landoj, kie plagas ekspluatado, subpremado kaj rasa malegaleco, egoisma profitĉasado, spekulado kaj malestimo kaj malamo al la laborantaj popolanoj, por la burĝaro, kies kapo plenas de tiaj pensoj, kiaj “homojn kiuj ne estas egoismaj pereigas la naturo” kaj “la homoj estas egoismaj vivestajoj”, tia homo kia Lej Feng estas tute neimagebla. Sed en la nova Ĉinio, Lej Feng efektivigis per sia agado dum la tuta vivo la novtipan interrilaton inter la homoj en socialisma socio.



Lej Feng konigas sian sperton pri sekura veturado kaj ŝparado de oleo al siaj kamaradoj.

Dum la movado "lernu de Lej Feng" disvastiĝis tra la lando, la estraro de la Ŝenjang-a Trupo transdonis surskribon de Prezidanto Maŭ al la roto, en kiu kunvivis Lej Feng.



Ĉu la nobla karaktero de Lej Feng formiĝis hazarde? Tute ne.

Lej Feng naskiĝis en familio de malriĉa kamparano. De sia infanaĝo li multe suferis sub la subpremado kaj ekspluatado de feŭdaj bienuloj kaj reakciuloj. Tragika estis la sorto de lia familio. Li fariĝis senhela orfo en sia sepjara aĝo. Ĝuste en la momento, kiam li baraktis ĉe la limo de vivo kaj morto, la ĉeftero de Ĉinio liberiĝis, kaj li, same kiel la aliaj orfoj mizeraj, estis savita. Kaj post finlerno de sia kurso en supera elementa lernejo li suriris laborpostenon.

Dank' al edukado de la Kompartio, la klas-konscio de Lej Feng rapide altiĝis. Li komprenis,

ke la tragedio de lia familio estis kaŭzita de la malnova soci-sistemo. Depost kiam li partoprenis laboron, li pene lernadis verkojn de Prezidanto Maŭ Zedong, elĉerpis forton el ili kaj ekkonis la veran signifon de la homa vivo. Li skribis en sia taglibro: "Trastudinte la kvar volumojn de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* mi eksciis kiel kaj por kiu vivi, tio ĉi estas la plej profunda instruo ricevita de mi.....Mi sentas, ke mia vivtenado estas por ke aliaj povu vivi pli bone." Tio ja estas spirito de tutkora servado al la popolo.

Lej Feng vivis nur 22 jarojn kaj oferis sian vivon sur sia posteno. Sed lia spirito kaj moralo estas pli kaj pli disvolviĝanta en la juna generacio de Ĉinio.



Estante eksterlerneja gvidanto de junaj pioniroj, Lej Feng fervore rakontas al siaj prizorgatoj pri la revolucia tradicio.

El la Taglibro de Lej Feng

Por la kamaradoj estu varma kiel printempo,

Al la laboroj estu arda kiel somero,

Kontraŭ individuismo estu senkompata kiel aŭtuna vento al la velkintaj folioj,

Kontraŭ la malamikoj estu severa kaj senkompate kiel frosta vintro.

* * *

Eterne bela estas la juneco, sed la vera juneco apartenas nur al tiuj, kiuj ĉiam strebas antaŭen, al tiuj, kiuj ĉiam laboregas sin-forgese, al tiuj, kiuj estas ĉiam modestaj!

* * *

Mi opinias, ke vera revoluciulo devas esti senegoisma; ĉio, kion li faras, devas esti utila al la popolo; kaj lia respondeco estas senlima...

* * *

Komunisto estas servanto de la popolo. Li devas rigardi la malfacilojn de la aliaj kiel siajn proprajn malfacilojn kaj la ĝojon de la kamaradoj kiel sian feliĉon.

* * *

Unu guto da akvo neniam elĉerpiĝos, nur post kiam ĝi sin donas en la grandan maron; la individuoj fariĝas fortegaj nur post kiam ili sin ligas al la kolektiva afero.

* * *

Mi volas esti pino kreskanta inter rokoj sur alta monto, sed ne saliko apud lago aŭ rivero.

Mi volas esti hardita en ŝtormo, en peniga luktado, sed ne volas pasigi la tutan vivon en trankvilo.

* * *

Lerninte la verkojn de Prezidanto Maŭ, mi ekkomprenis multajn aferojn kaj miaj pensoj klariĝis. Ju pli multe mi laboras, des pli energia mi fariĝas. Mi sentas, ke mia energio estas neniam elĉerpebla.

* * *

Mi opinias, ke plej feliĉaj en la mondo estas tiuj, kiuj dum sia vivo laboras diligente, penegas por prospero, kreadas riĉaĵojn per siaj propraj manoj kaj oferas ĉion de si mem por la liberigo de la homaro, por komunismo.

* * *

Por la libero, emancipo kaj feliĉo de la tuta homaro, mi timas neniajn altajn montojn, grandan maron kaj riveregojn. Por la afero de la Kompartio kaj la popolo, mi estas volonta eĉ eniri maron de fajro kaj suriri monton de glavoj. La kapo povas esti forbakita, la ostoj pulvorigitaj, sed mia koro ĉiam restos senŝanĝe ruĝa.

* * *

Mi vivas por nur unu celo, t. e. esti homo utila al la popolo.

* KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *



ŜPINTEKSAJ EKIPAĴOJ

Nun Ĉinio jam povas fari pli ol mil specojn de ŝpinteksaj maŝinoj. Ĝi povas provizi per kompletaj ekipaĵoj por ŝpinado, teksado, trikadado kaj prestinkturado de kotono, lano, kanabo kaj silko kaj por produkto de viskozaj fibroj. Ankaŭ ekipaĵojn por produkto de iuj specoj de sintezaj fibroj ĝi povas liveri en kompleto.

NOVA PROCEDO POR PRODUKTI KEMISTERKON

Nova procedo por produkti kemisterkon proponitan de la fama ĉina kemiisto Hoŭ Debang kaj aliaj jam rikoltis sukceson en la Kemisterka Fabriko de Danjang, Giangsu-provinco. Tiu ĉi nova procedo estas pli simpla kompare kun la tradicia en produktado de sinteza amoniako, kaj oni bezonas malpli multe da materialo, ekipaĵoj kaj tempo por konstruo de fabriko produktanta laŭ la nova procedo, la investa sumo povas esti reduktita ĉ. duone, kaj

dum la funkciado malpli multe da kruda materialo kaj movoforto konsumiĝas.

ELEKTRONA MIKROSKOPO DUCENTMILOBLA

Ducentmilobla granda elektrona mikroskopo estas sukcese farita de la Ŝanhaja Esploro de Elektronoptika Tekniko. Tiu ĉi mikroskopo ne nur havas la kapablon pligrandigi ion ducentmiloble, sed ankaŭ povas distingi la longecon de centmiliono de la diametro de haro.

ŜTATA AGROKULTUREJO ĈE GOBIA DEZERTO

EN la nova Ĉinio oni povas trovi sennombrajn ekzemplojn pri starigo de ŝtataj agrokulturejoj en senhomaj dezertejoj kaj sovaĝaj montaroj. Ĉi tie ni konigu al vi sole la ŝtatan agrokulturejon "Ruĝa Stelo".

NOVA FIZIONOMIO DE GOBIO

Malferminte mapon de Ĉinio, eldonitan antaŭ 1949, oni povas trovi dezertan regionon je la 43-a grado de norda latitudo kaj la 93-a grado de orienta longitudo. Ĝi estas la fame konata alkala distrikto de Huoŝikjuan (Fonto de Fajrstonoj) en Hingiang kaj nun la sidejo de la Dua Filio de la ŝtata agrokulturejo "Ruĝa Stelo". Norde de ĝi estas la seninterrompa Tianŝan-montaro kaj sude estas Gobi-dezerto, kie sablo ruliĝe flugas. Antaŭ la Liberiĝo, ĉi tie, en la areo de dekoj da kvadrataj kilometroj sin trovis nek vilaĝo nek arbo. En kvieta vetero, la sabloblankaĵo etendiĝis ĝis la horizonto; kaj kiam vento ekblovis, tuj blankiĝis ankaŭ la ĉielo. Nur komercistoj de salo okaze venis ĉi tien, pelante kelkajn malgrasajn kamelojn.

Dek du jaroj forpasis. La fizionomio de Huoŝikjuan dume radikale ŝanĝiĝis. Reveninte ĉi tien,

la iam vizitintaj salo-vendistoj ekmiras antaŭ la nereconebla loko.

Nun ĉi tie etendiĝas senlima kamparo. Dikaj grenplantoj kreskas en la ebenaj oblongaj kampoj; poplaj forstozonoj verdverdas en longaj vicoj; gregoj de bovoj kaj ĉevaloj sin paŝtas sur la herbejoj en la arbaroj; reto de vojoj interligas la loĝpunktojn kaj la belajn kampojn; traktora bruo resonadas en la vasta stepo.

ALKONDUKI AKVON

En 1952, trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo venis al Huoŝikjuan. La armeanoj brave decidis starigi ĉi tie agrokulturejon por ŝanĝi en belan kamparon la salalkalan dezerton dormintan je miloj kaj dekmiloj da jaroj. Veninte en Huoŝikjuan, ili kvazaŭ falis en grandan fornnon. La suno ardis supre kaj la varmega tero bruldolorigis la piedojn. Ili terure soifis, sed eĉ guton da akvo ne povis trovi.

Sen akvo oni ne povas vivi, por ne paroli jam pri kulturado de kampoj. Sed tiam akvo troviĝis nur en la fora Tianŝan-montaro.

Gvidantoj kaj teknikistoj de la ŝtata agrokulturejo planas por transformi la salalkalan kampon.



Por alkonduki akvon, la armeanoj grimpis sur krutajojn de Tianŝan-montaro kaj per tio komencis la batalon por starigo de agrokulturejo. Ili ligis sin per ŝnuro je la zono kaj pendigis sin sur la krutajoj por bori truojn kaj enmeti dinamiton. Per eksplodigoj ili estigis kanalon en la montĉeno. Ĉar neniam veturilo estis uzbla ĉi tie por transportado, la armeanoj portis ŝtonojn al la konstruejoj de la kanalo, pecon post peco per siaj manoj, ŝultroj kaj

dorso, kaj obstine persistis en la konstruado spite al la frostego kaj maldenseco de la aero en la alta montaro. Kun tia entuziasmo, ili transportis oni ne scias kiom da kubmetroj da ŝtonoj kaj elfosis oni ne scias kiom da kubmetroj da tero, kaj finfine, en la printempo de 1953, je 10 monatoj antaŭdate, finkonstruis la kanalon 34-kilometran, kiu kondukas akvon el la montaro en la soifegan Huoŝikjuan.

Erpado por preventi alkaleciĝon kaj protekti la plantidojn.



Ili fosas kanaleton por forlavi alkalajon de la kampoj.



FORLAVI ALKALAJON KAJ KREI KAMPOJN

Kia estas la tero de tiu ĉi loko? Sub la alkala supraĵo dika je pli ol unu futo, sin sternas senranda kaj senfenda tavolo de mirabilo duonfuton dika, tiel solida kiel roko. El ĉiu muo* oni povas elfosi pli ol 40 tunojn da mirabilo kaj alkalajo. Ĉu oni povas transformi tian teron en kultureblan kamparon? Por solvi la demandon, oni konsultis librojn kaj demandis maljunulojn, sed povis ricevi nenan informon pri sperto rilate al tio. La armeanoj sciis, ke oni povas forlavi alkalajon per akvo. Sed tute mankis al ili sperto pri tiu afero kaj ili ne sciis, kiaj kanaletoj taŭgas por forlavi alkalajon. Ili klopodis trovi taŭgan rimedon per kolektiva saĝo, kaj ĉiu donis siajn ideojn kaj proponojn. Iuj rememoris, ke dum la Kontraŭ-japana Rezistmilito oni faris fosajojn por bari aŭtojn de la malamikoj. Ili opiniis, ke oni devas fari ĝuste tiajn fosajojn. Havante nenan sperton en tiu afero, ili povis nur provi. Ili fosis tranĉeon tiel vastan kaj profundan, ke oni povis veturigi ĉaron en ĝi kaj rajdante en ĝi sur ĉevalo oni eĉ ne povas elmontri sian kapon. Sed per tia fosajo oni ne povis forigi la alkalajon kaj la provo malsukcesis. Ili faris sennombrajn provojn kaj finfine sukcesis fosi kanaletojn kaj akiris la duan venkon en la konstruado de la agrokulturejo.

La forlavado komenciĝis. Tre malfacila laboro ĝi estis. Akvo devis esti alkondukita sur la grundon por solvi kaj forigi al-

kalajon sub-teren laŭ la homa volo. Dank' al la trafluo de akvo, parto de la alkalajo povas esti forportita kaj parto portita sub la por-kulturan tertavolon. La armeanoj kondukadis akvon en la kampojn dum la tuta tago, tamen la akvo ne kovris ilin — oni ne atendis, ke multego da mus-truoj englutis la akvon. En la nokto, la batalantoj estis vekitaj el siaj sonĝoj per la alarmo, ke la kampeĝoj disfalis. Ili kuris en la kampojn kun siaj lanaj kaj vatitaj litkovriloj kaj komencis ŝtopi la breĉojn per ili aŭ eĉ per siaj korpoj. Dank' al ilia luktado tra la tuta nokto, la breĉoj estis ŝtopitaj, sed la kampeĝoj jam detruigis plejparte. La okazaĵo donis al la armeanoj gravan lecionon. Ekde tiam, ĉiufoje, kiam akvo enfluis kampon, oni tuj ŝtopis la mustruojn batsolidigante la teron per la piedoj kaj fosiloj. La nigrebruna alkala solvaĵo koroda al la homa haŭto estigis multajn sangajn krevajojn en la kruoj de la konstruantoj kaj ilin turmentis per juko kaj doloro. Sed ĉi tiuj neniam plendis pro tio, male ili ĉiuj luktis kun granda entuziasmo kaj alta batalspirito. Dum kvar jaroj de 1953 ĝis 1956, ili transformis ĉ. 10,000 muojn da alkala tero en kultureblajn kampojn. Nun ĉi tie jam funkcias ŝtata agrokulturejo kun pli ol 20,000 muoj da tero kaj modernaj ekipaĵoj. La dezerta Huoŝikjuan jam fariĝis bela oazo.

SENĈESA PROGRESO

Por firmigi la atingajojn kaj pliigi la produkton, ĉiuj laborantoj en la agrokulturejo, de la estro kaj politika komisaro ĝis la soldatoj, senescepte lernas sciencojn kaj resumas siajn praktikajn spertojn. En la batalo por reformi la naturon, la batalantoj inventis specialan agrokulturilon nomatan erpilo kontraŭalkala, kaj akiris krome la sperton de kombina uzado de erpado, balaado kaj forlavado por forigi alkalajon kaj sukcese reformis la "kalvajn kampojn". En 1957, la produktokvanto de la agrokulturejo impete pliigis, kaj ĝi komencis tiujare liveri var-grenon al la ŝtato.

Por gajni altan produkton, pli da sterko estas bezonata, kaj stalsterko kaj herbosterko havas riĉajn organikaĵojn por efike plibonigi la grundon. Sekve, oni kondukis kampanjon por prepari kaj kolekti sterkon tra la tuta agrokulturejo kaj samtempe bredis grandan nombron da brutoj por ke la bredado kaj agrokulturo akcelu unu la alian. Ju pli da brutoj, des pli da sterko. Nun ĉiu muo da tero povas akiri 1,500 kilogramojn da sterko. El la




Nova forstozono de la agrokulturejo!

17,000 muoj da agro, 10,000 muoj jam reformiĝis en stabile altproduktajn kampojn. En 1957, la totala produktokvanto de greno kreskis ĝis pli ol 2,000,000 kilogramoj, kaj la po-mua produkto atingis 191.5 kilogramojn. En 1964 la loko suferis pluvegon, kia ne okazis en la lastaj dekelkaj jaroj, kaj maloftan varman ventegon, kiu daŭre blovis dum kvin sinsekvaj tagonoktoj, la agrokulturejo tamen sukcese eltenis la rigoran provon kaj gajnis bonan rikolton. Nun, tiu ĉi agrokulturejo starigita sur la vasta Gobi-dezerto jam havas sian firman bazon, kaj povas certe akiri relative bonan rikolton eĉ kiam okazas naturaj katastrofoj. Ĝi estas kreanta grandan nombron da riĉaĵoj por la ŝtato.

La batalantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, armitaj per la penso de Maŭ Zedong kaj trapasintaj rigorajn militajn provojn, ankaŭ povas krei miraklon en la lukto kontraŭ la naturo, reformi la dezerton de Gobio en oazon.

Tiu ĉi ruĝa flago starigita ĉe Huoŝikjuan ĉiam flirtos en venko!



Laboristoj muntas ĵig-bormaŝinon.

FABRIKO POR KREI AMIKECON

En iuj fabrikoj de 17 landoj en Azio, Afriko kaj Latinameriko, oni povas vidi, interalie, krank-rabotmaŝinojn kaj precizajn ĵig-bormaŝinojn kun komerca marko de la Dua Ilmaŝina Fabriko de Pekino.

Tiu ĉi moderna fabriko situas en la suda antaŭurbo de Pekino. Ekde 1958 ĝis la marto de 1965, ĝi eksportis 344 ilmaŝinojn, kiaj supre menciitaj. Tiuj ekipaĵoj servas en la produktado kaj konstruado de diversaj landoj kun la amikeco de la ĉina popolo kaj funkciante sub la zorgado de laboristoj en niaj frataj kaj amikaj landoj kreas amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latinameriko.

LA HIERAŬO DE LA FABRIKO

Karaj geamikoj, ĉu vi povas imagi al vi, kia estis tiu fabriko en la pasinteco?

Antaŭ la Liberiĝo de Ĉinio, tiu fabriko estis riparejo de armiloj uzataj de kuomintang-aj trupoj por kontraŭbatali komunismon kaj la popolon. Same kiel sia mastro — la reakcia reĝimo, la riparejo estis en disfala kadukeco. Ĝia plankareo kovris nur 7 mil kvadratajn metrojn kaj ĝia sola laborejo el lignaj tabuloj estis polvoplena dum vento kaj kotplena dum pluvo. Instaligis tie nur iom pli ol 30 eluzitaj rimenmovataj ilmaŝinoj el fremdaj

PENG GJUN:

LA DUA FABRIKO

landoj. Per tiuj maŝinaĉoj almozdonitaj de imperiismo, la kuomintang-a reakciularo fabrikis pafilojn por amase buĉi la ĉinan popolon.

Post la liberiĝo de Pekino, tiu ĉi fabriko ricevis novan vivon. Sub la gvido de la Partio, la laboristoj konstruis, unu post alia, novajn laborejojn kaj ekipis ilin per diversaj precizaj modernaj ilmaŝinoj transformante la pafil-riparejon uzitan de la kuomintang-a reakciularo por subpremado al la revolucia popolo en fabrikon de modernaj precizaj ilmaŝinoj, kiu servas al la socialisma konstruado.

NASKIĜO DE LA UNUA KRANK-RABOTMAŜINO

Post la Liberiĝo de nia lando, la usona imperiismo ekonomie blokadas la novan Ĉinion, revante malebligi al ĝi grandpaŝan antaŭenmarŝon.

En 1953, la Popola Registaro asignis al tiu fabriko la taskon fari krank-rabotmaŝinojn. Tiu-tempe, la laboristoj de la fabriko ankoraŭ neniam produktis tiom grandajn ilmaŝinojn. Ja estis nefacile por ili plenumi la taskon per la simplaj kaj kadukaj ekipaĵoj de la fabriko.

Sed la laboristoj ne deprimiĝis antaŭ la malfaciloj. Ili garantiis al la partia organizo, ke ili, laboristoj de la nova Ĉinio, cedos al neniam malfacilo, sed firme ĉiajn malfacilojn venkos sin apogante sur siaj propraj fortoj kaj komplete frakasos la blokadon de la usona imperiismo. Kaj per tio ektondris la bataltamburo por produkto de krank-rabotmaŝinoj.

Kun malcedema revolucia spirito, la laboristoj kaj teknikistoj tuj sin ĵetis en la batalon por provfari la maŝinon per riparo kaj reformo de la malnovaj ekipaĵoj. Ili venkis unu malfacilon post alia dum la laborado. Iuj partoj de la provfarata 2-tuna krank-rabotmaŝino estis sufiĉe pezaj kaj ne-

ILMAŜINA DE PEKINO


facile munteblaj pro manko de pezlevilo en la laborejo. La laboristoj sin helpis per cerbumado kaj trovis taŭgan indiĝenan metodon por solvi la problemon. Ne havante taŭgan ekipaĵon, la laboristoj ne povis fari tratuojn kun postulata precizeco. Ili mem elfaris taŭgan bormaŝinon kaj solvis la problemon. Dum la provfabrikado, la laboristoj luktis tage kaj nokte en la laborejo, kaj iuj ĝin ne forlasis eĉ post sia deĵoro, por labori plue kune kun la sekvaj deĵorantoj. “Por persistema viro, ne estas malfacilo” — la unua krank-rabotmaŝino naskiĝis finfine.

Tiu ĉi fakto montris, ke la ekonomia blokado fare de la usona imperiismo al la nova Ĉinio certe povas esti komplete frakasita. La laboristoj de la Dua Ilmaŝina Fabriko de Pekino produktis grandan nombron da krank-rabotmaŝinoj, per kiuj ili subtenis ne nur la socialisman konstruadon de sia patrolando sed ankaŭ la produktadon kaj konstruadon de multaj landoj en Azio, Afriko kaj Latinameriko.

AL PLI ALTA NIVELO

En 1958, leviĝis en Ĉinio alta tajdo de industria produktado.

Sub la gvido de la Partio, la laboristoj de la fabriko sukcesis provfari cilindran frotuman maŝinon en la spirito de sinapogo sur siaj propraj fortoj kaj strebado al prosperiĝo, kaj tuj post tio ili sin ĵetis en batalon por provfabriko de pli preciza ilmaŝino — jig-bormaŝino. Tiu ĉi estas konata en la mondo kiel “la Reĝo de Ilmaŝinoj”. Ĝiaj partoj devas esti tiel precize faritaj, ke ili ne toleras malĝustajĵon de pli ol 4 mikrometroj, t.e. 4 sepdekonoj de la dikeco de haro. Laŭ la opinio de iuj stultaj kredantoj pri fremdlanda literaturo pri fabrikado de tia ilmaŝino, tiaj maŝinpartoj estis ne-



Provfunckciigo de preciza bormaŝino nove produktita.

produkteblaj en la Dua Ilmaŝina Fabriko de Pekino sub la tiamaj kondiĉoj. Ekzemple, por fabriki tian ilmaŝinon necesas muntejo kun stabila temperaturo de 20 gradoj celsiusaj. Laŭ eksterlanda projekta literaturo, oni bezonas kompresoron de amonia gaso kaj elektran varmigilon por ekipi tian laborejon. Por konstrui tian laborejon oni bezonas multe da mono kaj sufiĉe longan tempon. Tio evidente ne komformas al la principo konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie. La partia organizo de la fabriko alvokis la laboristojn konstrui muntejon de stabila temperaturo per penlaborado sin apogante sur siaj propraj fortoj. Finfine la laboristoj kaj teknikistoj solvis la problemon de aero-reguligo per kombino de moderna kaj indiĝena metodoj, kaj plenumis la konstruan taskon de la muntejo nur en 7 monatoj. Krom tio, la laboristoj kun revolucia fervoro reformis pli ol 50 maŝinpartojn kaj tranĉilojn, faris foj-refojan provadon, venkis multegon da malfaciloj kaj finfine sukcesis elfari precizan jig-bormaŝinon.

PRODUKTIĜIS MAŜINOJ KAJ LERTULOJ

Dum la disvolviĝo de la Ilmaŝina Fabriko, ĝiaj gvidantoj multe zorgis pri elkulturo de lertaj laborantoj. Ĝi fondis postlaboran teknikan mezlernejon, sendis eminentajn laboristojn al altaj lernejoj por studado kaj lernigis al laboristoj teknikon

La Produkto de Ĉiutagaj Vivbezonaĵoj de Tiangin

BIAN GI



PROMENANTE en la bazaro de Kjuanje-domego en trafikoplana kvartalo de Tiangin, mi estis forte impresita de la riĉaj sortimentoj en vitrinoj kaj sur varbretoj.

En ĉiuj etaĝoj de la domego svarmas klientoj. Kun homfluo mi venas al la vendotablo de nilonaj ŝtrumpoj, kie kolektiĝas aro da junulinoj elektantaj kaj aĉetantaj por si ŝtrumpojn. Ĉe la vendotabloj de konfekcioj, ŝuoj kaj ĉapoj en la unua etaĝo kunpremiĝas eĉ pli grandaj svarmoj de klientoj elektantaj diversajn laŭmodajn vestojn kaj aliajn bezonaĵojn laŭ sia gusto.

En la administrejo de la bazaro, mi renkontis la respondeculon de la granda vendejo. Li diris al mi, ke la bazaro konsistas el la naŭ fakoj de trikaĵoj, konfekcioj, ŝuoj kaj kapvestoj, ŝtofoj, skribiloj, aparatoj kaj instrumentoj, metalaĵoj, juvelaĵoj kaj diversaĵoj, en kiuj vendiĝas ĉirkaŭ dudek tri mil specoj de varoj, el kiuj ĉirkaŭ dek kvin mil specoj estas produktaĵoj de Tiangin. Kaj li ankaŭ diris al mi, ke en la lastaj jaroj la specoj de varoj vendataj en la bazaro ĉiam pli multiĝas, ilia kvalito senĉese altiĝas, dum la prezo de multaj varoj malaltiĝis pro reduktiĝo de la produktokosto. En majo de la kuranta jaro, la prezoj de pli ol 2400 specoj de varoj produktitaj de Tiangin sola malaltiĝis kaj tion varme bonvenigas la konsumantoj. Lia parolo vekis en mi deziregon havi pririgardon pri la produktado de ĉiutagaj vivbezonaĵoj de tiu urbo.

PLI RIĈAJ SORTIMENTOJ

En la lasta semajno de majo mi vizitis dekkelkajn fabrikojn de ĉiutagaj vivbezonaĵoj en Tiangin.

En la projektejo de desegnaĵoj de la Dua Fabriko de Emajlaĵoj de Tiangin, kelkaj artistoj estas okupataj per projektado de novaj kaj interesaj desegnoj por tasoj por infanoj. Iu desegnisto

dum produkta praktikado. Dank' al apliko de tiaj rimedoj, ĝi elkulturis grandan nombron da laborantoj kun sciencaj kaj teknikaj scioj kaj praktika sperto en produktado kaj multe fortigis sian teknikistaron. Nun, 11 el ĝiaj 18 inĝenieroj estas laboristo-devenaj kaj kvalifikiĝintaj dank' al edukado de la fabriko mem. Inter ili, inĝeniero Vang Dafang, deveninta el familio de dungita kamparano ne povis viziti lernejon antaŭ la Liberiĝo pro manko de mono, kaj devis eniri fabrikon por metilernado en la aĝo de 14 jaroj. Post la Liberiĝo, la Partio sendis lin en la teknikan mezlernejon kaj

poste en altan lernejon por studado kaj tiel faris lin kompetenta inĝeniero el analfabeto.

La peniga vojo, trairita de la Dua Ilmaŝina Fabriko de Pekino dum sia disvolviĝo de lamanta riparejaĉo al moderna fabriko de precizaj ilmaŝinoj, prezentas al ni miniaturan bildon pri la disvolviĝo kaj fortiĝo de la industria produktado de la nova Ĉinio sub la gvido de la Partio kaj en la spirito de pena strebado kaj sinapogo sur siaj propraj fortoj. Tra la historio de tiu ĉi fabriko oni povas facile vidi la brilan estontecon de la industria produktado de nia lando.

diris al mi, ke dum la unuaj kvin monatoj de la kuranta jaro ili jam projektis kaj fabrikis trinkvazojn kun pli ol cent novaj desegnoj, kiuj rikoltis multajn laŭdojn de la aĉetantoj. La vicdirektoro de la nomita fabriko rakontis al mi historieton pri ilia intima ligo kun la konsumantoj. En la kuranta jaro, la fabriko starigis specialan vendotablon de novaj produktaĵoj en la Tiangin-a Magazeno. La sekretario de la partia filio kaj direktoro de la fabriko iris labori tie kiel vendistoj dum provendado de novaj specoj de produktaĵoj por aŭskulti la opiniojn de la klientoj. Poste, laŭ la opinioj de klientoj, ke la desegnoj sur la trinkvazoj estas monotonaj, ili alvokis la artistojn en la projekta sekcio kaj la laboristojn kaj oficistojn de la fabriko viziti siajn amikojn kaj parencojn por kolekti desegnojn plaĉajn al la popolamasoj. Surbaze de la kolektitaj artaĵoj, ili faris plibonigon kaj kreis aron da novaj specoj de trinkvazoj kun elegantaj desegnoj en brilaj koloroj por kontentigi la konsumantojn.

Kiam mi eniris la muntejon de la Tiangin-a Fabriko de Horloĝoj, mi sentis min vere en mondo de vekhorloĝoj. Sur vicoj da bretoj staris senombraj novtipaj vekhorloĝoj, kaj delikataj kaj elegantaj. En la malnova Ĉinio, la vendokvanto de vekhorloĝoj estis tre malgranda, ĉar la ordinara laborulo ne povis ĝin aĉeti. Sed nun en la nova Ĉinio, ĝi jam fariĝis ĉiutaga bezonaĵo por la vasta laborantaro. La respondeculo de la fabriko sciigis al mi, ke antaŭ du jaroj tiu fabriko produktis nur vekhorloĝon kun du sonoriloj. Sed nun, dank' al klopodo de la laborantoj ĝi produktas jam pli ol tridek specojn de vekhorloĝoj pli bonkvalitaj kaj plaĉaj al la konsumantoj.

POR PLI BONA KVALITO

La kvalito de la ĉiutagaj vivbezonaĵoj produktitaj de la nova Ĉinio ne nur estas laŭdata enlande, sed ankaŭ ĝuas bonan famon en la eksterlanda merkato.

Mi faris viziton ankaŭ al la Ĉunhe-a Ŝtata-Privata Fabriko de Sportiloj de Tiangin, kiu produktas speciale instrumentojn de gimnastiko. Ĝia respondeculo diris al mi, ke la gimnastikaj instrumentoj uzitaj en la Sportkunveno de la Nove Emerĝantaj Fortoj okazinta en 1963 en Djakarta, la ĉefurbo de Indonezio, estis senescepte produktaĵoj de tiu fabriko. La diverslandaj gimnastoj partoprenantaj al la nomita sportkunveno multe laŭdis pri la kvalito de la instrumentoj produktitaj de la fabriko.

Multe da fabrikoj de ĉiutagaj vivbezonaĵoj de Tiangin, same kiel la Ĉunhe-a Fabriko de Gimnastikaj Instrumentoj, strikte observas la direktilon:



Artisto de la Fabriko de Emajlaj Vazoj faras novajn desegnojn kune kun laboristo.

Plej gravas la kvalito en produktado. Ĉiuj fabrikoj havas severan regularon por kontrolo de produktaĵoj kaj la fuŝfaritaj produktaĵoj estas malpermesataj elliveriĝi. Fakte la kvalitaj normoj fiksitaj de multaj fabrikoj ĝenerale superas tiujn, kiujn oni garantias al la konsumantoj. Ekzemple, la Tiangina Fabriko de Horloĝoj garantias al la aĉetantoj, ke ĝiaj vekhorloĝoj povas iradi 24 horojn post ĉiufoja streĝigo de la risorto, sed fakte ili povas iradi 48 horojn laŭ la normo fiksitaj de ĝia kontrola sekcio. Rigore respondi al la konsumantoj, jen estas la grava kaŭzo kial la ĉiutagaj vivbezonaĵoj industrie produktitaj de la nova Ĉinio ĝuas bonfamom en- kaj eksterlande.

KLOPODO POR REDUKTO DE PRODUKTO-KOSTO

Dum la lastaj jaroj, sub la gvidado de la Kompartio, la vastaj amasoj de laboristoj kaj oficistoj de la fabrikoj de ĉiutagaj vivbezonaĵoj de Tiangin levis altan tajdon de konkurso kompari kun, lerni de kaj postkuri ĝis la antaŭirantoj kaj helpi al la postigintoj, energie kondukis teknikajn renovigon kaj revolucion, tiel ke ne nur la kvalito estas plibonigita, sed ankaŭ la produktivo estas



Alia amaso da vekhorloĝoj produktiĝis. Oni zorge ilin kontrolas, por ke neniu malakurata iru el la fabriko.

plialtigita, kio ebligis reduktiĝon de la produktokosto de multaj ĉiutagaj vivbezonaĵoj, sekve de kio ankaŭ la merkata prezo de la produktaĵoj malaltiĝis fojon post fojo favore al la konsumantoj.

Evidenta ekzemplo estas la senĉesa malaltiĝo de la prezo de plastaĵoj, kiuj estas malkaraj, belaj

kaj pli kaj pli vaste uzataj. En Tiangin troviĝas 44 fabrikoj kaj produktaj kooperativoj de plastaĵoj. Por provizi al la konsumantoj grandan kvanton da bonaj kaj malkaraj plastaĵoj, ili aktive prenis rimedojn por plibonigo de produkta administrado kaj ŝparado de materialoj, tiel ke la produktokosto kaj merkata prezo de iliaj produktaĵoj senĉese malpliigis ekde 1961, kaj la prezo de dentbroso sola jam reduktiĝis kvinfoje. En la kuranta jaro, la prezo de plastaĵoj produktitaj en Tiangin malaltiĝis ĝenerale je 7-25%.

Ĝuste pro tio, la vendokvanto de multaj ĉiutagaj vivbezonaĵoj pligrandiĝis jaron post jaro kaj tio siavice akcelis la disvolviĝon de produkto de la fabrikoj. Respondeculo de iu produkta kooperativo de speguloj sciigis al mi, ke en la lastaj du jaroj la vendokvanto de speguloj grandiĝis ĉiujare. En la pasinta jaro, tiu kooperativo produktis sepdek mil dekduojn da diversaj speguloj, sed tio ankoraŭ ne povis kontentigi la bezonon de la merkato. En la kuranta jaro la kooperativo planis produkti naŭdek mil dekduojn kaj daŭre klopodas redukti la produktokoston por provizi al la konsumantoj pli multe da speguloj bonaj kaj malkaraj.

La merkato estas prospera, la produkto de la fabrikoj estas intensa kaj la postuloj de la konsumantoj pri kvanto kaj kvalito de ĉiutagaj vivbezonaĵoj pli kaj pli altiĝas — jen estas mia impresado dum la vizitado.

* KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *



TIBETLINGVA SKRIBOMAŜINO

La Ŝanhaja Fabriko de Kalkulaj kaj Skribaj Maŝinoj projektis kaj fabrikis por la nacimalplimulto de Tibeto skribomaŝinojn tibetlingvajn, kiujn oni jam transportis en Tibeton por uzo de la lokaj popolanoj.

ARTEFARITA RIVERO

En la montaro Tajhang situas la gubernio Linhian, Henan-provinco. La tuta gubernio konsistas el pli ol mil vilaĝoj grandaj kaj malgrandaj, kiuj dislokiĝas en profundaj valoj, kie sentiĝis akra malsufiĉo de akvofontoj. Antaŭ la Liberiĝo, estis nur dekdu mil muoj da irigacia tero en la tuta gubernio. Ekde 1960, la popolo de Linhian jam finkonstruis sur la monto artefaritan riveron pli ol 70 km. longan post kvinjara luk-

tado kontraŭ malfaciloj, sub la gvido de la Kompartio kaj la registaro. La akvo alkondukita el la rivero Ĝanghe sufiĉas por irigacii 470,000 muojn da tero.

FLUORESKA PIGMENTO

Ĉinio sukcese faris novan kemiaĵon de fluoreska pigmento uzata por rapida diagnozo en kuracado. Post prova uzado de pli ol cent esploraj organizoj kaj altaj lernejoj de medicino kaj farmacio kaj kuracaj kaj sanigaj institucioj pruviĝis, ke ĝi povas certigi en tre mallonga tempo, kia malsaniga bakterio kaŭzis la malsanon de la paciento. Kompare kun la metodo de "kulturado de bakterioj" ĝi estas multe pli tempoŝpara.

RIĈA RIKOLTO DE PRINTEMPAJ KOKONOJ

En 1965, estas multaj lokoj en Ĉinio kie oni akiris riĉan rikolton de

printempaj kokonoj. En la ĉefaj produktoregionoj de silkaj kokonoj la provincoj Ĝegiang kaj Giangsu, la totala produktokvanto de printempaj kokonoj pliiĝis unuoble ol tiu de la pasinta jaro. Kaj la kamparanoj en la subprovincoj Venĝoŭ kaj Tajĝoŭ en Ĝegiang-provinco vendis ĉijare duoble pli multe da silkaj kokonoj al la ŝtato ol en la lasta jaro.

DISŜUTI FIŜIDOJN PER AVIADILOJ

Ĉinio aplikas novan metodon en transporto kaj disŝuto de fiŝidoj per aviadiloj. Per tio ne nur plialtiĝis la vivprocento de la fiŝidoj, sed ankaŭ malpliigis la kosto de transporto.

Respondo al "Kies Ĉevalo Pli Malrapidas?": La saĝulo diris: "Interŝanĝu viajn ĉevalojn!"

Gejunuloj en la Montregiono de Liping

KONSTRUU la novan kamparon de la patrio! Kulturu la novajn mont-regionojn de la patrio! Iru al la plejfronto de la agrikultura produkto!” jam fariĝis heroa devizo de la intelektaj gejunuloj de Ĉinio en la lastaj jaroj. Iuj el ili fariĝis kamparanoj en kamparaj popolkomunumoj, aliaj iris al limregionoj kaj partoprenis en ekspluatado de virga tero, triaj iris en montregionojn kaj transformis dezertajn montdeklivojn en prosperajn produktajn bazlokojn. La Terekspluata Mastrumo de Liping-montregiono estas unu el tiaj produktaj bazlokoj.


ENRADIKIĜI EN PROFUNDA MONTARO

La montregiono de Liping situas meze de Dabamontaro ĉe la limo inter Ŝenhi kaj Siĉuan-provincoj. En tiu ĉi montregiono, kiu estas 1,600 metrojn super la marnivelo, etendiĝas ondaj montet-ĉenoj kaj interkruciĝantaj montvaloj. Ĝi estis dornople-na sovaĝejo.

La 20-an de junio, 1962, terekspluata taĉmento el 44 intelektaj gejunuloj gvidata de k-do Ĝoŭ Hu, vic-sekretario de la Hanĝong-subprovinca Komitato de la Komunisma Junulara Ligo, ekiris de Hanĝong al tiu ĉi montregiono.

El tiuj urbaj gejunuloj ĵus finintaj la lernadon en liceoj, la plej aĝaj estis ne pli ol 23-jaraj kaj la plej junaj estis nur 16-jaraj. Ili ne estis harditaj en malfacila vivo. Ja ne simpla afero estis ilin helpi enradikiĝi en la dezerta montregiono kaj starigi por si la revolucionan idealon sin dediĉi al la konstruado de la montregiono.

La partia ĉelo de la Terekspluata Mastrumo serioze konsideris tiun ĉi problemon. En la komenca periodo de la konstruado de la kultivejo, la partia ĉelo jam organizis ilin studi artikolojn de Prezidanto Maŭ, kiaj *La Direkto de la Junulara Movado, Kiel la Malsaĝa Avo Translokigis la Montojn, Memore al N. Bethune*, por ke ili trovu por si modelajn personojn kaj firmigu sian idealon kaj memfidon.



Nun la el-urbaj gejunuloj jam fariĝis pli fortaj kaj pli lertaj en diversaj laboroj de kultivado. Ili iras kun pezaj ŝarĝoj kiel sur ebena vojo.

La gvidantaj kadroj de la mastrumo modele agis en ĉiu afero. Ili gvidis la gejunulojn kultivi virgan teron spite al ĉiaj malfaciloj. Veninte en la montregionon, je la unua tago ili jam diris al la gejunuloj: “Kiel ajn malfacilaj estas la kondiĉoj en la montregiono, ni ĉiam estos kun vi.” Kion ili diris, tion ili faris. Dum la pli ol tri jaroj, ili ĉiam manĝis, loĝis kaj laboris kune kun la gejunuloj.

En la komenco, mankis al ili domoj por loĝi, la kadroj do loĝis kun la gejunuloj kunpremiĝe en kelkaj kadukaj kabanoj. Kiam poste kelkaj loĝejoj estis konstruitaj, la kadroj transloĝigis la gejunulojn en ilin kaj mem restis en la malnovaj kabanoj.

Forlasinte sian hejmon, en la komenco multaj el la gejunuloj estis ne spertaj pri la zorgado de sia vivo. La kadroj do prizorgis ĉiuflanke ilian vivon. Se iuj forpuŝis sian litkovrilon en dormo, la kadroj ilin rekovris por ke ili ne malvarmumiĝu; se iuj

ANTAŬ MALFACILOJ

La sovaĝejoj de Liping-montregiono estis plenkovritaj de herbaĉoj, arbustoj kaj dornaj kreskaĵoj. Por komenci kultivadon, unue oni devis fortranĉi kaj forbruligi tiajn vegetaĵojn. Kiam la batalo komenciĝis, la gejunuloj ĉiuj sin ĵetis al la batalkampoj. Frapate de iliaj falĉiloj, la dornaj branĉoj resaltis kaj vipe batis iliajn vizaĝojn kaj korpojn. Post nelonga laborado, multaj el ili jam havis densajn sangajn pikvundojn sur la vizaĝo kaj korpo. Sed iom post iom ili spertiĝis en la laboro kaj scipovis kiel labori sekure kaj pli efike. Kaj entuziasme laborinte unu monaton ili elkulturis 145 muojn da tero.

Dum la pluvabunda sezono de aŭtuno, la montorentoj terure ŝveliĝis kaj rompis la interligon de la kultivejo kun la ekstera mondo. Tio okazis ekster ilia atendo, kaj cetere la konservataj nutraĵoj de ili ne sufiĉis por la konsumado dum tiom longa pluvabunda sezono. Tamen tio ne timigis ilin. Kiam la nutraĵoj iom post iom malmultiĝis, la terekspluataj pioniroj agis laŭ la brila ekzemplo de klasfrata interamo de la ruĝarmeanoj: uzi plej ŝpare sian porcion, helpi aliajn per sia elŝparaĵo kaj zorgi unue pri la bezonoj de la malsanuloj. Ili kolektis manĝeblajn herbojn kaj miksis tiujn kun nutraĵo por manĝi. Ili diris: "Kiom ajn ni suferas, nia vivo tamen ne estas tiom malfacila kiom tiu de la Ruĝa Armeo dum la 25000-lia Longa Marŝo. Ni ne povis havi ŝancon nin provi en la revoluciaj militoj, tamen ni nepre nin hardos kaj progresigos en la malfacilaj bataloj por la socialisma konstruado." Kaj tiamaniere ili obstine persistis ĝis fine la pluvo ĉesis kaj nutraĵoj estis transportitaj al ili.

Tiujare, apenaŭ komenciĝis la monato novembro, kiam jam ekneĝis en Liping. Ĉu la gejunuloj venintaj de la ebenejo povos elteni la froston sur la altaj montoj? Kvankam la gvidantaj kadroj jam organizis homfortojn por fari kontraŭfrostajn aranĝojn, iuj tamen ankoraŭ timis, ke la "junaj

Cuj Dafang, kuraĝa en lukto kontraŭ malfaciloj.



La sekretario de la particelo (la unua de maldekstre en la fronta vico) prilaboras virgan teron kune kun la junuloj.

el ili malsaniĝis, la kadroj ilin bone flegadis. Kaj en produkta laboro, la kadroj ĉiam donis modelan ekzemplon al ili per sia strebado.

La gejunuloj vidis ĉion ĉi per siaj propraj okuloj kaj sentis varmon en la koro. Ili pensis, ke tiom bone zorgate kaj amate de la Partio kaj la gvidantaj kadroj, ili havas ja nenian motivon por ne bone labori.

La gejunuloj komencis la malfacilan konstruadon de la kultivejo en Paŭping-montvalo laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ, ke "farante ĉion per si mem, oni povas akiri varmajn vestojn kaj abundajn manĝaĵojn". Malhavante loĝejojn, ili mem tion konstruis; malhavante instrumentojn, ili mem tion faris; malhavante kampojn, ili mem kulturis virgan teron. Ili havis firman volon krei novan mondon en la sovaĝa montaro.

Gejunuloj lernas semadon de maizo de la sperta kamarano Liang Ĉengjoŭ.



plantidoj” el la urboj ne povos ĝin elteni. Sed la junaj kultivantoj diris: “Laboro estas la plej bona kontraŭfresta rimedo. Ni profitu la vintran tempon por transporti la sterkon sur la paŝtejo post la monto al nia kultivejo. Per tio ni povos kaj venki la froston kaj fari preparon por la printempa plugado de la sekvonta jaro.”

Sekve ili komencis ardan konkurson de sterkotransportado.

Kaj tiamaniere ili gajnis ankoraŭ unu venkon.

LA NOVAJ HOMOJ EN KONSTRUADO DE LA MONTREGIONO

En la bataloj kontraŭ la naturo kaj en la konkerado de la montoj, la junaj kultivantoj iom post iom havigis al si la pensojn kaj sentojn de la laboranta popolo kaj akiris verajn kapablojn kaj sciojn pri produktado. En la mallonga daŭro de nur tri jaroj, la junaj konstruantoj de la montregiono jam sane plenkreskiĝis.

Kiam la knabo Hie Seng el la Tria Agrokultura Brigado unuafoje laboris surmonte, lia vizaĝo estis iom pikvundita de dornaj branĉoj kaj sangetis.

Li jam ne povis tion elteni kaj estis deprimita. Li opiniis, ke liaj scioj akiritaj el la libroj fariĝas tute senutilaj, kaj ke estas malŝparo de kapabloj por la intelektaj gejunuloj partopreni agrokulturan laboron. Por lin kuraĝigi, liaj kamaradoj varme lin helpis kaj ankaŭ la gvidantaj funkciuloj sincere lin admonis. Nokte, li turniĝadis en la lito kaj ne povis endormiĝi. Li ekmemoris la artikolon *Memore al N. Bethune*. “Estante alilandano,” li pensis, “N. Bethune tiel fervoris al la ĉina revolucio, dum mi, junulo de la nova Ĉinio, tamen estas deprimita de tia eta malfacilo. Kiel tio estas pravigebla?” Ekde tiam li laboras energie kaj elpensis multajn rimedojn por plibonigi instrumentojn kaj plialtigi laborefikon. Poste, demandite pri lia idealo, li ĉiam respondis kun ekscitiĝo: “Mi volas esti ‘barbiro de la terglobo’ dum mia tuta vivo.”

La 22-jara knabino Cuj Dafang estas bone konata en la kultivejo pro tio, ke ŝi ĉiam antaŭiras la aliajn en ĉiu afero. Ŝi trapasis la malfacilojn en la vivo kaj produktado kaj ellernis multajn teknikojn. Bonege ŝi plenumis

En la komenco, la gejunuloj havis nur pajlajn budojn por sin ŝirmi; sed nun finkonstruiĝis tegoltegmentaj domoj unuafoje en la montaro per ilia penlaborado.



la taskojn al ŝi donitajn. En la vintro de 1963, la administracio de la kultivejo asignis al ŝi la taskon fari provon por sekure travintri la bovojn en Paŭping-montvalo.

Kia tasko tio estis? Kiam la pioniroj alvenis al la montregiono, ili aŭdis, ke la vintro en Paŭping-montvalo estas tro malvarma, por ke la bovoj povu sekure pasigi ĝin. En tiu vintro oni do pelis la bovojn al la paŝtejo 15 liojn for de Paŭping. Sed poste, multe da tempo kaj homfortoj oni devis uzi por transporto de la stalsterko amasigita dum la vintro. Tial la administracio de la kultivejo decidis fari tiun provon. Akceptinte la taskon, Cuj Dafang lernis de ĉiuj spertojn pri bovpaŝtado kaj travintrigo de bovoj kaj sistemigis ilin en kelkajn regulojn. Dank' al ŝia zorga flegado, la bovoj sekure pasigis la vintron en la valo kaj la provo sukcesis. En 1964, la brutoj de la tuta kultivejo ne plu iris aliloken por travintri.

Ne nur kelkaj estas tiaj gejunuloj. Liu Jihia, estrino de la brigado de multflanka ekonomio ellernis perbovan plugadon kaj rompis la tian rutinan opinion, ke la virinoj ne povas manipuli plugilon. Tion vidante, iuj maljunaj kamparanoj de tiu loko diris kun admiro: "Brave, brave! Jen eĉ knabino povas plugi! Se niaj komunumaninoj sekvos ŝian ekzemplon, certe bone kreskos niaj grenplantoj!"

Post trijara penega luktado, la junaj konstruantoj de la Terekspluata Mastrumo de Liping-montregiono jam sukcese starigis multamplaksan kultivejon kun grenprodukto sufiĉa por ĝia bezono kiel la starpunkto kaj kun multflanka ekonomia entreprenado kiel la direkto de disvolvado.

Nun la kultivejo jam havas 900 muojn da kulturebligita virga tero kaj 4,000 muojn da paŝtejo. Ĝi ankaŭ forstigis grandan areon per lignodonaj kaj fruktaj arboj kaj plantis drog-vegetaĵojn en 150 muoj da tero. En la pli ol tri jaroj, ĝi rikoltis grandan kvanton da greno, legomoj kaj vegetaĵa oleo. Pli ol 50 tirbrutoj estas naskitaj sub ĝia zorgo. Cetere ĝi ankaŭ konstruis domojn kun 83 ĉambroj, starigis meteorologian stacion kaj hidraŭlikan muelilon.

Ankaŭ ilia vicaro plifortiĝis. La intelektaj gejunuloj jam plimultiĝis ĝis 85 personoj. Nun la kultivejo havas sume 121 personojn, inkluzive de la kadroj kaj laboristoj venintaj de aliaj kultivejoj.

En la daŭro de la tri jaroj, la intelektaj gejunuloj ne nur reformis la sovaĝan montregionon de Liping en prosperan kultivejon, sed ankaŭ remuldis sin en laboremajn konstruantojn de socialismo kun politika konscio kaj organizaj sentoj.

La junaj konstruantoj de la montregiono sin amuzas post streĉa laborado.



La Provizado de Legomoj en Pekino

Vang Fuan — *Vicadministranto de Legomvenda Filio de la
Manĝajkompanio de Pekino*



La aŭtoro (dekstre) en la legom-ĝai

En la 16 jaroj post la liberiĝo de Pekino, la produktado de legomoj en la ĉirkaŭurbo disvolviĝas jaron post jaro. Kvinoble pligrandiĝis la plantareo, pli ol dekoble altiĝis la produkta kvanto, kaj kun tio konstante pliboniĝis la tekniko de kulturado kaj plimultiĝis la specoj. Tio certigas, ke la urbanoj povas akiri freŝajn legomojn en ĉiu sezono de la jaro. Dum la abundeprodukta sezono kvar- ĝis kvin-dek specoj de legomoj estas samtempe liverataj al la merkato.

La grandaj atingoj estas ne apartigeblaj de la zorgado de la partio kaj registaro kaj la subtenado de aliaj entreprenoj; ili estas akiritaj dank' al praktikado de la politiko "disvolvi ekonomion kaj certigi provizadon" kaj "servi al la popola vivo" fare de la komercaj organoj de la nova Ĉinio. Por garantii laŭplanan produktadon de legomoj, ĉiujare ni subskribis kontraktojn pri produkto kaj vendo de legomoj kun la legom-kultivaj komunumoj kaj produktaj brigadoj. En la kontrakto estas difinite: la popolkomunumoj, produktaj brigadoj decidas la kulturatan areon kaj la specojn de legomoj laŭ la bezono de la merkato kaj devas garantii la normalan kvaliton de la produktaĵoj; dum la alia flanko devas aĉeti akurate kaj pagi laŭ raciaj prezoj. Tio plene mobilizis la produktan iniciativon de la legom-kultivistoj kaj ege akcelis la disvolviĝon de la legomproduktado. Por liveri al la urbo diversajn legomojn, dum la pasintaj dekelkaj jaroj la legom-kultivistoj de la ĉirkaŭurbo enkondukis multe da specoj el aliaj lokoj, krom pligrandigi la produktokvanton. Ekzemple, la zizano kiu kreskas en la suda parto de la lando kaj la zingibro el la provinco Ŝandong post transplantado jam "fiksloĝiĝis" en Pekino. Nun oni ankaŭ povas gustumi pli ol dudek variojn de tomato, kiu antaŭe havis en Pekino malpli da varioj.

Por pli bone konduki la liveran laboron, la komercaj organoj jam starigis reton de sistema provizado. Nun en la urbo estas instalitaj proksimume du mil legomaj proviz-punktoj, kiuj dislokiĝas en ĉiuj stratoj grandaj kaj malgrandaj. La proviz-punktoj grandaj, mezaj kaj malgrandaj funkcias en kombino. La grandaj kaj la mezaj situas ĉe la lokoj de vigla trafiko por ke la oficistoj post laboro povu aĉeti legomojn preterpasante; kaj la malgrandaj estas lokitaj en la loĝej-kvartaloj. Krome, pli ol mil legomvendaj ĉaroj veturas de strato al strato por servi la konsumantojn. Tiel do la vasta loĝantaro de la urbo povas aĉeti legomojn ĉe sia pordo aŭ apud sia loĝejo. Iuj lertaj vendistoj eĉ scias la ŝatojn pri legomoj de tiu aŭ alia familio kaj en kiu familio estas maljunuloj malfacile piediraj. Laŭ la enketo ili meminiciate liveras varojn rekte al la klientoj, kio tre kontentigas ilin. Krome, por ke la vastaj loĝantoj de Pekino povu frandi pli variajn legomojn, ĉiujare ni ankaŭ enportigas indiĝenajn legomojn de ĉiuj lokoj de la lando.

(Fotoj de Peng Gjun)

Riĉa rikolto dank'
al diligenta kultivado.



Jen, kiel bone kres-
kis la kukumoj ĉijare!



ie surstrate tro-
ĝas tia legom-
ndejo.



Streça rikoltado.





Unu servi penas,
miloj ĝojoplenas.



Pretigu por sendi freŝajn legomojn al la loĝantoj.

ELEKTADO DE GRUPESTRO

ANTAŬ nelonge, ĉiuj produktaj grupoj de la Pulan-a Produkta Brigado de la Luvang-guang-a Popola Komunumo en Funing-gubernio, Hebej-provinco, sin okupis pri la ĉiujara reelektado de siaj funkciuloj.

La Pulan-a Produkta Brigado jam trapasis la movadon de socialisma edukado, kiu donis fortan antaŭenpuŝon al la produktado, kaj dank' al tio nova tajdo de agrokultura produktado disvolviĝas kun arda entuziasmo. La brigadanoj antaŭdate finkonstruis kanalon por konduki akvon de Jang-rivero en Puhe-riveron kaj fosis trunkan irigacian kanalon okcidente de sia vilaĝo, tiel ke pli ol 4,000 muoj da seka tero ricevas irigaciadon kaj pli ol 1,000 muoj da seka tero fariĝis rizkampoj.

Por bone konduki la produktadon, la vilaĝanoj aparte zorgis pri la reelektado de funkciuloj.

Antaŭ kelkaj tagoj, publikiĝis la rezulto de la elektado de la unua produkta grupo. La nove elektita grupestro nomiĝas Jang Guoĉen. Li elektigis plue la duan fojon.

Dum la elektado en la pasinta jaro oni jam faris bruan diskutadon pri li. Apenaŭ iu proponis lin kiel kandidaton, voĉoj jam leviĝis kontraŭ li:

“Lia koleremo estas netolerebla por ni.”

“Kaj krome, kiu familio ne bezonas pruntepreni veturilon de la grupo por viziti parencon? Tamen, se vi petas lian konsenton pri pruntedono, li tuj rifuzas dirante, ke oni ĝin bezonas en kamlaboro aŭ flankprodukta afero, sed neniam donas rapidan konsenton, kvazaŭ la veturiloj apartenus al lia familio!”

“Vi diris la veron! Aŭtune nia infano portis hejmen kolektitajn spikojn, kion ni tute ne sciis, ĉar ni laboris en kampo. Sed li venis al ni kun amaso da kritikoj, ke ni estas egoismaj, individualismaj ktp., tia makulado al la plenaĝuloj! Sufiĉis por ni lia humiligo!”

Plendoj kaj grumbloj unu sekvis alian kaj prezentiĝis tiom da kritikaj opinioj, ke oni sentis, ke Jang Guoĉen estas tro malafabla kaj tute ne taŭga por grupestro.

Sed kiam estis tempo por decidi la kandidatojn, elpaŝis kelkaj maljunaj malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj esprimis siajn opiniojn en konkuro.

“Ja ĉiuj scias, ke Jang Guoĉen estas kolerema kaj kutimas paroli malafable. Sed oni devas vidi, pro kio li koleras, ĉu pro la intereso de la kolektivo aŭ de si mem.....”

“Prave! Ne decis, ke li ne prenis konvenan manieron por kritiki hejmenporton de spikoj, sed tamen la gepatroj ja devas eduki siajn infanojn. Ja kiu el ni foje vidis, ke Jang Guoĉen portis hejmen eĉ unu pajleron en la pasintaj jaroj? Ja estas maljuste nur kritiki lian koleriĝon sen konsidero pri ĝia kaŭzo!”

“Maljusta estas ankaŭ la kritiko, ke Guoĉen zorgas ne pri la membroj sed nur pri la produkta laboro. Kiel grupestro li devas postuli severe partoprenon de produktado al la membroj, sed li estas eĉ pli rigora al si mem. Tiel okupata li estas, sed en kiu tago li ne iris labori pli frue kaj hejmen venis pli malfrue ol la grupanoj? En kiu peza kaj malpura laboro li ne donis bonan ekzemplon? Ekzemple, kiam oni pretigis fundamentan fosajon por la pumpstacio en januaro, neniu volis malsupreniri pro frostoj, sed li dishakis la glaciojn kaj komencis fosadon; kaj en la tagoj de la aŭtuna superakvego, li laboregis por la produktado de la grupo tage kaj nokte spite al vento kaj pluvo. Kial oni forgesis pri ĉio ĉi tio?”

Prezentante siajn opiniojn punkton post punkto, la maljunuloj baldaŭ komencis simple riproĉajn demandojn: “Ĉu la kelkcent homoj de nia grupo ne plu volos manĝi? Ĉu ni ne volas pli riĉan rikolton? Se li estas kolerema, ni povas lin kritiki, ke li korektu sian eraron, sed ne elekti lin estas nekonsentebla.”

La paroloj de la maljunaj malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj prudentigis la amason: la koleremo de Jang Guoĉen estas vere malagrabla, sed tamen oni ankaŭ konstatas, ke neniam li koleras pro sia persona intereso. Sekve do la plejparto de la membroj voĉdonis por li kaj li elektiĝis grupestro.

Ĉifoje, Jang Guoĉen denove elektiĝis grupestro. Lin subtenis pli multe da voĉoj ol pasintjare, preskaŭ ĉiuj escepte de tri. Ankaŭ ĉifoje okazis disputo pri li, sed kun malsama enhavo, nome, ĉu li ŝanĝis sian malafablan sintenon, kaj ĝis kia grado?

En la komenco iu diris: "En la pasinta jaro oni jam kritikis lian malafablecon, sed nun li ankoraŭ ne ŝanĝis ĝin. Ekzemple, lia furioza riproĉo al Jang Honghiang dum la aŭtuna draŝado ja estis neeltenebla!"

Disputo leviĝis tuj post tiu voĉo:

"Lian riproĉon al Jang Honghiang mi trovas tute prava. Tiutage dum oni draŝis sorgon sur la placo, ekfulmadis kaj tondradis, videble tuj ekpluvos. La komunumanoj komencis rapide kolekti la sorgon de la grupo, sed vicgrupestro Jang Honghiang forlasis la draŝejon kaj kuris hejmen por kolekti siajn sekigitajn batatpecojn sur sia tegmento. Ĉu li havis iometon da zorgo pri la kolektivo? Ankaŭ mi sentis koleron vidinte lian fiagon!"

"Ni pripensu, ĉu li ŝanĝis sian sintenon aŭ ne," diris Jang Ŝaŭtian, reprezentanto de la maljunaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. "En la pasinteco, sen la konsento de Jang Guoĉen, oni povis fari nenian decidon en la grupa mastrumado. Sed depost kiam ni faris kritikon al li en la pasinta jaro, ĉu estis afero decidita sen la konsento de la amaso? Ekzemple, en la pasinta vintro la grupestro ne volis funkciigi olepreparejon konsiderante, ke ne estas abunda materialo. Sed aŭdinte la opinion de la membroj, ke ekipaĵojn oni havas pretaj, kaj ju pli longa estos la funkciigo, des pli multa estos la enspezo, ĉu li ne akceptis la proponon? Cetere, ni parolu pri la du porkinoj, kiujn li aĉetis por la grupo. Lia intenco estis kreskigi porkidojn kaj plimultiigi sterkon. Tio estis por la bono de la kolektivo, tamen li ne agis arbitre, sed kunvokis nin al kunsido por diskuti pri ĝi....."

La disputo pli kaj pli klarigis ĉies okulojn: Pri la gravaj aferoj de la produkta grupo Jang aranĝis interkonsiliĝon kun la reprezentantoj de la maljunaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj iufoje eĉ kunvenon de la membraro por fari decidon. Kvankam ne tute, tamen jam multe korektita estas lia kruda agmaniero!

La lasta elektado donis al Jang Guoĉen unu plian lecionon. Kiam venis lia vico por paroli kiel nove elektita kadro, li diris la jenajn vortojn el sia koro: "En la pasinta jaro oni faris multajn kritikojn al mi. La cititajn mankojn mi efektive havis, sed la kritikojn mi ne povis akcepti tiutempe kaj volis ekŝiĝi. Reprezentantoj de maljunaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj min riproĉis: 'Ekŝiĝi vi deziras, do vi ne volas neniigi viajn mankojn?' Mi akceptis iliajn admonojn kaj ne ekŝiĝis. La mankojn mi forigis parte, sed ankoraŭ ne tute. Ĉifoje vi denove faris multajn bonajn kritikojn pri mi. Mi daŭre penos min plibonigi."


Kvankam lia parolo estis simpla, tamen ĝi konvinkis min, ke la grupanoj faris ĝustan elekton. Informiĝinte pri la disputoj inter la komunumanoj dum la elektado kaj la senĉesa plibonigo de la agmaniero de Jang Guoĉen oni sentas intuicie, ke la kritikado kaj supervido de la popolamasoj jam fariĝis la fundamento de la demokratia vivo en la ĉina kamparo, kaj dank' al tio la funkciuloj de la bazaj organizoj en la kamparo senĉese forigas siajn mankojn kaj fariĝis ĉiam pli bonaj kaj konformaj al la postuloj de la partio kaj la popolo.

* KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *



ABUNDAJ TOMATOJ EN PEKINO

Ĉi-somere, oni abunde rikoltis tomatojn en la ĉirkaŭurbo de Pekino. En tempo de multa liverado, la vendokvanto de tomatoj atingis milionojn da ĝinoj ĉiutage. Estas sume pli ol dudek specoj da tomatoj kulturitaj en Pekino. Ĉar iliaj tempoj de maturiĝo estas malsamaj, la liverperiodo plilongiĝis.



TIBETAJ TRAKTORISTOJ

La unuaj tibetaj traktoristoj jam estas elkulturitaj de la Pengbo-a

Ŝtata Kultivejo en Tibeto dum la lastaj jaroj. Ili estas sume 113 personoj, plejparte liberigitaj servutuloj multe suferintaj kaj malamegantaj la malnovan socion. Tri el ili estas virinoj. Ili ĉiuj bonege plenumis sian taskon de printempa plugado en la kuranta jaro.

FINIĜIS LA TUTLANDA BELARTA EKSPOZICIO

La Tutlanda Belarta Ekspozicio kune aranĝita de la Ministerio de Kulturo kaj la Unio de Artistoj elmontris pli ol 2400 verkojn el dudek sep provincoj, municipaloj kaj aŭtonomaj regionoj de la tuta lando. Sume estis 290,000 personfojoj da vizitantoj en- kaj eksterlandaj, kiuj rigardis la ekspoziciaĵojn.

Tiu ĉi ekspozicio vive kaj koncentre montris la novajn sukcesojn akiritajn de la belartaj laborantoj de diversaj lokoj, kiuj sub la gvido de

la penso de Maŭ Zedong persistas en la politika direkto servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj al socialismo, vivante, laborante kaj batalante kune kun ili. Per siaj klaraj epokaj trajtoj, forta vivetoso kaj diverseco de temoj kaj stiloj la elmontritaj verkoj gajnis ŝaton de la vasta publiko.

En la ekspozicio oni ankaŭ rimarkis tre ĝojindan signon: novuloj en la belarto de Ĉinio rapide elkreskis.

LA UNUA DUONLABORA- DUONLERNA TEKNIKA LERNEJO EN TIBETO

En Tibeto establiĝis la Teknika Lernejo de la Lhasa-a Elektra Centralo, la unua duonlabora-duonlerna lernejo. Tiu ĉi novtipa lernejo faros sian kontribuon al la edukado de tibetaj laboristoj por disvolvi la elektrigon en Tibeto.

Projekciistinoj de la Dua Virina Filmprojekcia Grupo. De dekstre: Huo Ŝuĝen (grupestrino), Hju Gingĝen kaj Suj Ŝuĝen.



JOŬ BIAN:

FILMOPREZENTO POR KAMPARANOJ

Pri la Dua Virina filmo-projekcia Grupo de Ŝuangĉeng-gubernio, Hejlonggiang-provinco

LA Dua Virina Filmoprojekcia Grupo de Ŝuangĉeng-gubernio, Hejlonggiang-provinco, estis grupo kun nur tri membroj ĉe la komenco. Depost ĝia fondiĝo en 1954, la projekcia grupo jam aktivadis dek unu jarojn en kamparo. En 57 vilaĝoj de du popolaj komunumoj ĝi faris pli ol 5,400 filmoprezentojn kun spektatoroj de pli ol 4,100,000 homfojoj. La kamparanoj de ĉiu el la projekciaj punktoj povas ĝui meznombro sep aŭ ok prezentojn en ĉiu jaro.

Tiu ĉi projekcia grupo estis 37-foje elektita kiel antaŭiranta kolektivo de la gubernio, urbo kaj provinco kaj de la tuta lando. Sep-foje ĝiaj reprezentantoj ĉeestis en Pekino koncernajn kunvenojn kaj ĝi estas laŭdita kaj premiita de koncernaj institucioj de la Partio kaj la ŝtato.

PREZENTI FILMOJN POR ĈIU PRODUKTA BRIGADO

La grupestrino Huo Ŝuĝen ofte diris al siaj kamaradinoj: “Ebligi al la kamparanoj rigardi pli multe da bonaj filmoj estas nia plej granda feliĉo

kaj ĝojo!” Tial spite al penoj ili iris al ĉiuj vilaĝoj por filmoprezento kaj ĉiujare superplenumis la projekcian taskon difinitan de la supera institucio. Tamen neniam ili kontentiĝis pri siaj atingoj, sed ĉiam elmetas al si novajn pli altajn postulojn post la progreso.

La du popolaj komunumoj sub la zorgo de la nomita grupo havas sume tridek produktajn brigadojn, el kiuj la tri brigadoj Ĝengcaj, Janfang kaj Jaŭgin povis rigardi filmojn nur unu aŭ du fojojn pro tio, ke en printempo kaj aŭtuno iliaj vojoj estis kotaj kaj oni ne povis transporti al ili la projekciajn maŝinojn. Kion fari? Konsiliĝinte kun siaj kolegiinoj, Huo Ŝuĝen decidis, ke ili nepre solvos la problemon, kaj unue klopodos viziti Janfangbrigadon.

Irante de la sidejo de la projekcia grupo al la produkta brigado Janfang, oni devas trapasi marĉejon, kie la vojo estis ĝenerale kota, kaj kelkloke ŝajne seka sed fakte malfirma kaj ŝanceliĝema sub la piedoj. Kiam la veturilo de la projekcia grupo kun la maŝinoj atingis tian lokon, la radoj enfalis



Zorga kontrolo por garantii bonan prezentadon.

kaj ne plu povis moviĝi. Tiam la suno jam estis subiranta kaj blovis vespera vento. Plenkorpore makulitaj de koto, la tri junulinoj sentis akran malvarmon!

Sed ili venkis la malfacilon per sia klopodo. Kune kun la komunumano kiu veturigis la ĉaron, ili deprenis la objektojn unun post alia de sur la ĉaro kaj ilin portis trans la marĉejon. Poste ili eltiris la ĉaron kaj ĝin ŝarĝis denove. Tio tre lacigis

ilin, sed anstataŭ iom ripozi, ili supren refaldis siajn pantalonubojn kaj rekomencis marŝadi post ordigo de la objektoj.

Kiam ili atingis la produktan brigadon Janfang, jam estis vespero. Entuziasma amaso da komunumanoj alkuris por helpi la malŝarĝon de la maŝinoj kaj la kadroj de la brigado invitis la projekciistinojn al manĝo. Sed vidante la ardan deziron de la amaso spekti filmon, la grupaninoj tuj starigis la projekciilojn, pendigis ekranon kaj komencis prezentadon spite al la malvarmo kaj la malagrabla sento de malsekeco. La varma manklakado de la spektantoj tute forpelis ilian lacon. Ili bone faris tiun prezentadon kaj poste ankaŭ sukcesis havigi al ĉiuj brigadoj egalajn ŝancojn de filmorigardo.

KE ĈIU KAMPARANO POVU ĜUI FILMOJN

Ne longe poste, ili elmetis al si la novan taskon plipopularigi filmojn.

Tio estas motivita de la jena afero: Foje ili projekciis filmon en la vilaĝo Liugiavopeng por la produkta brigado Guangĵen. Estis malvarme en tiu vespero kaj Huo Ŝuĝen reiris al sia loĝejo por surmeti alian veston. Survoje, ŝi vidis, ke avino Liu, kiu ĝuas la kvin garantiojn* de la komunumo, staras antaŭ sia domo. Huo ŝin demandis: "Kion vi faras, avino?"

"Mi aŭskultas la filmoprezentanton."

"Do iru vidi!"

"Oj, sed kiu gardu por mi la domon?"

Prave! Kiu gardu la domon? Kaj Huo Ŝuĝen pensis: Kredeble, avino Liu ne estas la sola, kiu ne povas forlasi sian domon. Ni devas ebligi ankaŭ al tiaj homoj spektadon de filmoj.

**T.e. garantioj al senlaborfortaj komunumanoj pri manĝo, vesto, hejtaĵo, edukado de iliaj idoj kaj senpaga enterigo post ilia morto.*

Ili kant-rakontas por la komunumanoj dum laborpaŭzo.



Ŝi pensis plue: La distanco inter la projekciaj punktoj ne estas malproksima kaj iuj junuloj spektadas filmojn en pluraj punktoj sekvante la projekcian grupon. Oni povas organizi ilin en postlaboran filmoprezentan servogrupon, ke ili unue spektu filmon en alia vilaĝo kaj gardu la domojn de tiuj kiuj ne povas forlasi sian domon dum filmoprezentado en ilia propra vilaĝo. Tiamaniere, ja ĉiu kamparano povos havi eblecon rigardi filmojn.

Ŝi prezentis sian ideon al la Kompartia Komitato de la Popola Komunumo kaj ricevis varman subtenon de ĝi, ke ili unue provu en Dongfu-brigado.

Organiziĝis la unua servogrupa, kaj ĝin sekvis la dua, la tria . . . finfine ĉiu el la projekciaj punktoj jam havis sian servogrupon por la filmoprezentado.

Tiuj servogrupoj fariĝis bonaj helpantoj de la projekcia grupo. Dank' al ilia servo, ankaŭ tiaj komunumanoj kia avino Liu k. a. povas ĝui spektaklojn sur la ekrano. Post spektado, avino Liu diris emocie: "Bona estas nia registaro! En la pasinteco, kiu zorgus pri maljuna solulino kia mi? Sed nun, la produkta brigado ne nur havigas al mi manĝaĵon kaj hejtaĵon, eĉ ankaŭ gardas mian domon por ke mi povu ĝui filmojn."

SERVADO AL LA PRODUKTA KAJ KLASA BATALOJ EN LA KAMPARO

La membroj de la Dua Virina Filmoprojekcia Grupo ĉiam aktivadas kiel batalantoj de literaturo kaj arto akordigante sian laboron kun la diversaj kampanjoj kaj centraj laboroj de la registaro. Kian filmon la kamparo bezonas, tian ili klopodas akiri por projekcio.

Kiam oni bezonis doni al kamparanoj klasan edukon, ili projekciis la filmojn "La Blankhara Knabino", "La Soforo-vilaĝo" k. a. kiuj malkaŝas la ekspluatadon kaj subpremadon de bienuloj al kamparanoj antaŭ la Liberiĝo kaj ilian subfosadon

al la popola komunumo post la Liberiĝo. Rigardinte la filmon "La Soforo-vilaĝo", He Ĉengguo, membro de Jiŝeng-brigado de la Kingling-a Popola Komunumo diris: "Ni nepre ne forgesu la suferojn en la pasinteco, ni nepre ne forgesu klasbatalon!"

La agado de la nomita projekcia grupo ludas pozitivan rolon ankaŭ por akceli la produktadon kaj konstruadon de agrokulturo. En 1960, Jangjun-brigado faris akvoutiligan konstruadon sur iu monto. La tasko estis urĝa kaj peza, sed la konstruado progresis ne tiel rapide. Por entuziasmigi la konstruantojn, la projekcia grupo speciale iris dekojn da kilometroj por alporti de la gubernia urbo la filmon "La Gejunuloj de Nia Vilaĝo" por projekciado. Rigardinte tiun filmon, la junuloj diris: "Se la gejunuloj en la filmo povas konduki akvon sur altan monton, kial do ni ne povus konstrui akvorezervejon sur ebenejo!" Kaj la konstruado iris pli rapide ekde la sekvanta tago.

En alia jaro, 16 brigadoj de la Kingling-a Popola Komunumo kulturis maizojn en granda areo. Por certigi abundan rikolton, la komunumo intencis fari artefaritan fekundigon de la plantoj. Tiam la projekcia grupo alportis la sciencedukan mallongan filmon "Artefarita Fekundigo de Maizo" kaj ĝin projekciis en ĉiuj brigadoj konigante al la komunumanoj la metodon kaj utilon de tiu tekniko. Profitante la okazon, la komunumo organizis 16 kadrojn kaj veteranajn kamparanojn por speciale studi kaj lerni la teknikon. Dank' al tio, la sperto de artefarita fekundigo de maizo estis disvastigita.

En 1964, nova membrino aldoniĝis al la projekcia grupo, kaj pli ardiĝis kaj firmiĝis la volo de ĝiaj anoj por sin dediĉi al la konstruado de la socialisma nova kamparo kaj servado tutkora al la kamparanoj.



"Ĝis revido!"



Prezidanto Maū kaj Ĉefkomandanto Ĝu dum la Kontraŭjapana Rezistmilito.



Komence de la Rezistmilito, la Okavoja Armeo unuafoje gajnis la grandan venkon ĉe Pinghing-pasejo, ekstermis pli ol 3000 elitanojn el la japana armeo kaj kuraĝigis la tutan popolon rezisti la agresantojn. Nia maŝinpafila pozicio dum la batalo.


LA VENKO DE LA POPOLA MILITO!

Memore al la 20-a Datreveno de la Venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito

Anoj de la Okavoja Armeo en orienta Hebej-provinco batalas ĉe Hifengkoŭ-pasejo de la Granda Muro.



Surakva taĉmento viglas en la lago Bajjangdian, Hebej-provinco.



Milicanoj ĉie enterigis minojn por "bonvenigi" la agresantojn.





La popolanoj kunagas por senigi la malamikon je linio de provizado.





la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio ricevis subtenon de la popolo de diversaj landoj. Doktoro Norman Bethune, kanada komunisto venis de fore al Ĉinio. En la foto, li operacias la vunditan batalanton en la provizora operaciejo en Lej-juan-gubernio de la Ŝanhi-Ĉahar-Hebej-a Limregiono.

Nia trupo armita per kaptitaj armiloj for de la malamiko.



La 9-an de aŭg., 1945, Prezidanto Maŭ Zedong publikigis la deklaron "La Lasta Batalo kontraŭ la Japanaj Invadantoj" por alvoki ĉiujn kontraŭjapanajn fortojn de la ĉina popolo por landskala ofensivo. Jen nia armeo liberigis la pasejon Ŝanhajguan, sur la ĉefa vojo kondukanta al la Nordoriento.



La kontraŭjapana popola armeo estas armeo kaj de batalantoj kaj de produktantoj.

La infanteria 92 mm paflego de la japanaj invadantoj kaptita de la 115-a Divizio de la Okavoja Armeo en la unua sukcesa batalo ĉe Pinghing-pasejo.



Tiam la milicianoj en la Kontraŭjapana Bazregiono uzis minojn faritajn el diversaj vazoj, kaj vundis kaj mortigis multajn malamikojn survoje. Jen tiaj minoj ekspozitaj en la Milita Muzeo de la Ĉina Popola Revolucio.



Nokta Surprizatako al Jangmingbaŭ

La japanaj imperiistoj lanĉis armitan invadon al Ĉinio en 1931 kaj komencis ĝeneralan atakon al Ĉinio en 1937. Tiam, kuomintangaj trupoj, timigite de la supereco de la modernaj armiloj kaj ekipaĵoj de la japanaj invadantoj, retiriĝis paŝon post paŝo, dum la Okavoja Armeo, gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio, senŝanceliĝe batis la invadantojn. Unue ĝi ekstermis la Itagaki-divizion de la japana armeo ĉe Pinghing-pasejo kaj tuj sekve donis solidan baton al la japana aerarmeo ĉe la urbeto Jangmingbaŭ, kio inspiris al la tutlanda popolo firman decidon konduki rezistmiliton. Post okjara rezistmilitado la ĉina popolo finfine devigis la japanan registaron formale deklari senkondiĉan kapitulacion je la 14-a de aŭgusto 1945 kaj subskribi la dokumenton de senkondiĉa kapitulaco je la 2-a de septembro, kio signis la finan venkon de la Kontraŭjapana Rezistmilito.

Por memori la 20-an datrevenon de la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito de la ĉina popolo, ni publikigas speciale la jenan artikolon pri la milito. La verkinto estis siatempe la komandanto de la 769-a Regimento sub la 129-a Divizio de nia Okavoja Armeo.

La Red.

EN septembro de 1937, suferinte la malvenkon ĉe Pinghing-pasejo, la japanaj banditoj ŝanĝis sian militaranĝon kaj denove arogante sin direktis al la urbo Tajjuan laŭ la Datong-Puĝoŭ-a Fervojo.

La trupoj de Kuomintango ankoraŭ retiriĝis batalon post batalo kiel antaŭe. Ĉie videblis iliaj soldatoj en griza uniformo fuĝantaj suden tri- aŭ kvin-ope.

Ĝuste tiam, nia 769-a Regimento sub la 129-a Divizio (la avangarda regimento de la divizio) laŭordone penetris profunden en la postfronton de la malamikoj por mobilizi tieajn popolamasojn kaj konduki gerilon. Iun tagon de la meza tagdeko de oktobro, la trupo venis en la ĉirkaŭaĵon de Sulangkoŭ-vilaĝo, sude de Dajhian-gubernio.

Sulangkoŭ estis nemalgranda vilaĝo ĉe la orienta bordo de Hutuo-rivero. Sude de ĝi, ĉe la malsupra parto de la rivero estis Hinkoŭ, kie tiam flamis batalo. Tondroj de kanonado seninterrompe aŭdiĝis el la sudo. Aeroplanoj de la malamikoj transflugis super ni jen duope, jen triope. Niaj batalantoj blasfemis indigne piedfrapante la teron: “Ne paradu en la aero! Se vi, bastardoj, estus herooj, surteriĝu kaj provu lukti kun ni!”

El la agadregulo de la aeroplanoj de la malamikoj ni konjektis, ke la aerodromo probable sin trovas ne malproksime. Demandinte tieajn vilaĝanojn ni eksciis, ke efektive sin trovas aerodromo ĉe la urbeto Jangmingbaŭ, kiu estas malpli ol kvin k.m. malproksime de ni trans la rivero. La kadroj de ĉiuj batalionoj senescepte postulis: “Tuj donu ordonon, ke ni ĝin detruu!”

Ĉu ataki aŭ ne? Survoje al la nordo la diviziestro Liu Boĉeng foje speciale komunikis al ni la resumon de sperto pri la batalo de Pinghing-pasejo, faritan de diviziestro Lin Biaŭ. Surbaze de la sperto montrita en la resume, ke “la japanaj diabloj estas venkeblaj sed ne

facile venkeblaj”, kamarado diviziestro Liu ripetfoje konsilis al ni, ke, veninte en la nordan parton de Ŝanhi-provinco, ni devos esti duoble singardaj en ĉiu batalo. Tiuj vortoj tuj atentigis min, ke ni devas bone koni la situacion de la malamikoj antaŭ ol fari decidon.

En la komenco ni informiĝis, ke iu regimentestro de la Ŝanhi-Sujjuan-a Armeo de Kuomintango loĝas en la proksimo. Oni diris, ke li batalis kontraŭ la japanaj diabloj kaj retiriĝis ĉi tien de Datong antaŭ kelkaj tagoj, gvidante sian restantan trupon kun malmultaj homoj. Mi decidis lin intervjui, kaj por peti spertojn en batalo kontraŭ japanaj diabloj kaj por informiĝi pri la situacio de la malamikoj en tiu ĉi regiono.

Traserĉinte ĉiujn grandajn kaj malgrandajn montvalojn en la proksimo, finfine mi sukcesis trovi la regimentestron ĉe izola montpiedo. Sed neatendite, apenaŭ mi eldiris mian intencon, li jam paliĝis pro timo kaj diris: “Vere terura estas la japana armeo! Ĝiaj aeroplanoj flugis en la aero kaj ĝiaj kanonoj muĝis sur la tero! Iliaj bomboj kaj obusoj kvazaŭ havis okulojn, kaj apenaŭ ekfunkciis nia radiostacio, ĝi tuj ricevis bombardon!”

Subpremante mian antipation, mi lin demandis: “Kiamaniere do vi batalis kontraŭ la malamikoj?” Sed la majesta mezranga oficiro de Kuomintango diris senhonte: “Nia trupo disfalis antaŭ ol ni vidis japanajn armeanojn, kaj nun el mia regimento restas nur unu roto...”

Estis ne necese lin demandi plu. Tiu ulo ja povis diri nenion utilan, sed nur dissemi timon al la japana armeo. Mi do stariĝis kaj lin adiaŭis. Apenaŭ mi min turnis por foriri, li mallaŭte diris al mi kun ridetaĉo: “Pro kio ni faru la rezistmiliton! La rezistado rezultigos por ni nenion alian ol perdigi al ni la delikatajn manĝojn... Estu prudenta, fraĉjo! Jen tiaj estas viaj

ekipaĵoj! Ĉu ili ne fariĝos ‘nereciprokotaj donacoj’, se vi efektive batalos kontraŭ la japana armeo?”

Ja centprocenta malkuraĝulo! sklavo! Estis ja ne strange, ke ilia kolosa armeo kun centoj da miloj da homoj ekatakite tuj disfuĝis kaj donacis grandan pecon da teritorio al la japanaj banditoj en la daŭro de nur kelkaj monatoj.

Por bone koni la situacion de la aerodromo de la malamikoj, ni decidis en la sekvanta tago fari rekognoskadon tie. Sur la vojo, aŭdinte pri mia hieraŭa intervjuo kun la regimentestro, kelkaj batalionestroj forte indigniĝis. Kamarado Ĝaŭ Ĉongde, estro de la Tria Bataliono insultis kraĉante:

“Sentaŭgulo! Ja ne ĉino li estas!”

“Estas la tutlanda popolo, kiu postulas la rezistmiliton. Kiel ajn ili agas, ni absolute ne devas vanigi la esperon de la popolo!” intermetis kun forta ekscitiĝo la estro de la Unua Bataliono.

Jes, ni ne devas esperi, ke al la rezistmilito kontribuos la kuomintanga armeo, kiu estas politike putra kaj milite senforta. La pezan taskon de nacisavado el la pereiga krizo povas plenumi nur ni komunistoj kaj batalantoj de la Okavoja Armeo! Ĉe tiu penso, mi subite sentis nian respondecon pligrandiĝinta.

Interparolante ni iris laŭlonge de montvalo kaj baldaŭ venis al la bordo de Hutuo-rivero. Ascendinte monton, ni ĉiuj estis tuj absorbitaj de la pejzaĝo antaŭ la okuloj: oriente etendiĝas la seninterrompa ĉeno de krestoj de Vutaj-montaro; norde, super la linio de la interna Granda Muro, alte staras la majesta Janmen-pasejo; ĉe la okcidenta horizonto jen kaŝiĝas, jen reaperas Guancen-

monto en nebula vualo... Sur ambaŭ bordoj de Hutuo-rivero estas fekundaj kamparoj kaj bela pejzaĝo, sed nun ili suferas terurajn kruelaĵojn de la japanaj invadantoj! Kiel dolorige!...

“Aeroplanoj!” subite ekkriis la estro de la Dua Bataliono.

Ni ĉiuj samtempe levis la binoklojn kaj rigardis per ili en la direkto de li montrita kaj trovis, ke trans la rivero, sudoriente de Jangmingbaŭ, aro da grizeblankaj aeroplanoj de la malamikoj efektive staras bonorde en vicoj sur placo; ili brilas blindige en la sunradioj.

Kiam ni estis atente observantaj ĉiujn objektojn en kaj ekster la aerodromo, subite ni trovis homon venantan al ni de la rivero. Tra la binokloj ni vidis, ke la iranto kun hirta hararo kaj nudaj piedoj estas vestita per ĉifonoj. Li aspektas kiel kamparano, sed lia mieno montras fortan maltrankvilecon.

Kiam li alproksimiĝis, ni iris al li renkonte kaj laŭte alparolis: “Fraĉjo, de kie vi venas?”


Aŭdinte la vokon, li ektimtre mis kaj tuj haltis, kun la okuloj senĉese ĉirkaŭrigardantaj. Kiam li ekvidis nin, fremdajn militistojn, li ankoraŭ pli konsterniĝis kaj nin mezuradis per dubaj rigardoj de la kapo ĝis la piedoj kaj diris tremvoĉe post longa tempo: “Viaj militistaj moŝtoj...”

“Ne timu, fraĉjo. Ni estas anoj de la Okavoja Armeo, kiu venas por kontraŭbatali la japanajn diaĵojn.”

“Ho!” li tuj ekkriis, aŭdinte la vortojn “Okavoja Armeo.” Li sin ĵetis al ni, kaptis niajn manojn kaj rakontis al ni kun indigno sian travivaĵon.

Atako al la aerodromo de Jangmingbaŭ.

de Sun Ĉangfej



Antaŭe li loĝis en vilaĝeto apud la aerodromo. Post kiam la japanaj banditoj invadis Ŝanhi-provincon, lia domo detruigis kaj liaj familianoj mortis pro la rabado fare de la kuomintangaj armeanoj kaj pro la buĉado kaj bruligo fare de la japanaj diabloj. El lia tripersona familio, nur li sola postvivis. Kaj poste japanaj diabloj lin kaptis kaj devigis lin transporti benzinujojn kaj bombojn al la aerodromo ĉiutage. Li devis laboregi de mateno ĝis vespero ofte kun malplena stomako, kaj tamen malgraŭe estis batata kaj insultata de tempo al tempo. Ne povante elteni la turmentojn de la japanaj diabloj, li ŝtele forkuris el la aerodromo. Ĉe la fino de sia parolo, fingromontrante la aerodromon de la malamikoj, li diris kun terura malamo:

“Iru por ilin puni! Mi vin gvidos!”

Aŭdinte la denuncon de la vilaĝano, ni ĉiuj des pli indignis. Kamarado Ĝaŭ Ĉongde kaptis lian manon kaj diris sincere:

“Fraĉjo, ni nepre venĝos vin kaj ĉiujn aliajn suferantojn!”

Tuj poste la vilaĝano detale rakontis al ni la situacion en kaj ekster la aerodromo.

Farinte rekognoskadon, ni konstatis ke la akirita informo ĝenerale identas kun tio kion la vilaĝano rakontis al ni. En la aerodromo troviĝis dudek kvar aeroplanoj, kiuj tage bombis la urbojn Tajjuan kaj Hinkoŭ laŭvice kaj nokte staris tie. La plejparto de taĉmento de Kazuki-divizio staris garnizone en Jangmingbaŭ kaj nur areto da soldatoj gardis la aerodromon. Ŝajne la malamikoj estis tutforte klopodantaj por preni la urbon Tajjuan, tial tute ne atendis, ke ni atakos ilin de post ilia dorso. Tio ja estis bona ŝanco por ilin ekstermi. Se ni tuj faros surprizatakon al ili, nia venko estos certa. Ni decidis tuj ekagi.

La tasko de surprizatako al la aerodromo estis donita al la Tria Bataliono; parto de la batalantoj de la Unua kaj Dua Batalionoj estis ordonita detrui la ŝoseon kaj pontojn inter Guohian kaj Jangmingbaŭ por bari malamikojn eventuale venontajn por savi la atakitojn; la Artileria Roto kaj la Maŝinpafila Roto de la regimento estis ordonitaj okupi la pozicion ĉe la orienta bordo de Hutuo-rivero kaj esti ĉiam pretaj helpi la Trian Batalionon.

La tuta Sulangkoŭ-vilaĝo bolis en la posttagmezo de la 19-a de oktobro. Ĉiu bataliono kaj ĉiu roto okazigis siajn partiĉelan kaj militistan kunvenojn por mobilizado. Ĉiuj kadroj kaj batalantoj havis altan batalspiriton kaj ŝtalan volon. Aŭdinte, ke la batalantoj de la Okavoja Armeo iros ataki la japanajn diablojn, la vilaĝanoj tuj faris dekojn da brankardoj en la daŭro de nur kelkaj horoj.

Ĉe la vesperiĝo mi venis al la Dekunua Roto sub la Tria Bataliono, kune kun kelkaj kadroj de la regimento. Nin vidinte, la batalantoj svarme ĉirkaŭis nin kaj konkure esprimis sian decidon.

“Ĉu vi pretiĝis?” mi demandis.

“Jam tre bone, kamarado regimentestro. Se ni nur palpe eniros la aerodromon, ni nepre frakosas la aeroplanojn de la bastardoj!” ĥore respondis la batalantoj.

Fingromontrante etan batalanton starantan antaŭ mi, mi demandis denove: “La aeroplanoj estas kira-

sitaj per ferlado kaj ne trapafeblaj per kugloj. Kion do vi faros?”

Senhezite levinte sian dekstran pugnon kaj ĝin svingante en la aero, la eta batalanto respondis kategorie: “Rimedon ni jam trovis: frapi ilin per mangrenadoj.”

Tiam kamarado Ĝaŭ Ĉongde diris al la batalantoj: “Kamaradoj, oni diris, ke ni povos nur fari al la japanaj diabloj ‘nereciprokotan donacon’ per niaj armiloj, se ni faros atakon per ili. Ĉifoje ni nepre gajnu brilan venkon por instrui ilin!”

El la homamaso elpaŝis fortika junulo kun maŝinpafilo en la mano. Li diris kolere per laŭta voĉo: “Ekaŭdinte kanonadon, ili tuj forkuris kiel leporoj, kaj tamen ili ne hontas nin moki! Mi nepre batalakiros aeroplanon por ilin instrui!” Ĵetinte rigardon al la parolanto, mi rimarkis, ke li estas neniu alia ol Liĉjo, estro de la Maŝinpafila Subplotono, kiu estas fame konata al la tuta regimento.

“Ĉu tian koloson vi povus porti?” iu demandis ridante.

“Se mi ne povos porti tutan,” li argumentis, “mi do prenos derompitan voston.”

Lia sprita respondo brue ridigis la batalantojn. Vere kiel la proverbo diras, “la novnaskitaj bovidoj ne timas tigron.” Kvankam ili unuafoje sin preparis por ataki japanajn diablojn kaj plie aeroplanojn, kiujn ili neniam atakis antaŭe, tamen neniu el ili sin ĝenis pro la malfaciloj.

Nokte nia trupo ekmarŝis senbrue.

Dum la periodo de la Dua Enlanda Revolucia Milito la Tria Bataliono pruviĝis kapabla sukcese fari kaj atakon kaj defendon kaj lerta precipe en nokta batalo. Ĝi gajnis siatempe la honorigan flagon “Venki Dekon per Unu”. Hodiaŭ ĝi, daŭrigante la bonan tradicion de la Ruĝa Armeo, sin ĵetis en novan batalon. Ĉiuj batalantoj estis malpeze ekipitaj; ili demetis la vatitajn vestojn kaj la dorspakajojn, kaj firme ligis la bajonetojn, ŝovelojn, mangrenadojn kaj aliajn objektojn, kiuj povus estigi bruon. La longaj vicoj marŝis laŭlonge de fulge mallumaj montvaloj, rapide kaj silente.

La gvidanto estis ĝuste la vilaĝano, kiun ni renkontis. Li bone konis la vojojn de ĉi tiu regiono, kvazaŭ sian manplaton. Gvidate de li, la trupo tre rapide transvadis Hutuo-riveron kaj venis al la ĉirkaŭaĵo de la aerodromo.

En la aerodromo regis morta silento. Eble la japanaj diabloj estis dolĉe dormantaj? La batalantoj rampe trapasis pikildratojn kaj enŝteliĝis en la aerodromon tute nerimarkite. Sub la gvido de kamarado Ĝaŭ Ĉongde, la Deko Roto moviĝis al la nordokcidenta parto de la aerodromo por surprizataki la kaŝejon de la gvardio. La Dekunua Roto sin ĵetis rekte al la aeroplanoj, kiuj sin trovis en la centro de la aerodromo.

La batalantoj de la Dua Plotono de la Dekunua Roto la unuaj vidis la aeroplanojn, kiuj efektive staris tie en tri bonordaj vicoj. Jam de multaj tagoj ili arde deziris ataki japanajn diablojn, tial nun, ekvidinte la aeroplanojn tuj antaŭ si, ili ja pleniĝis de ĝojo kaj indigno. Iu insultis apenaŭ aŭdeble: “Bastardoj! Vi povis permesi al vi paradi en la aero, sed nun ni jam venas por vin puni!” Kun tiuj vortoj li alproksimiĝis al la aeroplanoj. Subite ekkriegis japana diablo en la nordokciden-

to, kaj tuj sekve aŭdiĝis sinsekvo da klaraj pafoj. La Deko Roto renkontiĝis kun gardostarantoj de la japana armeo. Kaj en tiu palpebruma momento la Deko kaj la Dekunua Rotoj samtempe lanĉis sturmon el du direktoj. Laŭte kriegante la batalantoj kuraĝe sin ĵetis antaŭen. Salvis maŝinpafiloj kaj tondris eksplodantaj mangrenadoj kaj fajraj buloj lumigis la noktan ĉielon. La gardostarantaj soldatoj de la diabla armeo, kiuj patrolis ĉirkaŭ la aeroplanoj, haste alrapidis kaj kurante ĉirkaŭ la aeroplanoj, ili ekbatalis kontraŭ niaj batalantoj antaŭirantaj. Vekiĝis la pilotoj deĵorantaj en la aeroplanoj, blinde ili ekpafadis en konfuzo, tiel ke kugloj pafitaj el malantaŭe starantaj aeroplanoj eniĝis sinsekve en la antaŭstarantajn.

Niaj batalantoj batalis kun ĉiam pli granda entuziasmo, kaj iuj kriis dum la luktado: "Lasu ĉi tiun aeroplanon al mi!" aliaj penis grimpi sur la aeroplanojn. Liĉjo, estro de la Maŝinpafila Subplotono jam estis surgrimpinta la voston de aeroplano kaj energie maŝinpafadis al la trunko de la flugmaŝino.

Dum bolis la batalo, la japana gvardio sin ĵetis al ni kriegante. Inter la pli ol dudek aeroplanoj, la malamikaj soldatoj kaj niaj batalantoj intermiksiĝis kaj komencis lukti per bajonetoj.

Kamarado Ĝaŭ Ĉongde komandis nian trupon, kurante tien kaj reen. Subite li vidis, ke iu japana diablo malfermis la pilotkabineton, desaltis teren kaj ĉirkaŭbrakis unu el niaj batalantoj. Sed ĉi lasta tuj sin turnis kaj lin pikis per sia bajoneto kaj tiel finis lian vivon. Kamarado Ĝaŭ laŭte kriis: "Rapidu! Tuj ĵetu mangrenadojn en la ventron de la aeroplano!" Aŭdiĝis tondraj eksplodoj kaj 2-3 aeroplanoj dronis en incendio. Ekscitate de ventblovo, la flamoj ĉiam pli furioziĝis kaj baldaŭ la tuta aerodromo jam pleniĝis je densa ruliĝanta fumo kun ardaĵ flamoj.

Ĝuste en tiu momento la maŝinpafilo de Liĉjo eksilentis. Jen li forte frapadis aeroplanon per sia ŝovelilo. Ha! li efektive deziras preni voston de aeroplano. Ĝaŭ Ĉongde tuj kuris al li kriante: "Tuj pafadu! Kial frapi!" Kaj Liĉjo denove levis la maŝinpafilon kaj ekpafadis.

La kontraŭatako fare de la japana gvardio estis repuŝita. Komandante la batalantojn detruis la aeroplanojn, kamarado Ĝaŭ Ĉongde estis subite trafita de kuglo kaj falis teren. Kelkaj batalantoj alkuris kaj lin apogstarigis, sed li kriis per sia tuta forto: "Ne zorgu pri mi! Iru detruu, iru..." Tiu eminenta komandanto, kiu batalis brave kvazaŭ tigro kaj amis siajn soldatojn kvazaŭ patrino, jam fermis siajn okulojn antaŭ ol li finis la parolon. Lia martiriĝo ekstreme malĝojigis kaj dolorigis la kamaradojn. Laŭte kriante la sloganon "venĝu nian batalionestron!" la batalantoj kaptis mangrenadojn kaj sin ĵetis al la aeroplanoj de la malamikoj spite al la densa kuglopluvo...

Post dekoj da minutoj, la plejparto de la gvardio estis ekstermita, kaj pli ol dudek aeroplanoj brulis en incendio. Por helpi la gvardion alveturis rapide la kirasaŭtoj de Kazuki-divizio, kiu loĝis garnizone en la urbeto Jangmingbaŭ. Sed antaŭ ol ili rampis ĝis la aerodromo, ni jam nin fortiris el ĝi.

La venko de la nokta surprizatako al la aerodromo de Jangmingbaŭ estis rapide sciigita al la tuta lando pere de radio. En la komenco la oficiroj de Kuomintang tute ne kredis tion, kaj diris: "Ĉu estas eble, ke la Okavoja Armeo atakis eĉ aeroplanojn per siaj armilaĉoj? Neeble!" Sed en la daŭro de kelkaj tagoj post la 20-a de oktobro, la urboj Hinkoŭ kaj Tajjuan ambaŭ ne suferis bombadon, kaj nur tiam la oficiraĉoj, kiuj timis la malamikojn kiel tigrojn kaj estis malkuraĝaj kiel musoj, eksilentis kun granda miro.

* KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *



ELDONIĜIS DU KOLEKTOJ DE RAPORTAĴOJ PRI LA KONTRAŬUSONA Batalo DE LA VJETNAMA POPOLO

Du kolektoj de raportaĵoj *La Fera Muro de la Patrolando* kaj *Koncentru la Malamon en la Pafilon* estas tradukitaj kaj eldonitaj lastatempe de la Ĉina Verkista Eldonejo por konigi al la ĉinaj legantoj la batalon de la vjetnama popolo kontraŭ la usonaj agresantoj.

La unua libro konsistas el dek tri elektitaj rakontoj pri bataloj.

Ili estis verkitaj de iuj partoj de la Liberiga Armeo de suda Vjetnamio por celebri la datrevenon de la fondiĝo de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio en decembro, 1963. Ĝi priskribis multe da noblaj herooj, spegulante de diversaj anguloj la grandajn sukcesojn kaj meritojn de la popolo de suda Vjetnamio en batalo kontraŭ la usonaj agresantoj por la unuigo de sia patrolando.

La dua estas kolekto de dudek unu raportaĵoj de verkistoj en norda Vjetnamio. Ĝi prezentas al ni la bravecon de la popolo en la Nordo de Vjetnamio en sia solida punado al la usonaj aer-banditoj, kiuj komencis sian aeratakon kontraŭ la Vjetnama Demokratia Respubliko je la 5-a de aŭgusto lastjare.

KULTURA ĈARO EN LA KAMPARO

Laborantoj de la Kultura Domo de Hegian-gubernio, Hebej-provinco, kreis rondirantan kulturan ĉaron. Ekde nov. lastjare ĝis nun, ĝi jam daŭre laboris unu jaron. Pli ol kvardek mil kamparanoj de cent kvardek produktaj brigadoj jam rigardis ĝiajn bildoekspoziciojn kaj lumbildojn. Kiam la kultura ĉaro atingas popolan komunumon, ĝi elektas centran vilaĝon por aranĝo de ekspozicieto, organizas kamparanojn de apudaj vilaĝoj por ĝin viziti, kaj en la vespero ĝi prezentas lumbildojn al la kamparanoj. Ĝi ankaŭ helpas la vilaĝajn klubojn en diversaj lokoj per konsiloj kaj kulturado de funkciuloj.



SPORTAS MILIONOJ DA POPOLANOJ

Notoj pri la Ekspozicio de Sportaj Atingoj


La septembro de Pekino ĉijare estas aparte vigla. Inter la loĝantoj cirkulas novaĵoj pri la Dua Tutlanda Sportkunveno, ke la ĝin partoprenantaj sportistoj rompis diversajn rekordojn de la lando kaj la mondo. Samtempe kun tio, malfermiĝis la Ekspozicio de Sportaj Atingoj, kiu konigas al la vizitantoj per rigardindaj bildoj kaj objektoj la grandajn sukcesojn akiritajn de niaj gesportistoj dum la 16 jaroj post la fondo de la Ĉina Popola Respubliko, prezentante belajn perspektivojn de vigla disvolvigo de niaj sportoj.

La ekspozicio kovranta 1900 kvadratajn metrojn elmontras pli ol 630 bildojn kaj pli ol 300 objektojn.

Ĝi manifestas la ĉiaman zorgon de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Popola Registaro pri sportoj kaj fizika kulturo, prezentas al la rigardantoj la mirindajn atingojn de la ĉinaj sportistoj kaj la progreson en tekniko kaj ekipaĵoj de sporto en Ĉinio. Sed la plej interesa kaj kuraĝiga parto de la ekspozicio estas tiu pri la sporta aktivado de la vastaj popolamasoj, kiu estas la plej granda kaj riĉenhava kun plej multe da fotoj kaj objektoj.

Fronte al la enirejo de la ekspozicia halo estas granda olepentraĵo prezentanta la naĝadon de Prezidanto Maŭ "Trans la Grandan Jangzi-riveron". Estis liaj alvoko kaj ekzemplodona ago, kiuj kuraĝigis la tutan popolon,

Ĉemaraj milicianoj konkuras naĝi kun armiloj.





Amasa grimrado en la montregiono de Gujĝoŭ-provinco.

precipe la vastajn amasojn de gejunuloj kaj geknaboj naĝi en riveroj, lagoj kaj maroj. La grandaj fotoj kaj diversaj objektoj montrataj sur la muroj kondukas la rigardantojn kvazaŭ en la ardan sportan aktivadon de la amaso. En la ondanta fluo de Jangzi-rivero, la Dektrimaŭzolea Akvorezervejo, Gialing-rivero . . . ĉie, kie eblas naĝado, viglas naĝantaj popolamasoj.

En la provincoj Gujĝoŭ kaj Kinghaj ĉie altas krutaj montoj, ankaŭ kiuj estas prenataj de la lokanoj kiel bonaj terenoj por sin ekzerci fizike kaj spirite. La ekspozitaj fotoj kun amasoj de montgrimantoj montras, ke la popolanoj en la montregionoj ja ne havas malpli da okazoj por fizika ekzercado ol tiuj de la apudriveraj kaj marbordaj lokoj. Pafado kaj batalo per bajoneto jam fariĝis devigaj lecionoj por la vasta milico en la urboj kaj vilaĝoj. La milicanoj sin ekzercas diligente sur la ekzercejoj en aŭroro por lertigi sian batalarton kaj frakasi ĉiujn malamikojn, kiuj aŭdacos nin ataki. Kaj la gejunuloj kaj geknaboj de la liceoj kaj elementaj lernejoj multe interesiĝis en telekomunikado.

En la vaste disvolvita sporta aktivado de la popolamasoj, aperis granda nombro da avangardaj baznivelaj organizoj. Sportaj agadoj jam fariĝis nemalhavebla parto de la vivo en Kinghua Universitato


de Pekino, la Hujdeli-a Elementa Lernejo de Tiangin, la Dongmen-strata Magazeno de Ningbo, la Aŭtoriparejo de Hengjang, la Vagonara Sekcio de Giamusi, Kingtong-gubernio de Hejlonggiang-provinco k. a. La laboristoj de la Giamusi-a Vagonara Sekcio de la Harbina Fervoja Buroo, unu el la avangardaj organizoj en fizika kulturo de nia lando, persistas, dum pluraj jaroj, disvastigi diversajn malgrandskalajn sportojn kaj akiris rimarkindajn sukcesojn. Konduktorino Vang Gujĝen antaŭe estis tiel malgrasa kaj malforta, ke ŝi bezonis ofte duon-horon por purigi unu vagonon, dum la aliaj nur dekelkajn minutojn. Dum la lastaj jaroj, ŝi persistis en korpaj ekzercoj kaj multe fortikiĝis. Ŝi povas nun trairi unuspire kvin vagonojn kunportante sitelon da akvo, sed antaŭe ŝi devis ripozi unu aŭ du fojojn por trairi unu vagonon. Dank' al sia plifortigo, nun ŝi povas pli bone servi al la pasaĝeroj.

La disvolvigo de la popolamasaj sportaj aktivadoj ne nur ludas bonan rolon en la produktaj laboroj kaj nacidefenda afero, sed ankaŭ provizas firman bazon por elkulturi sportistojn kun monda nivelo. En la Vaporturbina Fabriko de Ŝanhajo tre viglas sportaj agadoj popolamasaj dum la lastaj jaroj. Oni organizis en ĝi centojn da sportaj teamoj. Centoj da personoj tie prenas tablotenison kiel sian ĉiutagan ŝaton. La mondfamaj tablotenisistoj Ĝang Hielin kaj

Jang Fuhua devenis el tiu ĉi fabriko. Oni vidas en unu granda foto, ke Ĝang kaj Jang estas helpantaj la tablotenisan teamon de sia fabriko en ekzercado.

En Guangdong-provinco, kie la sportoj disvolviĝis pli bone, aperis multe da eminentaj sportistoj unuj post aliaj. Nombro da sportaj majstroj aperis en Tajŝan-gubernio, fame konata kiel "la Gubernio de Volebalo", Mejhian-gubernio — "la Gubernio de Piedpilko" kaj

Ankaŭ en la montregiono ĉe la marbordo oni kreis arenon por sportoj.




Dongguan-gubernio — “la Gubernio de Naĝo”, kaj tiuj lokoj fariĝis luliloj de eminentaj sportistoj.

Alia parto de la ekspozicio reliefe montras la atingojn de la tablotenisa kaj montgrimpa teamoj de Ĉinio. La rigardojn de la vizitantoj altiras la kvin premiaj pokaloj kaj vicoj da medaloj, kiujn la ĉinaj tablotenisistoj ricevis

Komunumano Vu Dianlin, la gubernia ĉampiono en dekmil-metra kurado, dum 4 sinsekvaj jaroj, persistas en ekzercado kun aliaj komunumanoj.



Laborantoj de la Ministerio de Karba Industrio persistas en korpaj ekzercoj dum laborpaŭzo.



en la 28-a Monda Ĉampioneca Turniro de Tabloteniso kaj kelke da specimenaj ŝtonpecoj, kiujn ĉinaj grimpisto prenis de sur la montpinto de Ĝolmo Longma kaj prezentis al Prezidanto Maŭ. La vizitantoj ilin rigardadas kun admiro. Kiaj malfaciloj estas nevenkeblaj por nia patrolando, kiu havas tiajn bonegajn geflojn, kiuj tiel kuraĝas batali kaj venki!

La atingoj de tiuj du teamoj estas tamen nur parto de la gloraĵoj de la ĉinaj sportistoj. Fakte multe pli grandnombraj estas iliaj sukcesoj. La okulfrapaj ciferoj “115” kaj “5406” en ruĝo montrataj en du grafikaĵoj montras tion. Ili ne estas ordinaraj ciferoj, sed ciferoj de la mondaj kaj landaj rekordoj, kiujn rompis gesportistoj de la nova Ĉinio.

La sportistoj de la malnova Ĉinio ja neniam rompis mondan rekordon. Sed en la jaro 1956, novĉiniaj sportistoj jam rompis trifoje mondajn rekordojn, kaj de tiu tempo ĝis la unua jaruono de 1965, niaj gesportistoj jam rompis sume 115 mondajn rekordojn. En 1952, nur 7-foje oni rompis landajn rekordojn, sed de tiam ĝis la unua jaruono de 1965 la nombro de rompitaĵoj landaj rekordoj jam atingis 5406. Kaj por la kreo de ĉiu el la novaj rekordoj la sportistoj verŝis oni ne scias kiom da ŝvito. Ili ŝvitis por la gloro de la patrolando! Tiuj atingoj estas la gloro de ĉiuj niaj sportistoj, de la tuta ĉina popolo.

La estiĝo de tia firma kaj vastega bazo de popolamasa sporta aktivado kaj la akiro de la mondnivelaj atingoj en sporto de nia lando ja ne estas senkaŭzaj.



“Disvolvi la fizikan kulturon kaj sportojn por plifortigi fizike la popolon” estas la direkto por la fizika kulturo kaj sportoj de la nova Ĉinio. Por realigi tiun direkton, la partiaj kaj registaraj gvidantoj ĉiam bone zorgas pri la fizikokultura afero kaj la sportistoj. La registaro faris diversajn necesajn aranĝojn, ekzemple elkulturon de laborantoj kaj instruistoj pri fizika kulturo, starigon de sportejoj kaj kluboj de fizika kulturo por nacidefendo, eldonon de libroj kaj gazetoj pri sportoj kaj scienca esploro fizikokultura, kreadon kaj plibonigon de sportaj instrumentoj kaj ekipaĵoj k.c., kiuj ĉiuj certigas vastan disvolvon de sportaj aktivadoj kaj plenumi la bezonojn por rapida altigo de la sporta nivelo kaj elkulturo de granda nombro da eminentaj sportistoj.

Rememorante pri la fizika kulturo en la malnova Ĉinio, oni diris, ke la disvolviĝo de la fizika kulturo de la nova Ĉinio estas komencita de malalta start-nivelo, sed rapide ĝi progresas kaj grandajn sukcesojn akiris. La ekspozicio konvinke pravas la pravecon de tiu diro.

(Ĝong Bi)

**Mondaj Rekordoj Rompitaj
de Niaj Gesportistoj post
la Fondo de la Nova Ĉinio**

**Landaj Rekordoj Rompitaj
de Niaj Gesportistoj post
la Fondo de la Nova Ĉinio**



* KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *



**PARO DE MONGOLAJ
FRATINOJ FARIĜIS SAMTEMPE
SPORTAJ MAJSTRINOJ**

Vuriĝe kaj Ĝalaga, fratinoj de la mongola nacio, estis samtempe titolitaj kiel sportaj majstrinoj antaŭ nelonge de la Ŝtata Komisiono por Fizika Kulturo kaj Sportoj. Ili ambaŭ estas arkpafistinoj.

Vuriĝe, 24-jara, kreis novajn rekordojn en 7 arkpafaj sportoj en la Unua Tutlanda Sportkunveno de 1959. En 1963, kiam ŝi partoprenis en la Unua Sportkunveno de Nove Emerĝantaj Fortoj en Indonezio ŝi gajnis la kvinan lokon en la virina duoblafoja ĉiufaka individua arkpafado. Nun ŝi estas membro de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj kaj antaŭiranta laboranto de la aŭtonoma regiono.

Ĝalaga, 21-jara, antaŭe volebalistino, nur poste eklernis arkpafadon sekvante sian fratinojn. En julio, lastjare ŝi gajnis la trian lokon en la virina unufoja ĉiufaka arkpafado en la amika konkurso de arkpafado inter Ĉinio kaj Indonezio.

**KURACLABORO EN
MONTREGIONO DE JUNNAN-
PROVINCO PLIFORTIĜIS**

La Higiena Buroo de Junnan-provinco transpostenigis 50 junajn kuracistojn kaj flegistojn el provincaj institucioj al la gubernioj Dajaŭ, Hjuntian k. a. en la montregiono por establi kuracejojn.

Tiuj medicinaj laborantoj estas sufiĉe bonaj en sia metio kaj la plejparto de ili partoprenis luktadon kontraŭ la malsano *schistosomiasis* (sangverma malsano), en kamparo dum unu jaro. Ili bone komprenas la urĝan bezonon de kuraclaborantoj en la kamparo kaj la gravecon de plibonigo de la medicina laboro por la montregiona loĝantaro kaj decidis fari kontribuon al la tiea konstruado.

**APERIS BRAJLA ELDONO DE
LA "ELEKTITAJ VERKOJ DE
MAŬ ZEDONG", VOL. I**

La brajla eldono de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong, vol. I*, jam aperis kaj komencis vendiĝi pere de Hinhua-librejo en diversaj lokoj. Tiu ĉi eldono estas pretigita kaj eldonita de la redakcio de la monata

gazeto *La Blindulo* de la Ĉina Asocio de Blinduloj kaj Surdmutuloj.

**HELPI KAMPARANOJN
KOMPRENI FILMOJN DE
SCIENCA POPULARIGO**

Por ke kamparanoj bone komprenu sciencajn filmojn, multaj kamparaj filmoprotekciaj grupoj kaj fakaj filmoprotekciaj grupoj de sciencaj filmoj de Ŝanhi-provinco komencis aranĝi specialajn filmoprezentojn krom ordinara filmoprotekciaj.

La filmojn pri komunaj sciencaj scioj oni prezentas en ordinara filmoprotekciaj, dum tiujn kun fakaj sciencaj scioj oni prezentas krome ankaŭ en specialaj protekciaj por la kadroj, veterana kamparanoj, teknikistoj, membroj de la Tutĉinia Asocio por la Disvastigo de Sciencaj kaj Teknikaj Scioj kaj intelektaj junuloj, por ke ili povu pli bone rigardi, kompreni kaj ellerni. Antaŭ la prezentado oni klarigas al spektantoj la enhavon de la filmo, kaj ripetas la protekciadon, se oni ne povas ĉion kapti dum unu prezento. Post la prezentado oni organizas diskutadon por pristudi la enhavon kaj disvastigi progresajn produktajn teknikojn laŭ la lokaj kondiĉoj. Tion oni nomas "filmokunveno".

KANTONO, Urbo Plena de Internacia Amikeco

GIGANTAJ pasaĝeraj aeroplanoj facilmove surteriĝas unu post alia sur la Internacian Aerodromon de Kantono, baniĝantan en sunbriloj.

Vagonaroj ĝoje fajfantaj alkuras unu post alia el la direkto de Hongkongo.

Oceanaj ŝipegoj alvenas unu post alia al Huangpu-haveno de Kantono.

Aro post aro da alilandaj amikoj kun malsamaj haŭtkoloroj alvenas al Kantono per vojoj aeraj, teraj kaj maraj, alportante amikecon kaj bondezirojn.....

Ho Kantono! Vi urbo, kiu ĝemis sub la hufoj de imperiismo en la pasinteco, nun jam fariĝis la suda pordego de la patrolando por akceptado de popolaj senditoj de amikeco el diversaj landoj!

Kantono estas nun ligita per aeraj linioj kun Kamboĝo kaj Pakistano; per maraj linioj kun la heroa Albanio, la nefleksebla Kubo... kaj ankaŭ aliaj amikaj landoj de Eŭropo, Azio kaj Afriko. Ĉiujare miloj da alilandaj amikoj venas en Kantanon per tiuj vojoj de amikeco.

Alveninte Kantanon, iu verkisto el Ganao, anstataŭ ekriprozi post la laciga vojaĝo, tuj prenis plumon kaj verkis la jenajn patosajn versojn:

*Sonoras kant' en mia koro;
Ĝi estas kanto de adoro,*

Ĝi estas laŭdoplena himno.

Ho, laŭte sonu mia kanto,

La himno mia pri la ĉinoj—

Granda popol' de granda lando!

Ĝi gloru ties luktojn,

Ĝi gloru ties fruktojn,

Ĝi gloru la patriotismon de l' giganto!

.....

Iu amiko el kapitalisma lando de Azio, elaeroplaniĝinte, tuj diris kun entuziasmo: “Ĉinio estas la citadelo de la revoluciaj popoloj de la tuta mondo kaj vera amiko de la subpremataj kaj ekspluatataj popoloj.”

Arday laŭdkantoj longdaŭre sonoras ĉe la oreloj, kortuŝaj scenoj gravuriĝis por ĉiam en la memoro. Ankoraŭ freŝaj estas la memoroj pri la vizito de Marŝalo Kim Il Sung, la estimata kaj amata gvidanto de la korea popolo, al Kantono antaŭ kelkaj jaroj, pri la kelkdek liojn longa homfluo kun buntaj florbukedoj kaj ridantaj vizaĝoj, kiu sin etendis de Tianhe-aerodromo en la orienta antaŭurbo ĝis la gastejo en la norda antaŭurbo, kaj pri la tondre sonoraj kantoj pri la batalkamarada amikeco inter la ĉina kaj korea popoloj. Tiu senprecedence varmega festa sceno restos por ĉiam en la memoro de la kantonanoj. Kiam internacie ruliĝis nigraj nuboj kaj la imperiistoj kaj modernaj reviziistoj freneze kalumniis Ĉinion, k-do D. N. Aidit, la

Perlo-rivero, Kantono.



prezidanto de la Komunista Partio de Indonezio, kaj k-do V. G. Wilcox, la ĝenerala sekretario de la Komunista Partio de Novzlando, vizitis Ĉinion. En Kantono ili faris longajn paroladojn rebatantaj la imperiistojn kaj reviziistojn. Iliaj tinte sonoraj vortoj de vero ĉiam edukas kaj kuraĝigas la kantonajn popolanojn.

La du milionoj da revoluciaj popolanoj de Kantono, same kiel la aliaj popolanoj de la tuta lando, firmdecide subtenas la kontraŭimperiismajn kaj patriotajn luktojn de la subpremataj nacioj kaj popoloj de la tuta mondo kaj forĝis en la komunaj bataloj kontraŭ imperiismo la batalkamaradan amikecon kun la popoloj de diversaj landoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko. Kiel al la batalo de la egipta popolo por reakiri sian suverenecon super Suez en 1956, tiel same al la justa batalo de la panama popolo kontraŭ la sanga buĉado fare de la usonaj imperiistoj por defendi sian nacian suverenecon kaj al la ĉijara revolucia batalo de la dominika popolo por kontraŭstari senŝanceliĝe la armitan subpremadon fare de la usona imperiismo, la kantonanoj, kiuj havas kontraŭimperiisman tradicion, esprimis senescepte sian plej firman subtenon. Ĉe la piedo de la Blanknuba Monto kaj la bordoj de la Perla Rivero tondre resonis iliaj indignaj voĉoj: “For la usonajn imperiistojn el Vjetnamio! El Dominiko! El Japanio! El ĉiuj lokoj de ili okupitaj!”

Ĉiu el la vizitantaj fremdlandaj amikoj, kiuj staras kune kun ni sur la sama batalfronto, la fronto por oponi la agreson de la usona imperiismo, alportas varman kuraĝigon al la kantonaj popolanoj kaj plifortigas nian volon konduki la revolucion ĝis la fino. En la dikaj kaj delikataj memorlibroj ĉe la memordomo de la Lernejo de la Ĉina Kamparana Movado starigita de kamarado Maŭ Zedong en siaj fruaj jaroj, skribiĝis varmaj vortoj diverslingvaj de gastoj el la kvin kontinentoj. Iu revoluciulo el Kongolando (Leopoldvilo) skribis: “la Lernejo de la Ĉina Kamparana Movado nin tre kortuŝis. Ĉi tie estis la kometo, kiu traflugis la ĉielon de Kantono; ĉi tie estis la semoj, el kiuj elkreskis ĉinaj revoluciaj arboj. La batalantoj el tiu ĉi lulilo, armite per pafiloj kaj pensoj de marksism-leninismo, estis, estas kaj estos por ĉiam nevenkeblaj.”

“Ĉinio vere estas granda konstruejo!” diris admire amikoj el Zanzibaro, vidante la grandskalan konstruadon en Kantono. Ili estis tiel altiritaj de la grandioza sceno, ke ili mem iris transporti teron kaj akvon ŝvitante kune kun la laboristoj.....

La alta takso pri la ĉina revolucio fare de alilandaj gastoj post kiam ili vizitis la revoluciajn historiajn restaĵojn en Kantono, kaj la agadoj de alilandaj amikoj aldoni ŝultro-ĉe-ŝultre kun ĉinaj

laboristoj brikojn kaj tegolojn al la ĉina socialisma domego. Ĉu tio ne stimulas nin pli alte teni la ruĝan revolucionan standardon?

Ĉiujare, Huangpu-haveno de Kantono akceptas multajn maristojn el diversaj landoj de la mondo. Kvankam ili estas influitaj de diversaj vidpunktoj en siaj respektivaj landoj, tamen, konatiĝinte kun la nova Ĉinio, iuj el ili, adiaŭante Kantonon, sentas ĉagrenon pro la foriro. Iu diris kun ekscitiĝo: “Foriri de mia dua patrujo mi ja ne volas!” Kial ne tiel? Pro malsano iu alilanda maristo ne povis ĝustatempe enŝipiĝi por labori je la dato de la ekveturo kaj tial estis eksigita de sia kapitalista mastro, sed en Kantono li tamen estis flegata de ĉinaj laboristoj kaj zorge kuracita de ĉinaj doktoroj. Kiam li forlasis la popolan Ĉinion por veturi al sia patrujo, li diris kun larmoj: “Se mi ne estus en Ĉinio, kiu sin ĝenus pro mia malsano aŭ morto!” La klasa frateco de ĉinaj laboristoj varmigis la koron de alilandaj maristoj, kiuj migradas sur maroj. Ili donis siajn donacojn rarajn kaj valorajn al la Marista Klubo de Huangpu-haveno, por esprimi sian dankemon.

Ĉiu herbo kaj arbo en Kantono povas vekti en homoj diversajn sentojn. La maljuna silkkotona arbo (*Gossampnus malabarica*) kun multaj cikatroj proksime de Hajĝu-placo, estas atestanto de la agresio de la brita imperiismo. Sur ĝia trunko ankoraŭ restas la dek najloj, kiujn la koloniistoj enbatis por fiksi kanonon. Ilin rigardante oni ne povas ne ekmemori la humiligitan malnovan Ĉinion. Kaj tamen, kiam vi promenas poste en parko kaj ĝue pririgardas kuriozajn florojn donacitajn de fremdlandaj amikoj, vi certe treege amas nian hodiaŭan feliĉon. Kial ne tiel? Albanaj kamaradoj donacis al Kantono siajn florojn, kiuj kreskis en la apudmara urbo Durres, vjetnamaj popolanoj sendis al Kantono milojn da plantidoj de afrikaj mahagonoj, la plej belaj arboj de Vjetnamio por borderi la stratojn, por ke ili verdigu la stratojn de Kantono.....La floroj simbolas la brilan amikecon kaj la plej belajn bondezirojn.

Kiom da bondeziroj de internaciaj amikoj estas postlasitaj en Kantono, la heroa urbo! Aŭskultu la voĉon de iu amiko el Afriko: “Mi deziras, ke Ĉinio pli rapide kaj kun pli grandaj sukcesoj konstruu socialismon, por ke la pendiga maŝo ĉirkaŭ la kolo de la uŝona imperiismo plistreĉiĝu.”

La kantonaj popolanoj vivantaj en la suda parto de nia patrujo, povas forte senti, ke ni laboras kaj batalas en la arda espero de la internacia proletaro, en la arda espero de la ekspluatataj kaj sklavigitaj popoloj, ke ni estas ĉiam kuraĝigataj de la revolucia entuziasmo de la eksterlandaj amikoj en la kvin kontinentoj. Ĉu ni povus ne impetadi pli rapide sur la ŝoseo de la socialisma konstruado?

Kanto pri la Novo

Abelo ŝatas dolĉan floron,
Anaso litorin-viandon,
Rapidfluejon ŝatas karmo,
Ŝafaro ŝatas herbofrandon.

La turdoj ŝatas turdan trilon,
Ni kanton pri la nova moro.
Tamburas ni kaj salte dancas
Kantante kun ekzalta koro.

Antaŭe la gubernatoro
Galopis rajde kiel pesto;
Se iu restis sur la vojo,
Li tuj pereis sub rajdbesto.

Hodiaŭ la guberniestro
Vizitas nin kun portbastono,
Laboras kun ni ĉiuj kune
Kaj amuziĝas per kanzono.

Per dot', orgio oni devis
Filinon edzinigi "dece",
Sed malfeliĉo tion sekvis:
Malsati devis ŝi senĉese.

Sed nun ni dotas per plugiloj,
Gastigas nur per te', bombonoj,
Sen viandaĵoj kaj sen vino,
Knabinojn plaĉas nov-kanzonoj.

Antaŭe la gemaljunuloj
Baraktis ĝibe antaŭ l' Morto,
Ĝemplendis pro l' peniga vivo;
L' infanojn tranĉis trista vorto.

Sed nun la avoj kaj avinoj
Junule viglas en laboro,
Krom fortan sanon, ili ĝuas
Ja sunan brilon en la koro.

Sincere diru: Kiel eblus
De l' novaj kantoj la apero,
Se ne Ĉinio renoviĝus
Kun novaj moro kaj aferoj?

Se ni ne timus tempoperdon,
Ni ĉiam daŭre kantus ĝoje;
Sed nun ni iras kamplabori,
Ni kantu pli do alifoje.

Trad. Laŭlum

*Sjonsaj-o estas populara formo de sprita kaj humura kantado, kiun kutime prezentas du aŭ kvar personoj alivestitaj kiel maljunuloj kun tamburo ĉe la talio. Ili kantas tamburante kun akompano de aliaj muzikiloj, kaj ili povas fari groteskajn gestojn dum la interludoj.

Kuriozaj Bestoj

HAŜI-RANO


Haŝi-rano (*Rana temporaria chensinensis* David) estas besteto kun relative granda ekonomia valoro. La ĉina kuracilo haŝi-rano oleo produktata de la provincoj Liaŭning, Gilin kaj Hejlonggiang estas farita el sekigitaj ovoduktoj de tiu specio de rano, kaj estas tre bona fortigilo.

Haŝi-rano tre similas al la ordinara rano, kaj ankaŭ ĝia haŭtokoloro aliĝadas konforme al la ŝanĝiĝo de la sezonoj kaj medioj. En aŭtuno kaj vintro ĝi estas bruna kaj en somero flavbruna. Dum la periodo

de la lasta tagdeko de aprilo ĝis tiu de septembro ĝi vivas surtere kaj ŝatas sin kaŝi en la ombro de humida densejo. Aŭtuno estas la plej bona sezono por kapti ĝin, ĉar tiam ĝi estas plej dika kaj grasa kaj facile kaptibla.

De la lasta tagodeko de septembro ĝis tiu de la sekvanta marto, la haŝi-ranoj vivas en akvo. Dum la frosta vintro, ili ofte amasiĝas en la ŝlimo de riverfundo aŭ sub ŝtonoj por vintrodormo pro la ekscito de malvarmo kaj manko de manĝaĵo.

Ĉirkaŭ la komenco de aprilo, ili finas sian vintrodormon, naĝas supren, sekskuniĝas kaj ovometas en proksimaj lagetoj. Poste, la ovoj eldonas ranidojn, kiuj fariĝas sekve junaj ranoj, sume en la daŭro de ĉirkaŭ 50 tagoj.



Nofhan: Letero al Malproksimaj Amikoj (X)

Novaj Festoj de Ĉinio

Karaj geamikoj!

Ver-ŝajne vi trovas grandan intereseon en moroj de la ĉina popolo. Do mi parolu ĉi-foje pri la novaj festoj de Ĉinio.

Ni havas malnovajn tradiciajn festojn, ekzemple, la Printempa Festo, la Duoble-kvina Festo k. a., kiujn EPĈ jam kon-at-igis en siaj paĝoj. Sed la novaj festoj pli multe rilatas kun la modernaj revolucio kaj konstruo de la ĉina popolo kaj formis en ĝia vivo novan tradicion.* Estas 8 tiaj novaj festoj en la jaro, el kiuj la Novjara Tago, Maj-unua kaj Nacia Festo estas de ĉiuj celebrataj*.

La kalendaro kiun Ĉinio uzas estas la gregoria. Ĝi estis alprenita nominale* jam en la jaro 1912; sed antaŭ la Liberiĝo de Ĉinio efektive ĝi uziĝis nur en dokumentoj de la registaro, kaj rilatis malmulte kun la vivo de la popolo. Nur en 1949, post la fondo de la nova Ĉinio, la Novjara Tago laŭ la gregoria kalendaro estis iom post iom akceptita de la vasta popol-amaso en la tuta lando, kaj fariĝis nova festo de la ĉina popolo.

La Maj-unua, tiu internacia festo de laboro, jam de-longe estas celebrata kaj por-batalita de la ĉina laboristaro kiel simbolo* de la slogano* "Proletoj* de ĉiuj landoj, unuigu!" Sed dum la reakcia regado en la malnova Ĉinio, tiu ĉi estis tago de sieĝo-stato*, tago por aresti komunistojn kaj sub-premi laboristojn. Nur en la nova Ĉinio, kie la laborista klaso tenas la reg-povon en siaj manoj ĝi fariĝis vera festotago, kiun la tuta laboranta popolo ĝoje

celebras ĉiujare pro la novaj sukcesoj.

Alia solena tago estas la Nacia Festo, la 1-a de oktobro de ĉiu jaro. La ĉina popolo, kiu multe suferis pro la sklavigo*, ekspluato* kaj subpremo fare de imperiismo kaj ĝiaj lakeoj, ĉiam kun senlima amo kaj ĝojo celebras tiun ĉi tagon de liberigo.

La ceteraj festoj nomiĝas la Juli-unua, la Naskiĝtago de la Komunista Partio de Ĉinio; la Aŭgust-unua, la Armea Tago de la Popola Liberiga Armeo de Ĉinio; la Mart-oka, la Virina Tago; la Maj-kvara, la Junula Tago kaj la Juni-unua, la Infana Tago.

La Komunista Partio de Ĉinio fondiĝis la 1-an de julio, 1921, sekve tiun daton oni fiksas kiel nask-iĝtagon de la Partio. Depost la Opio-milito en 1840, Ĉinio iom post iom fariĝis duon-kolonio de ĉiuj imperiismaj landoj. En la pasintaj cent jaroj, la ĉina popolo faris longdaŭran heroan batalon kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo*. Sed nenian veran venkon ĝi atingis ĝis la fondo de la Komunista Partio, kiu montris la ĝustajn celon, direkton kaj rimedojn de batalado por la liberigo de la ĉina popolo, gajnis unu venkon post alia, kaj ebligis ke ĝi fine atingis la plenan liberiĝon.

La Unua de Aŭgusto estas la Armea Tago de la PLA de Ĉinio. Dum la periodo de 1924 ĝis 1927, la ĉina revolucio tre multe disvolviĝis* dank' al la kunlaboro de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Ĉina Kuomintang-o. Sed en 1927, Ĉiang Kajŝek lanĉis* reakcian ŝtat-renverŝon, kaj detruis la kunlaboron de ambaŭ partioj. Por savi la revolucion el malsukceso, kamaradoj Ĝoŭ Enlaj, He Long, Je Ting, Ĝu De, Liu Boĉeng k. a. komandis tridek mil trupanojn* leviĝi en armita ribelo* la 1-an de aŭg. en Nanĉang, Gianghi-provinco kaj starigis la Ruĝan Armeon de Laboristoj kaj Kampanoj de Ĉinio (nun Popola Liberiga Armeo de Ĉinio). Tiu ĉi ribelo komencis oponi la armitan kontraŭ-revoluciaron per la revolucia armita forto memstare gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio. Tra pluraj enlandaj revoluciaj militoj kaj la Kontraŭjapana Rezistmilito, fine ĝi venkis la malamikojn enlandajn kaj

eksterlandajn kaj sekve fondiĝis la Ĉina Popola Respubliko.

Ankaŭ Maj-kvara, la Junula Festo estas tago kiu multe rilatas kun la moderna revolucio de Ĉinio. La 4-an de majo, 1919, studentoj de Pekino organizis fortan manifestacion por protesti kontraŭ la imperiismaj landoj, kiuj en la Pariza Paco-konferenco subtenis la japanan imperiismon en ĝia agresado kontraŭ Ĉinio. Tuj poste respondoj venis el diversaj lokoj kaj dis-volviĝis revolucia movado kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo partoprenata de la tuta popolo de Ĉinio. Tial tiu ĉi tago nun fariĝis la festotago por la ĉinaj junuloj.

Mart-oka, la Virina Tago, kaj Juni-unua, la Infana Tago ĉiuj estas festotagoj internaciaj. En la malnova Ĉinio oni ankaŭ ilin festis. Sed ĉar tiam Ĉinio estis duon-kolonio kaj sub la kruela reakcia regado, la vastaj amasoj de laborantaj virinoj kaj infanoj de laboruloj eĉ ne povis sin savi el malsato kaj mortominaco; por ne paroli pri liberiĝo kaj bonstato, nek pri siaj festoj. Nun, la virinoj de la nova Ĉinio jam sin liberigis kaj egaliĝis kun la viroj en la kampoj de politiko, ekonomio kaj aliaj. La infanoj estas pli ol iam antaŭe prizorgataj de ĉiuj. Tial ĉi tiu internacia festotago vere fariĝis ilia festo de ĝojo.

Rakontoj pri Afanti

KIEL VI SCIAS?

Kiam Afanti skribis leteron al sia amiko, iu venis al li ne-rimarkite kaj kaŝe rigardis post li. Afanti tion rimarkis kaj daŭrigis la skribadon jene:

"...Mi havas multon por skribi al vi, sed nun senhonta malĝentilulo



staras post mi kaj kaŝe legas mian leteron. . . .”

Tion leginte, la malĝentilulo ek-koleris kaj sin turnis vizaĝe al Afanti demandante:

“Kial vi senkaŭze min ofendas? Pro kio mi kaŝ-legus vian leteron?”

“Se vi ne kaŝ-legus, kiel do vi scias, ke mi skribis pri via kaŝ-lego!”

PREFERE MORTI FRUE

Dum mil-famili-estro manĝis ŝaf-aĵon, osto kaptiĝis en lia gorĝo*. Ĝin li povis ne eligi nek engluti, kaj ĝi terure lin doloris. Neniu el la kuracistoj, kiujn li invitis, povis lin helpi, kaj fine li devis sendi iun al Afanti por peti lian helpon.

Afanti donis leteron al la sendito dirante, ke lego de la letero efikos pli bone ol kuracilo.

La sendito rapidis hejmen kun la letero kaj ĝin transdonis al la mil-familiestro. Leginte la leteron, tiu ĉi kriegis kaj mortis kun teruraj okuloj. Oni prenis la leteron kaj legis:

“Mil-famili-estra Moŝto! Vi faris malbonojn dum la tuta vivo, kaj ankaŭ la ŝafo, kiun vi manĝis hodiaŭ, estas prenita de vi el la domo de malriĉulo. Estas via feliĉo, ke vin mortigas la ŝaf-osto. Kial peti kuracilon? Prefere mortu frue!”

Nia Vortareto

celebr-i — festi.

dis-volv-i — pli-vast-igi.

ekspluat-i — uzi por si la fruktojn de ies laboro sen sufiĉa pago.

feŭd-ism-o — soci-sistemo, laŭ kiu regas la ter-posed-antoj.

gorĝ-o — interna parto de la kolo.

lanĉ-i — ekfari.

nominal-e — en nomo.

prolet-o — homo, kiu viv-tenas sin per vendo de sia labor-forto.

ribel-i — rifuzi obeon al estr-aro.

sieĝo-stat-o — stato de batal-preteco.

simbol-o — signo por io.

sklav-o — homo apartenanta al alia homo kiel posedajo.

slogan-o — frazo por propagando.

tradici-o — kutimoj, ideoj ktp. transdonataj de unu generacio al alia.

trup-o — arme-parto.



TO HUU: ELEKTITAJ POEMOJ— eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1964; formato 13×19 cm., 229 p.; tradukita de Dao Anh Kha.

Libro vere kortuŝa! Mi devas forte rekomendi ĝin al la esperantistaro.

La libro enhavas antaŭparolon de profesoro Dang Thai Mai kaj 42 poemojn de la poeto, kiuj, krom tri freŝdate verkitaj poemoj, estas elektitaj el la tri poemaroj: *De Tiam*, *Vjet-Norda* kaj *Libera Vento*. La vjetnam-stilaj ilustraĵoj estas simplaj kaj vivecaj. Estas aldonitaj ĉe la fino glosaro kaj klarigaj notoj, kiuj helpas al la legantoj pli bone kompreni la libron.

Jam delonge mi legis poemojn de ĉi tiu revolucia poeto en E-gazeto. Mi scias, ke multaj vjetnamoj povas parkeri liajn plurajn poemojn, ĉar li estas revolucia poeto-batalanto, kiu ĉiam batalas kaj kantas kune kun la popolo. Li estis arestita kaj sendata de punlaborejo al punlaborejo. Agante meze de la revolucia popolamaso li forĝis sian animon en la batalo. Amo al la patrio kaj la Partio de Laboro kaj malamo al la malamikoj, jen estas du ĉefaj linioj, kiuj interligas liajn poemojn.

El la poemaro *De Tiam* oni povas vidi, kiom la vjetnama popolo suferis sub la duobla jugo de la franca koloniismo kaj la japana faŝismo kaj kiel la poeto vekigis kaj senhezite ĵetis sin en la revolucionan bataladon. Multaj poemoj el *De Tiam* estis verkitaj en malliberejoj de la malamikoj, kie la poeto ĉiurimede daŭrigis la bataladon kune kun aliaj malliberuloj. Ĉi tiuj batakantoj inspiris kaj kuraĝigis liajn kamaradojn por pli firma batalado kaj vekis la mizerulojn leviĝi kontraŭ la kruele-gan reĝimon. Ekzemple, el la poemo “Fiŝaĵo, saŭkraŭto” oni povas vidi, kiel la malliberuloj persistis en fastostriko. Kiel ajn la malsatego kaj tentoj atakis ĉi tiujn heroojn, por la venko ili tamen ĵuris: “Ni . . . kune vivu, kune mortu, pro nenio ni perfidu. . .” Tiaj revoluciuloj estis ĉiam pretaj oferi sian vivon por la revolucia afero. La poeto kantis optimisme:

*Ho fratoj, adiaŭ, kaj al vi la flamo!
Ni ĉiuj sur fronto neniam kankriras
Por Revolucio ni ĉiuj jam vivas,
Nature ni mortos pro Revolucio,
Rideto sur lipoj, sen ĵuro je Dio!
(Testamento)*

Vjet-norda estas verkita dum la okjara Tutlanda Rezistmilito kontraŭ la francaj invadantoj. Amo al la patrio kaj kara Onklo Ho, la estiminda gvidanto de la vjetnama popolo, ĝojo pro la granda venko de Djenbjen-fu, la batalvivo kaj heroaĵoj de la armeanoj kaj gerilanoj kaj la vigla vivo en Nordo post la pacrestariĝo, — tio estis ĉefaj fontoj de lia verkado. Kaj cetere li estis bona lirikisto. La poemo “Vjet-bak” elspiras la nostalgion de tiu, kiu devis adiaŭi pro revolucio la montarojn de Vjetbak, lulilo de la vjetnama revolucio. Profundaj kaj kortuŝaj estas la sentoj. La plejparto de *Libera Vento* kaj la tri freŝdate verkitaj poemoj preskaŭ havas du komunajn temojn: la socialisma konstruado en la Nordo kaj la batalo por nacia reunuiĝo en la Sudo. Kun fiero kaj ĝojego la poeto laŭdkantis:

Ho, kiom plaĉas de Nordlando la poemo

Tre libera, tial gaja en la gamo, temo!

*La spaco kvazaŭ iĝus pli proksima,
La tempo ankaŭ ŝajnas distriĝema,
Rejunas vivo. Ĉio revoluciigigas,
Solecon, privatecon, mizeron forigas
Nia hejmlero, por la ĝojo kolektiva,
Nia kamparo, por laboro produktiva.*

(Kanto de Printempo 1961)

Kia belega bildo! Tamen la poeto neniam forgesas siajn gefratojn suferantajn en la Sudo:

Kiel trankviliĝi? Ho, Sudo, sango fluas

*Jam ok jarojn. Matene ĉe vekigo,
Suferas tiom mia koro*

Kaj duono de la korp' doloras.

(Kiel Trankviliĝi?)

Unuigita lando devus esti Vjetnamio, kaj la reunuiĝo devus okazi en julio de 1956, laŭ la Ĝenevaj Interkonsentoj pri Indoĉinio. Estas la usona imperiismo, kiu disŝiris la Interkonsentojn kaj perforte okupas Sud-Vjetnamion kaj terure torturas kaj masakras la sud-vjetnamajn popolanojn. La usonaj demonoj venenas senkulpajn homojn, elŝiras

homajn hepatojn kaj eĉ manĝas homan karnon! La poemo "Letero el Ben-tre" priskribas la tragedion okazintan en vilaĝoj de la provinco Ben-tre. La sud-vjetnamaj popolanoj ja estas veraj herooj, kiujn povas timigi nenia teruraĵo. Ili sin armis kaj brave bataladas. En bataloj iuj falas, aliaj leviĝas armitaj, kaj eĉ:

*Ĉi tie la mortintoj kun vivantoj
marŝas,
Kun vivo, morto por revenĝi solidaras.
Armitaj ni leviĝis, kelkbatalojn ni travivis
Kaj nia ter' de Mo-kaj sub l' standardo reviviĝis.
(Letero el Ben-tre)*

La usonaj rabistoj ne sole buĉas pli terure sudvjetnamajn popolanojn, sed eĉ etendas siajn sangoplenajn ungegojn al la Nordo. Sed la vjetnama popolo pli forte batas la usonan imperiismon por la kara patrio, por ĝiaj belaj montoj kaj riveroj, por la socialisma konstruado kaj por la vera mondpaco, kun pli multe da malamo. Brilan ekzemplon al la tutmonda popolo donas la vjetnama popolo, kiel la poeto kantis:

*Sudo, jen, lumturo sur la mara vasto
Brile montras vojon tra l' nokturganoj.
— Nepre kuru orienten kaj antaŭen,
He ho, ĉiuj ŝipoj sur la oceanoj!
(Kiel Trankviliĝi?)*

To Huu estas tia poeto, kiu kapablas genie harmoniigi la lingvon kun siaj sentoj. Legante liajn poemojn, mi, kune kun li, jen malĝojis, jen indignis, jen ekstazis, jen sopiris... Rilate la tradukon, mi povas diri, ke k-do Dao Anh Kha, sperta esperantisto-poeto tre lerte konservis la simplecon en stilo kaj la muzikecon en ritmo de la originalo. Tamen, bedaŭrinde, en ĝi mi trovis ne malmultajn neologismojn (kelkaj el ili eĉ ne troviĝas en la glosaro!) kaj esprimojn nekutimajn, kiuj ĝenas la legadon. Oni renkontis en ĝi ankaŭ kelkajn okulfrapajn preserojn. Sed tio neniom malhelpas, ke ĉi tiu libro okupu relative altan

INTER NI

Parolas Legantoj

Angloj por la Vjetnama Popolo

Mi ĝojas skribi ankoraŭ al vi, trans la mondo, en Ĉinio. Mi neniam vidis vin, sed mi jam konas vin per nia komuna lingvo, kaj per la bela gazeto El Popola Ĉinio, k. t. p. Mi legas ne nur pri politikaj aferoj, sed ankaŭ pri tabloteniso kaj aliaj sportoj. Malĝojiĝas mia koro pri la Vjetnama afero, sed mi estas kun ili en la batalado kontraŭ la usona agreso, kaj mi portas kvadratan insignon sur mia jako en angla lingvo — "Unuiĝintaj Ŝtatoj, For — Lasu Vjetnamion". Socialista gazeto ĉi-tie portas la vortojn "Venko al la Vjetnama Demokratia Respubliko". Kvankam la Brita Registaro ŝajnas montri la usonan vidpunkton kaj esti kun ili en la milito, multaj civitanoj en Britio estas kontraŭ la oficiala vidpunkto kaj iliaj koroj batas kune kun la vjetnama popolo.

s-ro Fred R. Berry, Britio.

Por Ĉesigi la Imperiistan Krimon!

Mi studis la du dokumentojn (la broŝurojn, "Certe Triumfos la Popolo de Vjetnamio" kaj "Komento pri la Marta Kunveno de Moskvo") kun granda intereso, precipe interesis min la artikoloj kaj la

fotografioj de la unua broŝuro. Neniam mi suspektis pri la fi-agado de la kapitalistaj potencoj, ĝis mi vidis viajn presitajn atestaĵojn; ĉi-tie neniam la ĵurnaloj mencias la abomenaĵojn kiuj nun okazas en Vjetnamio pere de la tiel nomataj civilizitaj nacioj.

Mi gratulas al vi pro la dissendo de la veraĵoj, kaj vi devas daŭrigi ĝin, por sciigi la ne-informitajn popolanojn de nia lando, kaj inspiri ilin ĉesigi la imperiistan krimon kontraŭ niaj kamaradoj en Azio.

S. Drake, Aŭstralio.

Lerni Veron el EPĈ

Mi jam legis la unuan numeron de EPĈ kaj mi ŝatis ĝin multege. El ĝi mi eklernas la veron pri la ĉina popola vivo, kulturo, arto k. t. p., kaj pri la milito de la popolo vjetnama kontraŭ la usona agreso kaj imperiismo.

V. Leal R., Italio.

Grava Informilo

Kion diri pri EPĈ? Por mi, ĝi estas la plej interesa kaj fortimpresa ESPERANTO-revuo kaj pro tio ankaŭ la plej rekomendinda. Por la okcidentanoj EPĈ signifas gravan informilon pri la energia progresado sur ĉiuj kampoj de la ĉina vivo, pri kiu la gazetaro de la Germana Federacia Respubliko silentas.

Pro tio EPĈ estas granda helpilo en la manoj de ĉiu progresema esperantisto en okcidentaj landoj.

W. E. I. L. Kurt, Germanio.

Ne Nur pri Ĉinio Mem!

.....
Unuavide El Popola Ĉinio estas plena de artikoloj de nur Ĉinio mem. Sed mi deziras ke vi diskutu ankaŭ interrilatojn de Ĉinio kaj aliaj landoj.

Takao OKAMOTO, Japanio.

Ankaŭ Teorie Politikaj

La tuta enhavo de la gazeto estas tre interesa!

Laŭ mia opinio estus tre utile, se troviĝus en la gazeto ankaŭ artikoloj teorie politikaj (ne nur politikaj raportaj artikoloj), por ke la eksterlandanoj povu konatiĝi kun sciencaj opinioj de la Ĉina Kompartio kaj ĉinaj estroj je diversaj gravaj aferoj. Mi opinias, ke la esperantisma karaktero de la gazeto ne estus obstaklo por tiu afero. Novaj verkoj de Maŭ Zedong kaj aliaj ĉinaj estroj estas preskaŭ nehavigeblaj.

Z. P., Ĉeĥoslovakio.

Esperanto kaj Socialismo

Mi ŝategas EPĈ-n, ĉar el ĝi mi povas ĉerpi multan revoluciecon! Ĝi plaĉas al mi, sed pliiĝu ĝian revoluciecon kaj des pli ĝi agrablas al mi! Miaopinie la sorto de Esperanto, "racia lingvo" estas nedisigebla kun la sorto de socialismo "racia socio".

Esperanto kontraŭbatalas la lingvan imperiismon!! Socialismo, la internacian imperiismon!!

Mello E. D. G., Italio.

Presprovaĵo por la **ESPERANTA BILDOVORTARO** — Pri eldono de tiu ĉi valora vortaro en Esperanto entreprenata de la Esperanto Press en Kanado, EPCĉ jam raportis sur p. 91 en 1964. Nun mi ĝojas konstati, ke la laboro bone progresis. La senditaj presprovaĵoj enhavas nur 30 bildotabelojn kun vortklarigoj, do apenaŭ dekonon de la tuta vortaro. Tamen el tiu ĉi eta parto de la libro oni jam povas konkludi, ke ĝi estos valorega kaj delonge atendata vortaro de la esperantistoj. Al multaj ne-facile klarigeblaj vortoj ĝi donos tujan simplan tamen precizan kaj facile memoreblan komprenon. Kaj krome ĝi faciligos la trovon de ĝustaj terminoj de iuj objektoj.

En la presprovaĵo mi konstatis, ke la elektado de terminoj estas sufiĉe zorgeme farita. En multaj lokoj, ĝi preferas derivaĵojn aŭ kunmetaĵojn ol tute novajn radikojn, aŭ ĝi metis derivaĵojn unue kaj la respondajn novajn radikojn parenteze. Tiu ĉi principo estas aprobinda, pli vaste aplikinda kaj verŝajne tre grava, se oni volas, ke la lingvo estu tutmonda sed ne nur eŭropa. Al ŝajne neeviteblaj novaj radikoj, ĝi metas specialajn markojn, ke oni ne tro libere uzu ilin.

Cetere troviĝas diskutindaĵoj en la presprovaĵo. Ekzemple la bildotabelo 52 en la enhavolisto estas titolita "ĉiotenejo" kaj interne "formetejo". Ŝajne la lasta ne estas pli bona ol la unua. En bildotabelo 302, la muzikiloj en la bildoj 49, 51 estas nomataj "perkutinstrumentoj", ŝajne ili ne estas tiel facile kompreneblaj kiel "frap-instrumentoj". Ja ankaŭ tiuj en la bildoj 54, 56 estas nomataj frapiloj. Ankaŭ la originalo ne estas senmanka. Ekzemple, la bildotabelo 36 enhavas 17 specojn da kapvestoj kaj la ceteraj troviĝas en aliaj bildotabeloj. Tiukaze estas rekomendinde fari referencan markon sub la koncerna bildotabelo.

Kiu volas akiri tiun presprovaĵon, aŭ esti ĝia kunlaboranto rekte skribu al **ESPERANTO PRESS**, Cardiff, Ontario, Kanado.

H. F.



LA UNUA ESPERANTA FILMO EL ĈINIO

En julio de la kuranta jaro, la Centra Farejo de Novajaj kaj Dokumentaj Filmoj produktis, en kunlaboro de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la Centra Popola Radiostacio, esperantan koloran filmon "Brila Festotago". Ĝi estas dokumenta filmo 1450 metrojn longa, kies prezentado povas daŭri ĉ. unu horon.

La filmo ĉefe montras la celebrajn agadojn pri la 15-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko kaj la celebran paradon en Pekino. Alvenis al Pekino por partopreni la celebradon pioniraj laborantoj, labormodeloj kaj reprezentantoj el diversaj rondoj kaj ankaŭ multaj fremdlandaj geamikoj. Kune kun ili kaj la pekina popolo, Prezidanto Maŭ kaj aliaj ŝtataj gvidantoj partoprenis la celebrajn agadojn, inkluzive la antaŭvesperan akceptadon kaj festvesperan amuziĝon kun fantaziaj artfajraĵoj. La filmo montras ankaŭ la fonon de la festocelebrado: la naturaj belaĵoj kaj lastatempaj industriaj kaj agrokulturaĵoj atingoj de Ĉinio. Krome, ĝi prezentas ankaŭ la paradojn en pluraj gravaj urbegoj de Ĉinio.

La filmo per belaj bildoj koncize montras al la spektantoj la veran fizionomion de Ĉinio kaj ĝia popolo en diversaj flankoj.

KUNVENO DE ORIENTBERLINAJ ESPERANTISTOJ

La unua kunveno de orientberlinaj esperantistoj estis okazigita je la 17-a de junio, 1965 en Kulturdomo "Erich Frenz". Ĉeestis preskaŭ 110 personoj el 180 invititoj. Diversaj demandoj pri E-movado kaj esperantaj laboroj estis vigle diskutitaj.

Estiĝis perspektivoj eldoni vortarojn, lernolibrojn (unue estas anstataŭotaj per multobligitaj lecionoj). Tian kunvenon oni intencas okazigi ĉiusemajne por paroladoj, diskutoj, konversacio, ludoj ktp.

H. M. DDR

MULTAJ HUNGARAJ PROSPEKTOJ EN ESPERANTO

Sekvante la ĉefan eldonejon de prospektoj: IBUSZ, ankaŭ la provincaj turismaj oficejoj sinsekve eldonas belajn prospektojn kun Esperantotekstoj.

La turisma oficejo de la Departemento Borsod-abuj-zemplén en Nordhungarlando eldonis lastjare tri belajn esperantajn faldprospektojn. Unu el ili estas kolore presita. Krome ĝi eldonis fotokajeron pri Nordhungarlando kun klarigo en Esperanto krom aliaj kvin lingvoj. Ankaŭ la Departemento Baranya, de la turisma oficejo eldonis samnombrajn prospektojn kun esperanta klarigo.

P. B. Hungario



Enigmo

KIES ĈEVALO Pli MALRAPIDAS?

Mortanta maljuna araba tribestro diris al siaj du filoj: "Rigardu al la palmo mil metrojn fora! Faru rajdkonkurson inter vi post mia morto, kaj kiu ĝin atingos pli malfrue, tiu estos mia anstataŭanto." La tribestro mortis kaj la filoj surĉevaliĝis por konkurso. Sed la konkurson ili ne povis komenci, ĉar ili ambaŭ deziris atingi la lokon pli malfrue.

Ili ne sciis kion fari. Ĝuste tiam venis saĝulo, al kiu ili ripetis la diron de la patro kaj demandis lin kiel konkursi. La saĝulo prenis al si iliajn kapojn kaj flustris al ili en la orelojn nur unu frazon. Post tio la fratoj kuregis al la ĉevaloj kaj komencis la konkurson.

Kion la saĝulo flustris al ili?

(Proponita de s-ano Michl Ehbauer.

Solve troviĝas en tiu ĉi numero.)

VERKOJ DE MAŬ ZEDONG

	Rb.	£	Ff.	Gld.
Pri Praktiko (verkita en 1937)	0.09	0-0-8	0.50	0.35
Pri Kontraŭdiro (verkita en 1937)	0.13	0-1-0	0.70	0.55
La Ĉina Revolucio kaj la Komunista Partio de Ĉinio (verkita en 1939)	0.10	0-0-9	0.50	0.40
Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an (verkita en 1942)	0.09	0-0-9	0.50	0.35
La Aktuala Situacio kaj Nia Politiko post la Venko en la Kontraŭ-japana Rezistmilito (verkita en 1945)	0.09	0-0-6	0.35	0.25
Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong (verkita en 1946)	0.08	0-0-6	0.35	0.25
La Nuna Situacio kaj Niaj Taskoj (verkita en 1947)	0.07	0-0-7	0.40	0.30
Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio (verkita en 1949)	0.07	0-0-7	0.40	0.30
Pri Popoldemokratia Diktaturo (verkita en 1949)	0.08	0-0-8	0.50	0.30
Komentarioj pri la Blanka Libro (verkita en 1949)	0.13	0-1-0	0.70	0.50
Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (verkita en 1957)	0.13	0-1-0	0.70	0.50

Mendu ĉe niaj diverslandaj perantoj aŭ rekte ĉe ni.

Libro-servo de Ĉina Esperanto-Ligo

P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

KORESPONDI DEZIRAS

Ni ricevis denove plendon, ke iuj el la korespond-anoncintoj ne plenumis sian devon respondi aŭ reciproki interŝanĝaĵojn almenaŭ unu fojon al la skribintoj. Ni esperas, ke la anoncintoj ne tiel misuzos nian anoncoservon kaj garantios la plenumon de sia devo.

La Red.

* S-ro Vladimir Folynek, apotekisto, 28-jara, MALACKY 1071, Ĉeĥoslovakio, kun gekolegoj el ĉ. 1.

* S-ro Nikola Minĉev, Bul. "Lenin" 74, Plovdiv, Bulgario, kun Ĉinio, Indonezio,

Japanio, Aŭstrio kaj Germanio pri ĉt. kaj interŝ. neuzitaj pm. Respondo garantiata.

* Shaban Hasani, Petkaj Shmri, Kukes, Albanio, pri vivkulturo k. interŝ. pm. bk. kun ĉiu lando.

* Mi esperas, ke la legantoj de "El Popola Ĉinio", skribos al mi tiel ke ni fariĝu amikoj. Sendu al G. Stephenson, "Hazelwood", Langshott, Horley Surrey, Anglio.

*WOJAS Stanisława, Krakow, Falata 14-46, Pollando, kun pliaĝaj ĉinaj, japanaj, vjetnamaj k. a. aziaj kaj afrikaj geesp-istoj pri popola vivo, kutimo, legendoj ktp kaj interŝ. esp. librojn, gazetojn, pk.

* Henrikas Antaravičius, Ŝilalas raj, Laukuva, Litovio-SSR. 19-j. studento de muzika lernejo, kun geesp-istoj el Azio, kaj interŝ. pk. pm.

* Li Vi Hin, Pabrik Badja Trikora, Tjilegon, Indonezia, kun geesp-tistoj el ĉl. pri ĉt.

* Nagy Laszlo, V. Lucaciu 11, Carei,

Rumanio, kun esp-tistoj el Azio kaj Afriko pri geografio kaj pentraĵo.

* 200 gelernantoj de Ginásio Lara Vilela dez. kor. por perfektigi Esperanton. Resp. garantiataj. Sendu al Prof. Francisco Corréa Neto, Rua 15 de Novembro 228, aptº. 304-Niteroi, Brazilo.

* D-ro Luigi Bardo, homeopatia kuracisto, via Biassa n. 45, La Spezia, Italio, serĉas kolegojn por interŝ. spertojn kaj medikamentojn, eble ĉinajn.

*Membroj de "Koresponda Rondo" en Teknikumo Energetika, Wroclaw, Pollando, str. Bossak-Hanke 27, dez. kor. per pk. kun junuloj de la tuta mondo. Sendu al: Marian Tyszkiewicz, ul. L. Pasteura 16 m. 3, Wroclaw-2, Pollando.

*Szasz Tibor, Sf. Gheorghe, str. Lenin 49-a, Reg. Brasov, Rumanio. Kun ĉl. pri ĉ. t. prefere matematikaj, ŝakaj kaj brigaj.

*Hugo Pilvik, USSR. Estonio, Vasalemma. Mekanikisto. Dez. kor. pri ĉio kun ĉiuj el tuta mondo, interŝ. amatorfotojn. Respondas al ĉiuj per leteroj afrankitaj filatelie.

INDEKSO DE EPĈ 1965

(La titoloj kun "*" estas informoj el "kurantaj aferoj")

POLITIKO

Deklaro de Prezidanto Maŭ Zedong por subteni la popolon de Kongolando (Leopoldvil) kontraŭ usona agreso	4
*La ĉina popolo subtenas Kongolandon (Leopoldvil) kontraŭ uson-belgia agreso	4
*Usona rekognoska aeroplano faligita en Ĉinio..	4
Kiamaniere la nova Ĉinio eliminis senlaborecon Ĝojigaj aferoj (notoj pri la unua sesio de la Tria Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj)	52
*La ĉina registaro subtenas Indonezion eligi el UNO	62
*Ĉinio amikiĝis kun du pliaj landoj en Afriko..	62
*Ĉinio forte riproĉis la usonan imperiismon pro ĝia disetendo de la militfajro en Sudvjetnamio	70
Ordinara laborulo	79
*Du pliaj uson-ĉiang-aj aviadiloj estas faligitaj..	80
*Servutulo fariĝis gvidanta funkciulo	80
Rakonto pri papero kaj skribilo	85
Antaŭenmarŝo de la tibeta historio	109
*Ĉinio rekonis Gambion	111
En tribunalo de la malamiko	140
Surpriza atako (Letero el Hanojo)	142
La voĉo de la popolo de suda Vjetnamio	144
Deklaro de Maŭ Zedong por subteni la dominikan popolon kontraŭ la usona armita agreso	160
La vjetnama problemo	162
Granda venko de la Bandung-spirito	170
La popola armeo de Ĉinio	174
Dank' al lernado de verkoj de Prezidanto Maŭ..	204
Kiel Usono disŝiris la Ĝenevajn Interkonsentojn	211
La Unua Azi-afrika Konferenco	213
Aklamo al la fondo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono	227
Nova Tibeto post la demokratia reformo (bildopaĝoj)	251
La ridindaj usonaj "strategiaj aeroplanoj"	262
Memore al la 20-a datreveno de la venko de la ĉina popolo en sia Kontraŭjapana Rezistmilito	283

Antaŭen rapidas la nova Tibeto	284
La milita situacio en suda Vjetnamio	288
Vivu la venko de la popola milito!	320
Nokta surprizatako al Jangmingbau	324

EKONOMIA KONSTRUADO

La disvolviĝo de ŝoseokonstruado	12
*Nova betatrono	17
*Filmbaza fabriko	17
Ginggang-monto hodiaŭ	36
Ponto al feliĉo	51
La popolkomunumoj en Ĉinio	56
Naskiĝo de 12,000-tuna hidraŭlika premilo....	63
*Formiĝo per eksplodo	80
*Pli ol mil specoj da ŝtalproduktoj	80
*Industrio de ekipaĵoj por ŝtonolea produkto....	80
*Novaj fabrikoj en Tibeto	80
*Disvolviĝo en forstigado	94
*Gasturbina generatoro	111
*Ultrasona rulveldilo	111
De najlo-importo ĝis maŝin-eksporto	112
La civila aviado de Ĉinio	114
Ŝanĝoj en la fruktoproduktejo	116
*2,289 fornoj da ŝtalo en kontinuo	116
*400-tuna premulda maŝino provfarita	116
*Nova specio de sorgo elkulturita	117
*Subakva elektrovelo	117
Kamparo sur la vojo de elektrigo kaj mekanikigo	118
*Du precizaj instrumentoj sukcese provfabrikitaj de Ĉinio	150
Bari maron kaj trabori monton por riĉa rikolto	199, 255
Granda faro de malgranda fabriko	201
*La unua ureo-produkta ekipaĵo en Ĉinio	203
*Alia fosfat-sterko	203
*Pli ol 30 specoj de gaso-malŝargaj ampoloj	203
*Ledfarejo en Lhasa	203
*Nova fruktarbaro flegata en Kantono	203
Nova tajdo en produktado kaj konstruado	228
Konkurso inter fabrikoj de Pekino kaj Tiangin	236
Aromas rizo riverborde	239
Ĝusta vojo de agronomia eksperimentado	242

La nova fizionomio de la agrikulturo sur la monda tegmento	248
*Novtipa ultrasona dikec-mezurilo	259
*Ekipaĵo por samtempa interpretado	259
*24-eksponenta elektrona analoga komputmaŝino	259
*Malgranda transistora diktafono	259
*30-taga horloĝo	262
*Elektro trans la Flavan Riveron	262
*Ŝosea konstruado en Interna Mongolio	262
*Novaj specioj de sorgo	262
*Pliprodukto de ŝafidoj en Kinghaj	262
Ŝtata Agrokulturejo ĉe Gobia Dezerto	299
La Dua Ilmaŝina Fabriko de Pekino	302
La produkto de ĉiutagaj vivbezonaĵoj de Tiangin	304
La provizado de legomoj en Pekino	311
*Ŝpinteksaj ekipaĵoj	298
*Nova procedo por produkti kemisterkon	298
*Elektrona mikroskopo ducentmilobla	298
*Tibetlingva skribomaŝino	306
*Artefarita rivero	306
*Fluoreska pigmento	306
*Riĉa rikolto de printempaj kokonoj	306
*Disŝuti fiŝidojn per aviadiloj	306
*Abundaj Tomatoj en Pekino	316

*Estas pli ol 400 specoj de birdoj kaj bestoj sur Hajnan-insulo	212
Duonlabora-duonlernaj mezlernejoj en Pekino ..	212
Homo antaŭ 500,000 jaroj	214
La homfosilioj malkovritaj en Ĉinio	216
*Moveblaj lernejoj en tendoj	263
Rekunigo de mamuta dinosaŭra fosilio	273
*53-kilograma gras-tumoro fortranĉita	273
*Tibetaj Traktoristoj	316
*Finiĝis la Tutlanda Belarta Ekspozicio	316
*La unua duonlabora-duonlerna teknika lernejo en Tibeto	316
*Eldoniĝis du kolektoj de raportaĵoj pri la kontraŭsona batalo de la vjetnama popolo	327
*Kultura ĉaro en la kamparo	327
*Paro de mongolaj fratinoj fariĝis samtempe sportaj majstrinoj	331
*Kuraclaboro en montregiono de Junnan-provinco plifortiĝis	331
*Aperis brajla eldono de la "Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong, Vol. I	331
*Helpi kamparanojn kompreni filmojn de scienca popularigo	331

LITERATURO

Lampolumoj (eseo)	34
Rakonto pri dormo (popola rakonto)	35
Por lerno de riĉrikolta sperto (nova popolkanto) ..	43
Ke floroj belu sen pluvfalo (nova popolkanto) ..	43
Eterna kiaj mont' kaj maro (nova popolkanto) ..	43
Jen klara akvo kuras (nova popolkanto)	43
Transloĝiĝo (novelo)	88
Konstrui novan domon (nova rakonto)	124
La unua tago (poemo)	135
Historio de liberigita servutulo (popolkanto) ..	136
Asu Badi (popolkanto)	138
Vojo de Printemp-heroldo (nova popolkanto) ..	143
Fiera rano (fablo)	146
La Nangiang-anoj (poemo)	213
Fremdlandaj proverboj	216
Tri fajfoj (nova rakonto)	217
Lupo kaj pego (fablo)	238
Afrikaj proverboj	244
Florgastejo (poemo)	259
Kanto pri la novo (poemo)	334

ARTOJ

"Ruĝas Oriento" eposo de muziko kaj danco (kun bildpaĝoj)	20
---	----

KULTURO, EDUKO, SCIENCO

Ĉinaj laboristoj sur la monda scienca podio	8
La novaj atingoj de ĥirurgio en Ĉinio	14
*Lernejoj por studo kaj laborado	17
*Unuaj diplomitoj de la pertelevida universitato ..	17
*Du volumoj de "Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong" en fremdlingvoj	17
*Alia grupo de kamparanaj sciencistoj	17
Ĉiu membro kreskas sub ĝi kvazaŭ heliant' (kanto kun muziko)	68
*Kranio de simiohomo nove malkovrita	80
*450,000 kuracistoj kaj flegistoj	84
*Amase eldoniĝis sciencaj libroj kaj gazetoj ..	84
*Geomagneta mezuro	84
Kultura husaro	120
Astronomia grupo de junaj pioniroj	132
Eduko de etuloj	149
*Du kometoj malkovritaj	150
*Raporta kunveno de fizikokultura scienco	150
Eduksistemo de nova tipo	187
Unu duonlabora-duonlerna lernejo	196
*Sunteleskopo	203
Unu vilaĝa biblioteketo kaj ĝia bibliotekisto ..	209
*Observatorio sur Himalaĵoj	212

“La Fajreroj en Fragmitejo” (pekina opero) ..	28
Eksterordinara batalo en la ordinara vivo (pri la teatraĵo “Nepre ne Forgesu”)	37
*Ŝanhaja opero “La Fajreroj en Fragmitejoj” varme akceptata	43
Malsamaj nacioj kun sama voĉo	69
Ĉiuj nacioj de Ĉinio prikantas socialismon (bildpaĝo)	71
Pentraĵoj de infanoj (bildpaĝoj)	127
Nova moro de geknaboj	131
“Indignaj Flamoj en Kokosarbaro” (bildpaĝoj) ..	189
“Ruĝa Virina Taĉmento” (bildpaĝoj)	191
“Ruĝa Virina Taĉmento”, nova disvolviĝo de la baledo en Ĉinio	193
*La semajno de scienc-popularigaj filmoj	212
*Ŝanhajaj kamparanoj ludis teatraĵojn	212
*La vilaĝa kulturlabora grupo	212
Li Giefu — revolucia komponisto	245
“Marŝas Ni sur Granda Voj” (kanto kun muziko) ..	247
Vera heroo min edukis	260
*La koncerto por Vjetnamio kontraŭ Usono ..	263
*Filmo-semajno por celebri la 20-jaran datrevenon de la venko super la germana faŝismo ..	263
Batal-tamburado ĉe l' Ekvatoro	264
*Teatra aktivado de ŝanhajaj laboristoj	272
*Novaj belartaj filmoj	272
Filmoprezento por kamparanoj	317

POPOLA VIVO

La laboristoj de nova Ĉinio	5
Mi rejuniĝas	11
Tri renkontoj kun la rivalo	16
*Pli ol 40,000 sepdek-jaruloj en Kantono	17
Inter vendistoj kaj klientoj	18
Ĉinaj popolaj ludoj dum la Printempa Festo ..	19
La turisma vivo de la ŝanhajanoj	27
*14 ĉinoj centjaraj	27
*Aŭtonomata poŝtejo	43
*Ses novaj rekordoj en naĝado de gejunuloj	43
Ĉinaj virinoj sur la vojo de liberiĝo	60
En hejmo de unu komunumano	81
La sportistinoj de du generacioj	83
*Sportoj populariĝis	94
Por morgaŭ	103
La infanoj de la nova Ĉinio	104
*Senparencaj maljunaj servutuloj bone zorgataj ..	111
Rakonto pri blindaj geedzoj	119
Por savi infaneton de laboristino	125
Komparo de infanaĝoj	134
Sporto (bildpaĝo)	147
*3.8-oble pliiĝis la kuracejoj en Tibeto	150
Novaj atingoj de la tablotenisa teamo de Ĉinio ..	181
El legejo en praktikon	206

Post mia reveno de Francio	207
Plezura naĝado de prezidantoj Maŭ kaj Liu en la Dektrimaŭzolea Akvorezervejo	234
Malsamaj tagoj ĉe la Klara Lago	257
Novaj homoj kaj novaj aferoj en la nova lando ..	292
Lej Feng — bona servanto de la popolo	296
El la taglibro de Lej Feng	298
Gejunuloj en la montregiono de Liping	307
La provizado de legomoj en Pekino (bildpaĝoj)..	311
Elektado de grupestro	315
Sportas milionoj da popolanoj	328


AMIKECO, ESPERANTO, K. A.

Kresko kun la venko de socialismo	3
Vejĉio	39, 95, 148, 219, 272
“Post la Kurso”	44, 96, 151, 220, 274, 335
“Esperanto Marŝas”	45, 97, 152, 221, 276, 338
“Sur Nia Librobreto”	45, 97, 152, 221, 275, 336
“Inter Ni”	46, 278, 337
“Korespondi Deziras”	46, 98, 153, 222, 277, 339
“Distra Angulo”	46, 98, 154, 222, 277, 338
La Pekina Internacia Tablotenisa Invita Turniro	40
Sur unu sama fronto batalas la aziaj kaj afrikaj verkistoj	86
Roko-abeloj	151
En tiu ĉi numero	159
Longevivaj arboj	210
Ĉina aligato	238
Esperanto, lingvo de paco, ŝlosilo de la laboranta Ĉinio	270
Kantono, urbo plena de internacia amikeco ..	332
Haŝi-rano	334

ALDONOJ

La Registaro de la Ĉina Popola Respubliko deklaras: Agreso al Vjetnamio signifas agreson al Ĉinio	al n-ro 2
Por solvi la problemon de suda Vjetnamio, antaŭ ĉio Usono devas retiriĝi el suda Vjetnamio	al n-ro 3
Subteno al la vjetnama popolo kontraŭ la usona agreso estas la internaciisma devo de la ĉina popolo	al n-ro 3
Deklaro de la Naciliberiga Fronto de suda Vjetnamio pri intensigo kaj disvastigo de agresa milito al suda Vjetnamio fare de la usona imperiismo	al n-ro 3
La mondo diras: La sukcesa eksplodigo de la dua atombombo de Ĉinio estas alia granda kontribuo al defendo de la mondpaco	al n-ro 4





La unua neĝo ĉe Bejhaj-parko.



一九六五年秋 陸志平画